# KOTAVA

## PLENA GRAMATIKO

*Adaptite de Luce Vergneaux*
*surbaze de la plena gramatiko oficiala*
*(GRAMMAIRE OFFICIELLE COMPLÈTE)*
*redaktita de Staren Fetcey kaj de la*
*Lingvistika Komitato Kotava*

*Versio IV.07 : Decembro 2020*

*Partoprenu humanisman projekton universalan, utopian kaj realisman*

# ENHAVO

**Antaŭtrakto :** [abdiwonaks]

Ĉap. I : Lingvaj bazoj ĝeneralaj [avomaveem]
Ĉap. II : Lingva historio de Kotavao [towarizvot va Kotava]

**La sonscienca sistemo :** [mamopaf bolk]

Ĉap. I : La alfabeto de Kotavao [abava]
Ĉap. II : La reformo de 2011 [fabdura ba 2011]
Ĉap. III : La regulo de la akcentado [bloskara]

**La grafika sistemo :** [suteraf bolk]

Ĉap. I : Grafikaj specialecoj [suteraptaceem]
Ĉap. II : Transskribado de la propraj substantivoj [remsutera va pilkayolt]
Ĉap. III : Uzo de la majuskloj [unera va eltayap]
Ĉap. IV : Uzo de la interpunkcioj [unera va staaxa]

**La gramatika sistemo :** [pulviropaf bolk]

Ĉap. I : La morfologia tabulo [tazukak]

Ĉap. II : La substantivoj [yolt]

- A : La genro de la substantivoj [yoltoxi]
- B : La regulo de la sonharmonia referenco [mamanyara]
- C : La esprimo de la pluralo [tukontara]
- Ĉ : La propraj substantivoj kaj la klasigiloj [pilkayolt is pulaxa]

Ĉap. III : La verboj [gray]

- A : La verba radikalo [grayzaeya]
- B : La verbaj paroloj [grayeweem]
- C : La verbaj modoj [graycaveeem]
- Ĉ : La tensoj [graysareeem]
- D : La statoj [graysokeem]
- E : La aspektoj [graykerdeleem]
- F : La modospecoj [graycaveindeem]
- G : La verbodirektoj [graywoyokeem]
- Ĝ : La personoj [grayilkomeem]
- H : La specifaĵoj [graysodjeyeem]
- Ĥ : La participo [trendacave]
- I : Sintezo pri la verba koncepto [vixaks icde grayaf stravok]
- J : Transitivaj, duoble transitivaj kaj netransitivaj verboj [tanmukodaf grayeem isu tolmukodaf isu mukodiskaf]
- Ĵ : La neoriginalaj verboj [ilkomiskaf grayeem]
- K : La stataj verboj [sokaf grayeem]
- L : La sensaj verboj [pestaleraf grayeem]

- M : La movaj verboj [liziweraf grayeem]

Ĉap. IV : La determinantoj [gotuxa]

- A : La adjektivoj [soreleem]
- B : La aktualigiloj [tunoelaxeem]
- C : La epiteta rolo [duwotafa yordara]
- Ĉ : La adjektiva rolo per verbo [sparayafa yordara]

Ĉap. V : La pronomoj [ikayolt]

- A : La personaj pronomoj [ilkomaf ikayolteem]
- B : La posesivoj [dikiraf ikayolteem]
- C : La rilativoj kaj aliaj [skedaraf ikayolteem isu ar]

Ĉap. VI : La adverboj [muge]

- A : La originalaj verboj ne derivitaj [xantaf mugeeem]
- B : La adverbaj serioj [mugeenkeem]
- C : La manieraj adverboj derivitaj [baskaf mugeeem]

Ĉap. VII : La interjekcioj [divieks]

Ĉap. VIII : La prepozicioj [yaz]

- A : La prepozicioj nek pri loko nek pri tempo [mexof is meugalaf yazeem]
- B : La prepozicioj pri tempo [ugalaf yazeem]
- C : La prepozicioj pri loko [xof yazeem]
- Ĉ : La prepoziciigo sur adverbo (adverbaj prepozicioj) [mugeyazeem]

Ĉap. IX : La konjunkcioj [skedaxa]

- A : La primitivaj subjunkcioj [taneodaf dirgas skedaxeem]
- B : La komponitaj subjunkcioj [ponan dirgas skedaxeem]
- C : La specialaj kunordigiloj [aptaf dobenplekus skedaxeem]
- Ĉ : La adverbaj konjunkcioj [mugef skedaxeem]
- D : La anstataŭiganta konjunkcio [ikaaykasa skedaxa]
- E : La kunigantaj konjunkcioj [kagluyas skedaxeem]

Ĉap. X : La afiksoj [osta]

- A : La ĝeneralaj afiksoj [jadif osteem]
- B : La verbigaj afiksoj [tugrayas osteem]
- C : La verbaj afiksoj [grayosteem]
- Ĉ : La substantivaj afiksoj [yoltosteem]
- D : La afiksoj de determinanto [gotuxosteem]
- E : La substantivaj kvazaŭsufiksoj [riwef yoltradimosteem]

Ĉap. XI : La aserta elmontrado [ruyesa danedira]

- A : La postdemanda aserto [radimikoerurafa ruyera]
- B : La atribua aserto [pilkovoyafa ruyera]
- C : La determinanta aserto senpersona [meilkomafa gotusa ruyera]
- Ĉ : La absoluta aserto [belikafa ruyera]
- D : La atentigo al frazelemento [ravlemafa tuanulara]

Ĉap. XII : La kompono [ponara]

- A : La simpla kompono [opelafa ponara]
- B : La sinteza kompono [jesa ponara]
- C : La adverbiga kompono [tumugeasa ponara]

Ĉap. XIII : La vortordo [ravlemvura]

Ĉap. XIV : La principoj de esprimado [muxarindeem]

Aneksaĵoj [yona notraca]

# ANTAŬTRAKTO

## Ĉapitro I : LINGVAJ BAZOJ ĜENERALAJ [avomaveem]

Kotavao ne estas natura lingvo, temas pri konstruita lingvo, kies celo estas povi servi, kiel helplingvo por komunikado inter la homaj popoloj kaj kulturoj. Por respekti kaj promocii la fundamenta principo de reala neŭtreco kultura kaj filozofia, ĝi estas kreita laŭ originalaj bazoj, laŭ koncepto « a priori »; tio signifas plejparte, ke ĝia vortaro devenas de neniu estanta aŭ estinta lingvo, sed estas tute inventita. Tiucele, Kotavao estas kreita laŭ gramatikaj kaj esprimplenaj konceptoj, kiuj plej komune estas uzataj kaj konataj de la Teranoj kaj kiuj estas plej facile aplikeblaj. Esencaj ecoj ankaŭ estas evolueblo kaj disvolveblo rilate al la estontaj Kotavaparolantoj.

Kotavao estas do ĉefe arkitekturo, ĝeneralaj principoj, vivaj mekanismoj, ordigitaj laŭ sistemo kohera kaj malfermebla. Ĝiaj bazaj postuloj, kiuj difinas ĝin kaj ĝin strukturas, do estis, estas kaj devos resti:

- Neŭtreco: konstruita laŭ absoluta volo de neŭtreco rilate al estantaj aŭ estintaj lingvoj, ĉerpante sian vortaron kaj siajn vortajn resursojn el neniu.
- Originaleco: ĝi tiras siajn kvalitojn el sia propra, unika kohero, kaj estas nepre memsufiĉa.
- Universaleco: ĝia logiko, ĝiaj mekanismoj kaj ĝia fonologio baziĝas sur principoj larĝe universalaj (aŭ preskaŭ, esceptoj ĉiam troveblas).
- Reguleco kaj klareco: esenca punkto, la lingvo estas absolute regula kaj forigas la esceptojn, plursencecojn kaj aliajn diversajn komplikaĵojn. Ĝiaj precipaj mekanismoj estas logikaj kaj antaŭvideblaj.
- Simpleco kaj supleco: por ebligi facilan lernadon fare de la plejparto de homoj, sen specifaj konoj. Temas pri absoluta simpleco kaj ne rilata, ĉar ĝi baziĝas sur neniu alia konata lingvo.
- Riĉeco: riĉa je ebloj, je variadoj kaj je resursoj, tiom gramatikaj, kiom vortaj. Ĉiu parolanto devas povi esprimi sin laŭ sia logikeco, siaj vidpunktoj kaj disvolvi sian esprimon sen restrikto.
- Evolueblеco: tute esenca principo, la lingvo devas esti vivanta kaj evolui kun siaj uzantoj.

Konsiderante la lingvistikaj kaj teknikaj ecoj, Kotavao havas, interalie, tiujn precipajn trajtojn:

- Fonologia sistemo simpla kun kvin vokaloj kaj dek sep konsonantoj kun libera plenumo.
- Alfabeto latinforma simpligita, sen diakritaj signoj.
- Lingvo je miksa tipo, precipe aglutina (sistemo de la afiksoj, tensoj, modospecoj, derivitaĵoj kaj komponaĵoj), parte fleksia (persona konjugacio, vokala harmonio de la determinantoj, adjektivoj kaj participoj), kaj malgrave analiza (aspektoj, verbodirektoj, specifaĵoj, prepozicioj, radikaj formoj). Sed kia ajn estas la maniero nomi, ĉiuj gramatikaj trajtoj estas tute regulaj kaj tuj videblaj.
- Totala neesto de deklinacioj. Neniu nocio de morfologia genro.
- Prepozicia lingvo, kie ĉiu noma aŭ pronoma komplemento estas nerekta kaj nepre almetata per prepozicio. Ekzistas neniu postpozicio.
- Librega sintakso, kvankam ĝi klasike estas precipe je la tipo SOV (subjekto – objekto – verbo) aŭ OSV.
- Graveco de la neverbaj frazoj: nomaj, adjektivaj aŭ adverbaj.
- Hierarkiigo de la verba gramatiko ĉirkaŭ la nocio de verba parolo.

- Fine, simbiozo de la gramatiko kaj de la esprimo en kelkaj grandaj determinantaj principoj, kiel la konteksteco, minimumeco, kroĉiĝo, senplursencaĵismo aŭ pozicio de esprimanto.

## Ĉapitro II : LINGVA HISTORIO DE KOTAVAO [towarizvot va Kotava]

**1978** : Oficiala naskiĝo de Kotavao
**1983** : 1ª ĝenerala reformo
**1993** : 2ª ĝenerala reformo
**2008** : Reformo de la regulo de la pluralo
**2011** : Forigo de la litero H

Ekde la komenco, estis decidite, ke Kotavao neniam estos fiksita lingvo finofara kun lingva kaj gramatika neŝanĝebleco. La lingvo devas evolui, kaj evoluas, regule kun siaj parolantoj, iliaj bezonoj kaj la maĵoraj uzoj konstatitaj, kun parte ankaŭ necesa anticipo. Ĉi tiu stato estas en ĝia bazo, tial ĉi tiu oficiala gramatiko tute ne estas konsiderinda kiel definitiva « Fundamento », sed simple kiel iu iama stato de la lingvo.

Krom la ĉefaj evoluaj datoj supraj, Kotavao estas regulata de Lingva Komitato (Kotava Avaneda), kiu preskaŭ ĉiu-jare kuniĝas kaj validigas aŭ rifuzas proponitajn evoluaĵojn.

Ĉi tiu Esperanta versio de la gramatiko estas la traduko de la oficiala franclingva versio v4.07/2020, kun adaptiĝetoj por la Esperantistoj.

# LA SONSCIENCA SISTEMO

## Ĉapitro I : LA ALFABETO DE KOTAVAO [abava]

La alfabeto de Kotavao enhavas 24 literojn:
- 5 vokalojn: ***a, e, i, o, u***
- 17 konsonantojn: ***b, c, d, f, g, j, k, l, m, n, p, r, s, t, v, x, z***
- 2 glitantojn (aŭ duonvokalojn): ***w, y***

| majusklo | minusklo | translitero IFA | samvalorajô (eo) | Kotavaa nomo |
|---|---|---|---|---|
| A | a | /a/ | a | *a* |
| B | b | /b/ | b | *be* |
| C | c | /ʃ/ | ŝ | *ce* |
| D | d | /d/ | d | *de* |
| E | e | /e/, /ɛ/ | e | *e* |
| F | f | /f/ | f | *fe* |
| G | g | /g/ | g | *ge* |
| I | i | /i/ | i | *i* |
| J | j | /ʒ/ | ĵ | *je* |
| K | k | /k/ | k | *ke* |
| L | l | /l/ | l | *le* |
| M | m | /m/ | m | *me* |
| N | n | /n/ | n | *ne* |
| O | o | /o/, /ɔ/ | o | *o* |
| P | p | /p/ | p | *pe* |
| R | r | /r/, /ʁ/ | r | *re* |
| S | s | /s/ | s | *se* |
| T | t | /t/ | t | *te* |
| U | u | /u/ | u | *u* |
| V | v | /v/ | v | *ve* |
| W | w | /w/ | ŭ | *we* |
| X | x | /x/ | ĥ | *xe* |
| Y | y | /j/ | j | *ye* |
| Z | z | /z/ | z | *ze* |

**Fonetikaj apartaĵoj:**

- La litero ***w*** *(we)* ne ekzistas en fina pozicio, krom kaze de propraj nomoj. En Kotavao, normale, ĝi devas esti tuj sekvata de vokalo.
- La litero ***y*** *(ye)* estas la palata duonvokalo. En Kotavao, ĝi nepre troviĝas apud almenaŭ unu vokalo, antaŭe aŭ poste, krom kaze de la ĝenerala sufikso « -any » (sur konsonanta radikalo); krom ankaŭ, imaginde, kaze de propraj nomoj.

## Ĉapitro II : LA REFORMO DE 2011 [fabdura ba 2011]

Ekde sia kreo kaj ĝis la reformo okazinta en 2011, Kotavao enhavis dudekkvinan literon: la litero ***h*** *(nhe)*. Ĉi tiu troveblis nur en tri pozicioj: post la konsonantoj l, m aŭ n. Servis ĝi por palataligi tiujn literojn. Troviĝis ĝi neniam en inicialo aŭ en alia pozicio, krom kaze de propraj substantivoj. La reformo de 2011 forigis ĝin kaj anstataŭas ĝin ĉiukaze per la litero ***y*** *(ye)*. Nun, ĝi ne plu estas uzata. Tamen, la tekstaro antaŭe redaktita faras, ke ĝia uzo nur iom post iom malaperos.

## Ĉapitro III : LA REGULO DE LA AKCENTADO [bloskara]

En Kotavao, ekzistas unu nura regulo de akcentado, sen escepto, krom tiu pri la verbaj radikaloj, kiuj konstituas la unuajn personojn de la singularo en konjugacio.

- Vorto, kiu finiĝas per konsonanto aŭ duonvokalo havas la akcenton sur la lasta silabo.

Ekz.: *tuvel* (tuvel)
*felay* (felay)
*sayakik* (sayakik)

- Vorto, kiu finiĝas per vokalo havas la akcenton sur la antaŭlasta silabo.

Ekz.: *blucte* (blucte)
*kando* (kando)
*feralia* (feralia)

- La unuaj personoj de la singularo de la konjugacio, kvankam karakterizitaj de fina vokalo estas oksitonaj, konforme al la aliaj konjugacioj (karakterizitaj de fina konsonanto), tial, skribe, ni marku tion per dekstra korno.

Ekz.: *jin estú* (jin estú)
*jin ziliyí* (jin ziliyí)

# LA GRAFIKA SISTEMO

## Ĉapitro I : GRAFIKAJ SPECIALECOJ [suteraptaceem]

En Kotavao, nur unu diakrita signo estas akceptata:

- la dekstra korno (´), nedeviga, kiu ĝenerale estas sur fina vokalo de la unuaj personoj de la singularo de la konjugacio.

- la aliaj diakritaj signoj (tremaoj, tildoj, aliaj kromsignoj ktp-) ne ekzistas en Kotavao. Nur propra substantivo povas havi iun el ili.

## Ĉapitro II : TRANSSKRIBADO DE LA PROPRAJ SUBSTANTIVOJ [remsutera va pilkayolt]

### A : La propraj substantivoj skribitaj per latineca alfabeto

Tiujn proprajn substantivojn oni transskribu sen modifo, eĉ do la eventualajn diakritajn signojn, kiuj ne estas konataj en Kotavao.

Ekz.: ***Québec***
***Washington***
***A Coruña***
***Łódź***
***Århus***

### B : La propraj substantivoj skribitaj per greka aŭ cirila alfabeto

Tiujn proprajn substantivojn oni transskribu rekte laŭ la plej proksima Kotavaa fonetiko, de ilia fonta lingvo.

Ekz.: ***Astraxan*** (Astraĥano) [rusa]
***Moskva*** (Moskvo) [rusa]
***Kiyiv*** (Kievo) [ukraina]
***Lenin*** (Lenino) [rusa]
***Atina*** (Ateno) [greka]
***Tergovicte*** (Tărgovište) [bulgara]

**C : La propraj substantivoj skribitaj per alia alfabeto**

Oni uzu la internacian sistemon de transskribado.

Ekz.: ***Iraq***
***Hiroshima***
***Mao Zedong***
***Beijing***

## Ĉapitro III : UZO DE LA MAJUSKLOJ [unera va eltayap]

En Kotavao, la uzo de la majusklo kontribuas al la gravigado de la vorto.
La uzo de ĝi estas deviga por la inicialo de propra substantivo, nomo de lingvo aŭ de popolo.
Ĉiu frazo nepre komenciĝas per majusklo.

## Ĉapitro IV : UZO DE LA INTERPUNKCIOJ [unera va staaxa]

- **la simpla punkto** (.) : Ĝi markas la finon de elparola ĉeffrazo.
- **la demandosigno** (?) : Ĝi markas la finon de demanda ĉeffrazo.
- **la krisigno** (!) : Ĝi markas la finon de ordona ĉeffrazo.
- **la imperativa signo** (‼) : alinome duobla krisigno. Ĝi markas la finon de imperativa ĉeffrazo.
- **la tripunkto (…)** : Ĝi montras suspendon de frazo.
- **la punktokomo** (;) : Ĝi markas paŭzon en la frazo kaj montras ian apartigon.
- **la komo** (,) : Ĝi markas paŭzeton en la frazo.
- **la dupunkto** (:) : Ĝi markas ene de frazo, ke estas aperonta listigo, citado.
- **la citiloj** (« ») : Ili enmetas citaĵon aŭ estas uzataj por montri, ke estas ia dubo pri la vorto.
- **la krampoj** () : Ili estas uzataj por enigi kompletigan informon.
- **la streketo** (-) : Ĝi enigas dialogon aŭ liniojn de listo. Ĝi servas ankaŭ por fari mallongigon (ekz. *ikz-* por « ktp »).
- **la tildo** (~) : Ĝi enigas kaj kadras nedependantan propozicion ene de frazo, precipe la klarigojn de dialogoj.

# LA GRAMATIKA SISTEMO

## Ĉapitro I : LA MORFOLOGIA TABULO [tazukak]

Iu el la grandaj karakterizaĵoj de Kotavao estas la graveco de la morfemoscienco. La kategorioj de vortoj estas klare difinitaj morfemoscience kaj ili estas regataj de strikta hierarkio. La ebloj pasi de iu al alia estas multaj kaj, grandparte pro tio, la lingvo estas riĉa. Tamen tiuj ebloj estas rigore kodigitaj. La morfologia tabulo estas la sintezo de tio.

| | | | |
|---|---|---|---|
| **1.** | **Substantivoj** | | **Verboj** |
| **2.** | | **Determinantoj** | |
| **3.** | | | **Derivitaj adverboj** |

| | | | |
|---|---|---|---|
| **4.** | **Pronomoj** | **Prepozicioj** | **Originalaj adverboj** |
| **5.** | **Partikuloj** | **Konjunkcioj** | **Interjekcioj** |

La morfologia tabulo do enhavas 5 hierarkiajn nivelojn:

- **1a nivelo** : substantivoj kaj verboj. Ili karakteriziĝas el siaj dudirektaj rilatoj inter si kaj kun la determinantoj kaj kun si mem.

- **2a nivelo** : determinantoj. Ili morfemoscience rilatas kun preskaŭ ĉiuj aliaj vortokategorioj kaj kun si mem.

- **3a nivelo** : derivitaj adverboj devenantaj de determinantoj.

- **4a nivelo** : originalaj adverboj ne derivitaj, pronomoj kaj prepozicioj.

- **5a nivelo** : konjunkcioj, partikuloj kaj interjekcioj. Tiuj kategorioj estas apartaj kaj morfemoscience ne rilatas la aliajn.

La tri unuaj niveloj estas nomitaj ***ekspansiigeblaj***, ĉar ili povas disvolviĝi interne. Male, la du aliaj estas nomitaj ***neŝanĝeblaj***, ĉar nur de la ekstero, ili povas esti kreskigataj, per totala kreado el nenio.

# Ĉapitro II : LA SUBSTANTIVOJ [yolt]

## A : La genro de la substantivoj [yoltoxi]

En Kotavao, ne ekzistas specifa nocio de genro, ina, iĉa aŭ alia. Ĉiuj substantivoj havas nedeterminitan genron kaj estas uzataj per tiu valoro. Kiam necesas precizigi aŭ insisti pri la natura sekso de homo aŭ besto, eblas uzi la specifajn sufiksojn de genro « ***-ya*** » por la femaloj kaj « ***-ye*** » por la maskloj.

## B : La regulo de la sonharmonia referenco [mamanyara]

Kotavao ja ne havas specifan nocion de genro, sed tamen la nocio de "***sonharmonia referenco***" gravas en tiu lingvo.
Ĉiuj determinantoj (adjektivoj, determinantoj, numeraloj, participoj), certaj pronomoj (posesivoj ekzemple) kaj la ĝeneralaj sufiksoj estas ja regitaj de ĉi tiu regulo, laŭ kiu ili devas sonharmonie akordi kun sia substantivo (aŭ pronomo) referenca. Tio signifas, ke ili devas enhavi similan sonharmonian finaĵon. Tiel:

- substantivo, kiu finiĝas per ***konsonanto*** *aŭ* ***glitanto*** sekvigas determinantojn, posesivojn kaŭ ĝeneralajn sufiksojn, kiuj havas *finaĵon* ***nulan*** (do konsonanto)
- substantivo, kiu finiĝas per ***-a*** ———————> *finaĵon* ***–a***
- substantivo, kiu finiĝas per ***-e*** ———————> *finaĵon* ***-e***
- substantivo, kiu finiĝas per ***-i*** ———————> *finaĵon* ***-i***
- substantivo, kiu finiĝas per ***-o*** ———————> *finaĵon* ***-o***
- substantivo, kiu finiĝas per ***-u*** ———————> *finaĵon* ***–u***

Ekz.: ***listaf patectoy*** (bela pejzaĝo)
***baroye blucte*** (tri vestaĵoj)
***bati zveri*** (ĉi tiu birdo)

## C : La esprimo de la pluralo [tukontara]

### 1) La pluralo per la senco

En Kotavao, la pluralo estas fundamente senceca kaj efektiviĝas pere de pronomoj, determinantoj kaj adjektivoj kun senco denature plurala, de numeraloj (pli altaj ol 1) kaj la pronomoj kaj personaj finaĵoj pluralaj de la verba konjugacio.

Ekz.: ***koe kelt va aluboy bitej wí*** (mi vidas kvin stelojn en la ĉielo)
**aluboy* (kvin) estas je plurala senco
***koe kelt jontik bitej jebed*** (Multe da steloj brilas en la ĉielo)
**jontik* (multe da) estas je plurala senco; okazigas akordon je la tria persono plurala (**jebed**)

### 2) La nedifina determinanto kun plurala senco « yon »

Alie, Kotavao enhavas specifan nedifinan determinanton kun plurala naturo «***yon***», kiam ne temas pri nombrigado aŭ aparta kalkulo. Vidu sube (ĉap. IV, § I-b).

Ekz.: ***koe kelt va yon bitej rowí*** (mi povas vidi stelojn en la ĉielo)
***yon** (kelkaj) faras pluralan sencon

### 3) La pluralo per sendependa partikulo (antaŭ 2008)

Antaŭ la jaro 2008, Kotavao uzis ian apartan manieron por pluraligi. Ĉi tiu ekzistis per iu neŝanĝebla sendependa partikulo pluraliganta. Estis du tute interŝanĝeblaj : «***se***» kaj «***yo***», kiuj ebligis tiun esprimon.

Por pluraligi substantivon (aŭ pronomon), la regulo konsistis en tio, ke oni metu la partikulon «***se***» aŭ «***yo***» ĵus poste. Ĉi tiu disvastigis sian efekton sur la tutan noman (aŭ pronoman) sintagmon.

Ekz.: *in va bitej **yo** disuker* (ĝi rigardas stelojn)
*Bat listaf batakaf okol **se** vulted* (tiuj ĉi belaj blankaj ĉevaloj kuras)
*Bat listaf batakaf okol **yo** vulted* (tiuj ĉi belaj blankaj ĉevaloj kuras)

La reformo de 2008 rekomendas la forlason de tiu sistemo, favore al la du reguloj ĵus antaŭe klarigitaj. Normale, «***se***» kaj «***yo***» ne plu estas uzindaj. Tamen, la uzo de ili ankoraŭ estas tolerita kvankam malkonsilita ; lokigante la morfemon antaŭ aŭ post la sintagmon.

## Ĉ : La propraj substantivoj kaj la klasigiloj [pilkayolt is pulaxa]

En Kotavao, ĉiu propra substantivo estas rigardata kiel substantivon, sed substantivon absolute neŝanĝeblan kaj nederiveblan, male al la komunaj substantivoj, kaj funkcias reale laŭ apozicia sistemo en, kiu ĝi normale estas akompanata de iu « klasigilo », kiu determinas la naturon de ĝi. La klasigilo devenas el la komuna vortaro kaj sur ĝin mem oni povas aldoni eventualajn derivaĵojn.

### 1) La klasigiloj [pulaxa]

La plejmulto de la substantivoj de la komuna vortaro povas esti uzataj, kiel klasigilon de propra substantivo en apozicio. Tamen, la ĉefaj klasigiloj, kiujn oni renkontas, rilatas al nomoj de homoj (ayik, guazik, velik, ktp.), ĝentilaĵoj (weltik, jiomik), titoloj (gazik, sersik, taneagadesik), nomoj de lokoj fizikaj (kuksa, mefta, uzda, wida, widava) aŭ politikaj (patecta, gola, dota), nomoj de specoj (katca, oxi, bliind), de verkoj aŭ de iliaj bazoj (neva, luz, teliz, fela), de grupoj aŭ entreprenoj (lospa, veem, ja), de mezuroj aŭ unuoj (soluma, lum, lumolk), mono (tal), lingvo (ava), ktp.

Konforme al la subkomprenita principo de Kotavao, kiu komparindigas ĉiun propran substantivon kun determinanto, la apoziciata elemento troviĝas en unua pozicio, sekvata de sia klasigilo. Neniu alia elemento povas ektroviĝi inter ili.

Ekz.: *Napoléon **gindik*** (la imperiestro Napoleono)
*Martin **weltikye*** (Sinjoriĉo Martino); *Martin **weltik*** (Gesinjoro Martino)
*London **widava*** (la urbo Londono)

*Baikal* ***uzda*** (la lago Bajkalo)
*Franca* ***patecta*** (la lando Francio)
*Euro* ***tal*** (la mono eŭro)
*Monotremata* ***veem*** (la ordo de la monotremoj)

*Rimarko* : la regulo de la sonharmonia referenco estos eventuale aplikata sur la klasigilo kaj ne sur la propra substantivo apoziciita, eĉ se ĉi tiu tuj sekvas la koncernitan determinanton kaj havas malsaman finaĵon.

Ekz.: *cuisafa London* ***widava*** (la splenda Londono)

Ĉiuj eventualaj derivaĵoj konstruataj sur propra substantivo uzu do ne la propran substantivon mem, sed ĝian klasigilon

Ekz.: *London* ***widavik*** (Londonano)
*Baikal* ***uzdaxo*** (la teritorio de Bajkalo)
*Euro* ***talolk*** (monero de eŭro, eŭrero)
*Monotremata* ***veemolk*** (besto de la ordo de la monotremoj)

*Rigardu Aneksaĵon B por vidi neĉioman liston de klasigiloj.*

### 2) La propraj substantivoj sen klasigilo [pilkayolt voldo pulaxa]

Tamen, kaze de propra substantivo tre ofta (nomo de lando, de granda urbo, de fama loko, de persono kaj tiel plu), eblas ne mencii ĝian klasigilon. Tiel, oni renkontas nur malofte nomon de lando (Franca, Espana ktp.) akompanatan de sia klasigilo (patecta).

Tiaokaze, la propra substantivo mem regas rekte la sonharmonian referencon kaj povas okazigi derivadojn kaj kunmetojn de vortoj. Tamen ekzistas du nepraj kondiĉoj:

- troviĝu neniu ambiguaĵo, esence pri senca konfuzo kun nepropra vorto jam ekzistanta kaj la kunteksto estu sufiĉe eksplica ;
- la propra substantivo enhavu neniun literon aŭ diakritan signon nekonatajn en Kotavao.

Se iu el tiuj kondiĉoj ne okazas, ni nepre metu klasigilon.

Ekz.: *londonik* (Londonano), simile al *London widavik*
*euroolk* (eŭrero), simile al *Euro talolk*

tamen:
*Québec winkik* (Kebekiano), neniam ~~*Québecik*~~
*A Coruña widavaf* (Korunano), neniam ~~*A Coruñaf*~~

# Ĉapitro III : LA VERBOJ [gray]

La verba sistemo estas la pivoto de Kotavao. Temas ankaŭ pri la plej kompleksa parto de la tuto, sed pli pro la multnombraj potencoj kaj ilia sintezeco ol pro ilia malfacileco. Morfemoscience, verba formo estas tuj rekonebla. En la vortaroj, la verboj estas ordigitaj je siaj radikalaj formoj. Tiuj formoj estas la unua persono de la singularo de la persona modo (efektiva modospeco, aktiva verbodirekto, prezenco). Kotavao ja ne konas veran infinitivon kaj havas nur unu verban substantivon.

En Kotavao, verba formo havas minimume ok gramatikaĵojn ne konsiderante la radikalon, sciante, ke ekzistas ĉiam implicaĵo, kiu havas neniun markon *(oblikve ĉi-sube)* por ĉiu el tiuj gramatikaĵoj, laŭ hierarkia kaj koncepta ordo :

- radikalo de la verbo ;
- indiko de la **verba parolo** : *deklaro,* eksklamacio, demando, volitivo ;
- indiko de la **verba modo** : *indikativo,* participo ;
- indiko de la **tenso** : *prezenco,* preterito, futuro ;
- indiko de la **stato** : *neforta aserto,* aserto, nea stato, neega stato ;

- indiko de la **aspekto** : *simpla daŭrado,* forta daŭrado, antaŭeca aspekto, posteca aspekto, preciza nuneco, proksima estonteco, proksima estinteco, komenciĝo, senĉeso, interrompiĝo, nova komenciĝo post interrompiĝo, finiĝo ;
- indiko de la **modospeco** : *efektiveca,* ebleca, deviga, volitiva, kapableca, kredemeca, videbleca, koneca, kutimeca, absoluteca ;
- indiko de la **verbodirekto** : *aktiva,* pasiva, reflektita, reciproka, kompletiga ;
- indiko de la **persono** : *1ª,* 2ª, 3ª de la singularo, 1ª, 2ª, 3ª, 4ª de la pluralo.

Aliaj gramatikaĵoj estas laŭdezire aldoneblaj (eventuale kunigitaj) :
- **specifaĵoj** : nerealaĵo, juĝaĵo, evidentaĵo, konsiderilo, necesecaĵo, necertaĵo, imperativgrado, demandilo.

  Ankaŭ eblas renkonti plurajn sufiksojn (ĝeneralan sufikson, (ne)transitivigan sufikson).

## A : La verba radikalo [grayzaeya]

La radikalo (nocio malkonfuzinda kun tiu de la radiko) estas la minimuma formo de la verbo.
Verba radikalo nepre karakteriziĝas per karakteriza finaĵo *-á, -é, -i* aŭ *–ú*. Danke al tiu radikalo (sen la supersigno, kiu markas la unuan personon de la singularo), oni kreu ĉiujn aliajn formojn kaj eĉ la verbajn derivaĵojn.

Ekz. de radikaloj : *VEFA* (ludi), en la vortaroj sub la formo *vefá* (mi ludas)
*STUTE* (danci) *stuté* (mi dancas)
*ASKI* (fari) *askí* (mi faras)
*PLEKU* (meti) *plekú* (mi metas)

## B : La verbaj paroloj [grayewa]

La nocio de « verba parolo » estas esenca en Kotavao. Temas ĝi pri la paroloj, frazoj kaj propozicioj en tute. Eĉ ĝi valoras preter la strikta verba amplekso, ĉar oni povas renkonti ankaŭ verbajn parolojn tra frazoj, kiuj estas tute nominalaj. Tiu nocio estas tute same strukturanta pri ĉio, kio rilatas al la verba gramatiko. La verbaj paroloj kalkulas kun la ĝenerala efiko de propozicio (aŭ de plena frazo) regata de verba formo.

Oni distingas en Kotavao kvar verbajn parolojn aŭtonomiajn. Ili estas :

- *Deklaro* : tio estas la baza modo de frazo. Ĝi diras fakton, opinion, paroladon kaj tiel plu, sen kompleksaĵo.
- Eksklamacio : tio estas la modo de emocio, de eksklamacio, de apostrofo, de interjekcio.
- Demando : tio estas la modo de rekta demando.
- Volitivo : ankaŭ nomita « imperativo », ĝi estas la modo de ordono.

### 1) Deklaro [dakterewa]

Temas pri la baza verba parolo. Ĝi estas ĉiam, krom kontraŭa indiko tiucele farita, implica kaj oni do distingas ĝin per ***neniu specifa marko***.

La deklaro estas la fundamenta verba parolo, tiu, kiu regas la bazajn kaj normajn parolojn, la esprimojn de faktoj, de opinioj, de rektaj aŭ nerektaj paroloj, de ĉio, kio ne rilatas al iu el la tri aliaj verbaj paroloj (eksklamacio, demando, volitivo). Ni notu, ke ĝi regas ankaŭ ĉion, kio estas nerekta demando (*rigardu malsupre*).

Voĉe, la verba parolo deklaro karakteriziĝas per neniu specifa fraza intonacio.

Skribe, propozicio aŭ deklara frazo (regita de deklara verbo) nepre finiĝu per simpla punkto, tripunkto, dupunkto aŭ punktokomo.

### 2) Eksklamacio [divierewa]

Tio estas la verba parolo de emocio, interjekcio, miro, apostrofo, eksklamacio.

Iu ajn deklara frazo povas formiĝi eksklamacien.

Skribe, eksklamacio karakteriziĝas per nepra prezentiĝo de krisigno.

Voĉe, eksklamacia frazo havas karakterizan intonacion, kiu estas distinga rilate al tiu de demando aŭ de imperativo. Krom ĉi tiu grava nuanco de intonacio, eksklamacia frazo ne estas malsimila al norma deklara frazo.

Ekzistas tamen serio de pronomoj, determinantoj kaj rilativaj adjektivoj specife eksklamaciaj : la serio de la bazo « ***man !*** ».

- Eksklamacia determinanto « ***man !*** » (kia! tia!)
  Ekz. : ***man*** *gazik tiyir* ***!*** (kia reĝo ĝi estis!)

- Eksklamacia pronomo de la serio « ***man !*** »
  Ekz. : ***mantan*** *tir* ***!*** (kia individuo ĝi estas!)
  *va* ***mancoba*** *askil* ***!*** (kian aferon vi faras!)

- Eksklamacia rilativa adverbo de la serio « ***man !*** »
  Ekz. : ***maneke*** *kobal* ***!*** (vi tiom multe laboras!)
  ***manlize*** *irubayá* ***!*** (mi loĝis en tia loko!)

## 3) Demando [koerurewa]

Tio estas la verba parolo de rekta demando.

Ĉiu deklara frazo povas esti igata demanda.

Skribe, demando karakteriziĝas per nepra prezentiĝo de demandosigno.

Voĉe, se la frazo ne estas determinita per demanda specifa partikulo (kas ?, mex ?) kaj ne estas enkondukita per demanda determinanto (tok, tokeaf, tokoy ?) nek per rilativa demanda pronomo aŭ adverbo (serioj tok- ? aŭ kas- ?), oni iomete enkonduku specife alidirekten la voĉon.

Ekzistas demandaj frazoj simplaj kaj nudaj, precipe, kiam ili estas tre mallongaj, okaze de apostrofo ekzemple (kaj do kun specifa enkonduketo de la voĉo). Tamen, en la plimulto de la situacioj, ili estas akompanataj aŭ enkondukitaj per :

- demandilo de ekzisto « ***kas ?*** » (ĉu?)
  Ĝi estas karakteriza de la ĝeneralaj rektaj demandoj, la normaj demandoj.
  Ekz. : ***kas (in) ker ?*** (ĉu ĝi atendas?)
  ***kas va Paris ok London abdualbá ?*** (ĉu mi preferas Parizon aŭ Londonon?)

- demandilo de dubo « ***mex ?*** » (ĉu ne?)
  Ekz. : ***dotrakut, mex ?*** (ni interkonsentas, ĉu ne?)

- demanda determinanto « ***tok ?*** » (kiu?), « ***tokeaf ?*** » aŭ « ***tokoy ?*** »
  Tipa je parta demando.
  Ekz. : ***tok gazik zo bastakayar ?*** (kiu reĝo estis senkapigata?)
  ***moe tokeafa bodema tigil ?*** (sur la kioma konkursorango vi troviĝas?)

- demanda pronomo de la serio « ***tok- ?*** » (kiu?, k- (de la Esperantaj korelativoj))
  Parta demando.
  Ekz. : ***toktan vanlanir ?*** (kiu proksimiĝas?)
  ***va tokcoba askil ?*** (kion vi faras?)

- demanda pronomo de la serio « ***kas- ?*** » (ĉu troviĝas io (iu), kio (kiu), ĉu ekzistas io (iu), kio (kiu)…)
  Ĝenerala demando.
  Ekz. : ***va kascoba rotaskí ?*** (ĉu troviĝas io, kion mi povus fari?)

- rilativa demanda adverbo de la serio « ***tok- ?*** »
  Parta demando.

Ekz. : ***tokdume va in ienal ?*** (kial vi krias al ĝi?)
***tokliz vulter ?*** (kien ĝi kuras?)

- rilativa demanda adverbo de la serio « ***kas- ?*** » (ĉu ekzistas, ĉu troviĝas ia?)
  Ekz. : ***kaskane pu in rokalí ?*** (ĉu ekzistas maniero por, ke mi povu diri ion al ĝi?)

Nerekta demando apartenas al la verba parolo deklaro. Ĝi estas ĝenerale enkondukita per rilativa adverbo formita per **–**kase (*rigardu malsupre : La rilativaj adverbaj serioj*).

### 4) Volitivo [dirgarewa]

Ofte, oni nomas ĝin imperativo. Tio estas la verba parolo de la ordonoj kaj de la deziroj, petoj.

En Kotavao, male al multaj lingvoj, ĝi estas plena kaj povas esti esprimata en ĉiuj tensoj, ĉiuj statoj, ĉiuj aspektoj, ĉiuj modospecoj, ĉiuj verbodirektoj kaj ĉiuj personoj.

Ĝi ankaŭ estas oftege precizigita per specifaĵoj (*rigardu malsupre § 37a : La imperativgradoj*).

Voĉe, la verba parolo volitivo karakteriziĝas per sia fraza intonacio distinga kaj ekskluziva, imperativa intonacio, preskaŭ ĉiam eksklamacia.

Skribe, la volitivo nepre devas esti markita per imperativa signo (aŭ duobla krisigno **‼**).

En la verbaj paroloj deklaro, eksklamacio kaj demando, la personaj pronomoj estas ĝenerale fakultativaj, sed ili tute ne estas tolereblaj kadre de la volitivo.

Kelkaj ekzemploj de volitivoj :
***KE*** (atendi)
***ké ‼*** (mi atendu!)
***kel ‼*** (atendu, atendu vi (singulare), ci atendu!)
***ketet ‼*** (ni atendu estonte!)
***me ker ‼*** (li/ŝi/ĝi ne atendu!)
***zo ked ‼*** (ili estu atendataj!)
***toz kel ‼*** (ekatendu, komencu atendi vi (singulare), ci ekatendu!)
***rokec ‼*** (povu atendi vi (plurale)!)

## C : La verbaj modoj [graycave]

La koncepto de verba modo en Kotavao estas ekskluzive almetita al la verbo kaj verba formo, sed havas nur du grupajn dividojn:

- *Indikativo*: persona modo
- Participo: nepersona modo

### 1) La indikativo (aŭ *persona*) [tiracave]

Temas pri la implica modo de ĉiu verbo, ekzistanta por ĉiu verba parolo. Ankaŭ ĝi ***neniel distingiĝas***.

La indikativo estas la modo de la sendubaj faktoj kaj de la realo. Ĝi servas al marki tion, kio estas, estis aŭ estos sendube aŭ kvazaŭ sendube. Oni ankaŭ nomas ĝin *persona modo*, kondiĉe, ke ĉiu verba formo indikativa havu mencion de gramatika persono.

Plejparte ĝi mem estos ilustrata en la sekvaj disvolvo kaj ekzemploj.

### 2) La participo [trendacave]

Temas pri la sola nepersona modo de Kotavao. Tio signifas, ke la participo ne estas rekte konektita al absoluta rilatitaĵo, male al la indikativo, sed estas ia rilativa modo, kiu enkondukas rilativajn subfrazojn. Ankaŭ, servas, kiel adjektivaj verboj ĝiaj formoj.

Estus ja logike prezenti ĝin en ĉi tiu loko, konforme al ĝia gramatika loko kaj ĝia moda funkcio, sed ĝia rapida studo estos, pro didaktika kialo, disvolvata malsupre, post la pritrakto de la aliaj

gramatikaj punktoj. Tiel, la ĝusta kompreno de la graveco de tiu modo participo estos nur pli bona. (*rigardu do malsupre § Ĥ : La participo*)

## Ĉ : La tensoj [graysare]

Kotavao konas nur tri tensojn: *prezenco*, preterito, futuro. Ĝia tensa sistemo ne estas establita laŭ distingo inter perfektivo kaj malperfektivo.

- La prezenco estas la tenso, kiu servas esprimi, ke ago okazas en la momento, kiam ĝi estas priparolata.
  La prezenco ankaŭ estas uzata por indiki, ke ago okazas kutime, regule.
- La preterito estas la tenso uzata por la estintaj, finitaj agoj.
- La futuro estas uzata por esprimi, ke ago verŝajne okazos.

Ĉiuj aliaj nuancoj, kiujn aliaj tensoj aŭ kunmetitaj formoj en aliaj lingvoj povas esprimi estas ofte esprimitaj per aspekto (*rigardu malsupre § E*).

Ĉiu modo (indikativo kaj participo) por ĉiu verba parolo (deklaro, eksklamacio, demando kaj volitivo) havas potence tiujn tri tensojn. *[Ĉi-sube, la ekzemploj estas en indikativo, krom kontraŭa mencio.]*

### 1) Prezenco [tise sare | rekee]

La prezenco rekte uzas la radikalon de la verbo, sen aldono de iu ajn tensa sufikso. Ĝi estas kvalifikita **senmarka** kaj la personaj finaĵoj rekte kompletigu la radikalon.

Ekz. : ***DANKA*** (kanti); ***DOLE*** (vendi)

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***danká*** | (mi kantas) | ***dolé*** | (mi vendas) |
| ***dankal*** | (ci kantas) | ***dolel*** | (ci vendas) |
| ***dankar*** | (li/ŝi/ĝi kantas) | ***doler*** | (li/ŝi/ĝi vendas) |
| ***dankat*** | (ni kantas) | ***dolet*** | (ni vendas) |
| ***dankac*** | (vi (plurale) kantas) | ***dolec*** | (vi vendas) |
| ***dankad*** | (ili kantas) | ***doled*** | (ili vendas) |
| ***dankav*** | (ni kantas) | ***dolev*** | (ni vendas) |

### 2) Preterito [tiyise sare | darekee]

La preterito estu formita per specifa sufikso, kiun ni metu inter la radikalon kaj la personajn finaĵojn (aŭ la participajn specifajn sufiksojn).

Tiu sufikso, kun bazo « ***-y*** », fakte havas kvar formojn (je la sama principo, kiel la sonharmonia sistemo) :

- ***ya*** : por la verboj, kiuj havas, kiel finan vokalon la literon ***-a***
- ***ye*** : por la verboj, kiuj havas, kiel finan vokalon la literon ***-e***
- ***yi*** : por la verboj, kiuj havas, kiel finan vokalon la literon ***-i***
- ***yu*** : por la verboj, kiuj havas, kiel finan vokalon la literon ***-u***

Ekz. : ***DANKA*** (kanti); ***DOLE*** (vendi)

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***dankayá*** | (mi kantis) | ***doleyé*** | (mi vendis) |
| ***dankayal*** | (ci kantis) | ***doleyel*** | (ci vendis) |
| ***dankayar*** | (li/ŝi/ĝi kantis) | ***doleyer*** | (li/ŝi/ĝi vendis) |
| ***dankayat*** | (ni kantis) | ***doleyet*** | (ni vendis) |
| ***dankayac*** | (vi (plurale) kantis) | ***doleyec*** | (vi vendis) |
| ***dankayad*** | (ili kantis) | ***doleyed*** | (ili vendis) |
| ***dankayav*** | (ni kantis) | ***doleyev*** | (ni vendis) |

### 3) Futuro [titise sare | direkee]

La futuro formiĝas simile al la preterito, per sufikso inter la radikalo kaj la personaj finaĵoj.

Tiu sufikso, kun bazo « ***-t*** », fakte havas kvar formojn :

- ***ta*** : por la verboj, kiuj havas, kiel finan vokalon la literon ***-a***
- ***te*** : por la verboj, kiuj havas, kiel finan vokalon la literon ***-e***
- ***ti*** : por la verboj, kiuj havas, kiel finan vokalon la literon ***-i***
- ***tu*** : por la verboj, kiuj havas, kiel finan vokalon la literon ***-u***

Ekz. : ***FOLI*** (kredi); ***ESTU*** (manĝi)

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***folití*** | (mi kredos) | ***estutú*** | (mi manĝos) |
| ***folitil*** | (ci kredos) | ***estutul*** | (ci vendis) |
| ***folitir*** | (li/ŝi/ĝi kredos) | ***estutur*** | (li/ŝi/ĝi manĝos) |
| ***folitit*** | (ni kredos) | ***estutut*** | (ni manĝos) |
| ***folitic*** | (vi (plurale) kredos) | ***estutuc*** | (vi manĝos) |
| ***folitid*** | (ili kredos) | ***estutud*** | (ili manĝos) |
| ***folitiv*** | (ni kredos) | ***estutuv*** | (ni manĝos) |

## D : La statoj [graysok]

Kotavao konas kvar statojn :

- *Neforta aserto* : tio estas la normala, kutima stato, kiu simple indikas, ke ago estas, daŭras.
- Aserto : tio estas kiel la neforta aserto, sed pli forta. Ĝi insistas sur la realiĝo de la ago kaj havas do la nocion de «ja».
- Nea stato : tio estas la inverso de la neforta aserto. Ago ne okazas, sen insisto.
- Neega stato : tio estas la malo de la aserto. Ago ne okazas kaj ĉio ĝuste estas kontraŭ la realiĝo de la ago.

Ĉiu modo (indikativo kaj participo), en la kvar verbaj paroloj (deklaro, eksklamacio, demando kaj volitivo) potence povas esti en tiuj kvar statoj. *[Ĉi-sube, la ekzemploj estas en indikativo, krom kontraŭa mencio.]*

### 1) La neforta aserto [anje sok]

Temas pri la normala stato. Ago simple okazas.
En Kotavao, ***la stato « neforta aserto » estas implica***. Tio signifas, ke ĝi karakteriziĝas per neniu specifa marko.

Ekz. : ***estú*** (mi manĝas)
***koe Paris irubá*** (mi loĝas en Parizo)
***va sumewisiki wir*** (ĝi vidas la televidilon)
***va in kiaval*** (vi salutas ĝin)

### 2) La aserto [ene sok]

Temas pri la stato simila al la neforta aserto, krom tio, ke ĝi estas pli forta. Ĝi insistas sur la nocio de realiĝo de la ago, sur la fakto, ke ja ĝi okazas vere.

La stato aserto formiĝas per la adverba partikulo antaŭe lokinda « ***en*** ». Kiam tiu partikulo estas sole uzata, ĝi signifas: « jes ».

Ekz. : ***en estú*** (ja mi manĝas, mi ja manĝas)
***koe Paris en irubá*** (ja mi loĝas en Parizo)
***va in en kiaval*** (ja vi salutas ĝin)

### 3) Laxx nea stato [mee sok]

Tio estas la stato, kiu indikas, ke ago ne realiĝas, ke fakto ne okazas, simple.

Kotavao uzas por formi la nean staton simplan la adverban partikulon antaŭe lokendan « ***me*** ». Kiam tiu partikulo estas sole uzata, ĝi signifas: « ne ».

Ekz. : ***me estú*** (mi ne manĝas)

***koe Paris me irubá*** (mi ne loĝas en Parizo)
***va in me kiaval*** (vi ne salutas ĝin)

Apud ĉi tiu simpla negacio, Kotavao konas du derivitajn neigilojn : « ***men*** » kaj « ***mea*** ».

**a) La antaŭa negacio** [abdife mee sok]

Oni nomas per « antaŭa negacio » tiun, kiu indikas, ke ago ankoraŭ ne okazis, sed, ke, ŝajne, ĝi okazos. Ĝi signifas : «ankoraŭ ne».

La antaŭa negacio formiĝas per « ***men*** » (ankoraŭ ne) lokita antaŭe.

Ekz. : ***koe Paris men irubá*** (mi ankoraŭ ne loĝas en Parizo)
***sin va sint men kiavad*** (ili ankoraŭ ne salutas unu la alian)

**b) La postea negacio** [radimife mee sok]

Oni nomas per «postea negacio» tiun, kiu indikas, ke ago estas okazinta kaj ne plu daŭras. Ĝi signifas : «ne plu».

La postea negacio formiĝas per « ***mea*** » (ne plu) lokita antaŭe.

Ekz. : ***koe Paris mea irubá*** (mi ne plu loĝas en Parizo)
***sin va sint mea kiavad*** (ili ne plu salutas unu la alian)

### 4) La neega stato [vole sok]

La neega stato estas originala partikularaĵo de Kotavao. Tiu stato indikas ne nur, ke ago ne okazis, ne realiĝas, sed ankaŭ, ke ĉio aranĝiĝas tiamaniere, ke tio ne okazu.

La neega stato uzas la adverban partikulon antaŭe lokendan « ***vol*** ». Kiam tiu partikulo estas sole uzata, ĝi signifas: «male, tute ne».

Ekz. : ***vol estú*** (mi tute ne manĝas)
***sin va sint vol kiavad*** (ili strebas ne saluti unu la alian)

### 5) La necerteco

Ĝis la jaro 2011, ĉi tiu stato estis klasita, kiel norma stato, kiel la kvar jam pritraktitaj. Nun, ne plu estas tiel kaj ni konsideras ĝin, kiel simplan malgravan gramatikan punkton, kiu estas el la kategorio de la specifaĵoj. La necerteca stato esprimas tion, kio estas eventuala, ebla, necerta, tion, kio eble okazas, sen certeco. Ĝi formiĝas per la adverba partikulo « ***rotir*** », kiu signifas «eble, eventuale, povas esti». (*rigardu malsupre § H6 : La specifaĵoj*).

## E : La aspektoj [graykerdela]

Apud siaj tri tensoj, Kotavao konas, por esprimi ĉiujn nociojn de verba procezo, plenan sistemon de aspektoj. Ekzistas dek du aspektoj :

- *Simpla daŭrado*
- Preciza nuneco
- Antaŭeca aspekto
- Posteca aspekto
- Proksima estinteco
- Proksima estonteco
- Komenciĝo
- Forta daŭrado
- Senĉeso
- Interrompiĝo
- Nova komenciĝo post interrompiĝo
- Finiĝo

Ĉiu tenso, en ĉiu stato, en ĉiu modo, en ĉiuj kvar verbaj paroloj, povas potence esti en tiuj dek du aspektoj. *[Ĉi-sube, la ekzemploj estas en indikativo, krom kontraŭa mencio.]*

**1) La simpla daŭrado** [tiskise kerdela | ree kerdela]

Temas pri la implica aspekto de verbo. Ĝi esprimas, ke la ago de la verbo havas certan daŭron (malo de la «preciza nuneco»).

Ĉar la simpla daŭro estas la baza aspekto de verbo, ĝi formiĝas per neniu partikularaĵo.

Ekz. : ***estuyú*** (mi manĝis)
***koe Paris irubal*** (vi loĝas en Parizo)

**2) La preciza nuneco** [vule kerdela | veree kerdela]

Ĉi tiu aspekto permesas indiki, ke, male al la normala daŭreca valoro, la ago de la verbo estas ekfiniĝanta, kaj, ke ĝi nur estas punkto en la tempo. Ĝi ofte esprimas nocion de subiteco.

La aspekto de la preciza nuneco formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***ve*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ekz. : ***va finta ve disukel*** (vi estas rigardanta la afiŝon ĝuste nun)
***va finta ve disukeyel*** (vi subite rigardis la afiŝon)
***va finta ve disuketel*** (vi subite rigardos la afiŝon)

**3) La antaŭeca aspekto** [tiyise kerdela | daree kerdela]

Tiu aspekto permesas indiki, ke ago okazas, okazis aŭ okazos ĵus antaŭ alia afero iasence rilatata.

La antaŭeca aspekto formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***al*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ekz. : ***ixam al estú*** (mi jam manĝis ; subkomprenate, ke mi pretas por fari alian aferon)
***va imwa al lusteyer abdida piyir*** (ĝi aĉetis florojn antaŭ veni)
***arti tanda al awalketel*** (post unu jaro vi estos mortita)

**4) La posteca aspekto** [titise kerdela | diree kerdela]

Ĉi tiu aspekto, mala al la antaŭeca, permesas indiki, ke ago okazas, okazis aŭ okazos ĵus post alia afero kaj kun rilato kun ĝi. Plejofte, tiu ago estas rekta konsekvenco de la unua.

La posteca aspekto formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***di*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ekz. : ***di estú*** (Mi estas manĝonta ; subkomprenate, ke alia certa afero tion okazigas)
***va imwa lusteter aze di pitir*** (ĝi aĉetos florojn kaj poste venos)
***meldayal nume di awalkeyel*** (vi batalis do pro tio vi mortis)

**5) La proksima estinteco** [kabdie kerdela | suree kerdela]

La proksima estinteco estas aspekto, kiu permesas indiki, ke ago estas okazinta, estis okazinta aŭ estos okazinta, sed sen rilato de okazigo de alia ago, kiel faras la antaŭeca aspekto.

La proksima estinteco formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***su*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ekz. : ***su estú*** (mi estas manĝinta, mi ĵus manĝis)
***va imwa su lusteyer*** (ĝi estis ĵus aĉetinta florojn)
***su awalketel*** (vi estos ĵus mortinta)

**6) La proksima estonteco** [vule kerdela | veree kerdela]

La proksima estonteco estas la ekzakta malo de la proksima estinteco. Ĝi permesas indiki, ke ago certe okazos, estas okazonta, estis okazonta aŭ estos okazonta, sed ankaŭ sen nocio de rilato de okazigo.

La proksima estonteco formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***fu*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ekz. : ***fu estú*** (mi estas manĝonta, mi baldaŭ manĝos)
***va imwa fu lusteyer*** (ĝi estis aĉetonta florojn)
***fu awalketel*** (vi estos mortonta)

**7) La komenciĝo** [vabdie kerdela | toree kerdela]

Tiu ĉi aspekto permesas indiki, ke ago komenciĝas, komenciĝis aŭ komenciĝos.

La aspekto komenciĝo formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***toz*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ekz. : ***toz estú*** (mi komencas manĝi, mi ekmanĝas)
***va imwa toz lusteyer*** (ĝi komencis aĉeti florojn, ĝi ekaĉetis florojn)
***toz awalketel*** (vi komencos morti)

**8) La forta daŭrado** [trenase kerdela | waree kerdela]

Tiu ĉi aspekto indikas, ke ago plu daŭras, daŭris aŭ daŭros, ke ĝi ne estas finita kaj, ke ne okazas interrompo.

La aspekto de la forta daŭrado formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***wan*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ekz. : ***wan estú*** (mi plu manĝas, mi daŭre manĝas)
***koe Paris wan irubar*** (ĝi daŭre loĝas en Parizo, ĝi ankoraŭ loĝas en Parizo)

**9) La senĉeso** [voljoase kerdela | duree kerdela]

Tiu ĉi aspekto indikas, ke ago daŭras kaj ne ĉesas, ne ĉesis, ne ĉesos okazi.

La aspekto senĉeso formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***dun*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ekz. : ***dun estú*** (mi estas manĝanta kaj ne ĉesas manĝi)
***va imwa dun lusteter*** (ĝi ne ĉesos aĉeti florojn, ĝi senĉese aĉetos florojn)

**10) La interrompiĝo** [waljoase kerdela | noree kerdela]

Tiu ĉi aspekto indikas, ke ago interrompiĝas, interrompiĝis aŭ interrompiĝos, sed laŭplane reokazos poste por daŭri.

La aspekto interrompiĝo formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***non*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ekz. : ***non estú*** (mi interrompas mian manĝadon, mi (provizore) ĉesas manĝi)
***koe Paris non irubar*** (ĝi (provizore) ĉesas loĝi en Parizo)

**11) La nova komenciĝo post interrompiĝo** [lintese kerdela | giree kerdela]

Tiu ĉi aspekto indikas, ke interrompita ago reokazas, reokazis aŭ reokazos.

La aspekto de la nova komenciĝo post interrompiĝo formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***gin*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ekz. : ***gin estú*** (mi denove ekmanĝas, mi rekomencas manĝi)
***koe Paris gin irubar*** (ĝi denove loĝas en Parizo)

**12) La finiĝo** [vadimie kerdela | teree kerdela]

Tiu ĉi aspekto estas la ekzakta malo de la komenciĝo. Ĝi indikas, ke ago estas, estis aŭ estos finiĝanta, finofare.

La aspekto finiĝo formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***ten*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ekz. : ***ten estú*** (mi finas manĝi)
***va imwa ten lusteyer*** (ĝi finis aĉeti florojn)
***ten awalketel*** (vi finos agonii, vi finfine mortos)

**13) La enklizo de aspektoj** [kerdelafa jera]

Certaj aspektoj povas eventuale troviĝi kune en enklizo kunmetante siajn sencojn.

Ekz. : ***futen estú*** (mi estas finonta manĝi)
***va tawavopa sugin tavel*** (vi ĵus rekomencis instrui geografion)
***sin venon dankayad*** (ili subite interrompis sian kantadon)

## F : La modospecoj [graycaveinda]

La verbaj modospecoj vehiklas kaj esprimas kvazaŭmodajn nociojn. Modospeco intervenas post la modo. Tio signifas, ke ĝi povas ekzisti potence en la du modoj (indikativo kaj participo), en la kvar verbaj paroloj Kotavaaj (deklaro, eksklamacio, demando, volitivo), en ĉiuj statoj kaj ĉiuj aspektoj, esti konjugaciata en ĉiuj tensoj kaj per ĉiuj personoj. *[Ĉi-sube, la ekzemploj estas en indikativo, krom kontraŭa mencio.]*

La modospecoj distingiĝas de la aspektoj per tio, ke aspekto celas esprimi neĉefan tensan nocion (daŭrado, komenciĝo, antaŭeca aspekto, preciza nuneco, ktp.), kvankam modospeco esprimas nur «situacion» de la subjekto rilate al la ago aŭ la verba stato.

Kotavao konas dek modospecojn (aŭ supermodospecojn) :

- *Efektiva*
- Ebleca
- Devigeca
- Volitiva
- Kapableca
- Kreda
- Videbleca
- Prova
- Kutimeca
- Absoluteca

La modospecoj, krom la Efektiva kaj la Absoluteca, havas submodospecojn. Ĉi tiuj permesas esprimi tre precizajn nociojn, kaze de bezono. Morfemoscience, modospeco rekoneblas per sia prefikso (kun eventuala movebla konsonanto, kaze de radikalo, kiu komencus per vokalo). La submodospecoj formiĝas per la prefikso de sia parenca modospeco kompletigata de specifa subprefikso.

**1) La efektiva modospeco** [tise caveinda]

Temas pri la ĉefa modospeco de verbo. ***La efektiva modospeco estas implica***. Tio signifas, ke oni distingu ĝin per **neniu marko**. Nuda verba formo ĉiam estas en la efektiva.

La efektiva estas la modospeco de tio, kio estas aŭ, kio estas farata, simple.
La efektiva modospeco ekzistas en ĉiuj verbaj formoj, kompreneble.

Ekz. : ***estú*** (Mi manĝas)
***va rin kiavar*** (ĝi salutas vin)
***va dulapafa neva beliyil*** (vi legis interesan libron)

**2) La ebleca modospeco** [rotise caveinda]

Temas pri la modospeco per, kiu oni esprimas, ke ago povas okazi aŭ, ke ĝi estas ebla. ***Nocio de «povo».*** Kvar potencaj submodospecoj.

| Modospeco / submodospeco | Nocio | Prefikso | Ekzemploj |
|---|---|---|---|

| | | | |
|---|---|---|---|
| **EBLECA** | Eblo, kapablo, oportuno, rajto, permeso | **ro(t)-** | rosuter (ĝi povas skribi)<br>rotestur (ĝi povas manĝi) |
| **Fizika kapablo** | Fizika stato kvalita, stato de povi fari, kapablo | **rode(f)-** | rodevulter (ĝi kabablas kuri)<br>rodefestur (ĝi kapablas manĝi) |
| **Mem-eblo** | Mempermeso, aŭdaco | **rove(b)-** | rovesuter (ĝi sin rajtigas skribi, ĝi aŭdacas skribi)<br>rovebestur (ĝi sin rajtigas manĝi, ĝi aŭdacas manĝi) |
| **Deekstera eblo** | Permeso, kiu devenas de ekstere, rajto | **rono(v)-** | ronosuter (ĝi rajtas skribi)<br>ronovestur (ĝi rajtas manĝi, oni permesas al ĝi manĝi) |
| **Cirkonstanca oportuneco** | Senpersona oportuno, cirkonstanca eblo, favora situacio | **rovo(d)-** | rovovulter (la cirkonstanco taŭgas por, ke ĝi kuru)<br>rovodestur (la momento, la cirkonstanco taŭgas por, ke ĝi manĝu) |

Ĉiuj verbaj formoj povas havi la eblecan modospecon.

* En situacio, kie la verba radikalo komenciĝas per vokalo, por eviti hiaton ĉiu el tiuj prefiksoj havas sian apogilan nefiksan konsonanton.

### 3) La devigeca modospeco [gonise caveinda]

Temas pri la modospeco per, kiu oni esprimas, ke ago devas okazi aŭ, ke necesas ĝin okazigi. ***Nocio de «devo».*** Kvar potencaj submodospecoj.

| Modospeco / submodospeco | Nocio | Prefikso | Ekzemploj |
|---|---|---|---|
| **DEVIGECA** | Devo, neceso, bezono | **go(n)-** | gosuter (ĝi devas skribi)<br>gonestur (ĝi devas manĝi) |
| **Fizika devo** | Fizika aŭ fiziologia devo, bezono, neceso | **gode(f)-** | godevulter (ĝi bezonas kuri, pro fizika neceso)<br>godefestur (ĝi fiziologie bezonas manĝi) |
| **Morala devo** | Morala devigo, memdevigita | **gove(b)-** | govesuter (ĝi sin devigas skribi)<br>govebestur (ĝi sin devigas manĝi) |
| **Deekstera devo** | Devigo devigita de la ekstero | **gono(v)-** | gonosuter (ĝi leĝe devas skribi, ekzemple pro postulo de sia editoro)<br>gonovestur (oni devigas al ĝi manĝi) |
| **Senpersona devo** | Ĝenerala devigo farita de neniu aparta, farendeco | **govo(d)-** | govovulter (ĝi hastas kuri)<br>govodestur (ĝi hastas manĝi) |

Ĉiuj verbaj formoj povas havi la devigecan modospecon.

* En situacio, kie la verba radikalo komenciĝas per vokalo, por eviti hiaton ĉiu el tiuj prefiksoj havas sian apogilan nefiksan konsonanton.

### 4) La volitiva modospeco [djumese caveinda]

Temas pri la modospeco per, kiu ni indikas, ke ni celas tian agon. ***Nocio de «volo».*** Kvin potencaj submodospecoj.

| Modospeco / submodospeco | Nocio | Prefikso | Ekzemploj |
|---|---|---|---|
| **VOLITIVA** | Volo, deziro, envio, espero, ŝato | **dju(m)-** | djusuter (ĝi volas, deziras, ŝatas skribi)<br>djumestur (ĝi volas, deziras, ŝatas manĝi) |
| **Rezoluteco** | Volo, postulo, rezolucio, celo | **djuku(r)-** | djukuvulter (ĝi volas, postulas skribi)<br>djukurestur (ĝi volas, postulas manĝi) |
| **Deziro** | Deziro, envio | **djuga(l)-** | djugasuter (ĝi deziras skribi)<br>djugalestur (ĝi deziras manĝi) |
| **Ŝato** | Ŝato | **djuka(r)-** | djukasuter (ĝi ŝatas skribi)<br>djukarestur (ĝi ŝatas manĝi) |
| **Espero** | Espero | **djupo(k)-** | djuposuter (ĝi esperas skribi)<br>djupokestur (ĝi esperas manĝi) |
| **Konsento** | Konsento, komplezo | **djupro(g)-** | djuprosuter (ĝi konsentas skribi)<br>djuprogestur (ĝi konsentas manĝi) |

Ĉiuj verbaj formoj povas havi la volitivan modospecon.

* En situacio, kie la verba radikalo komenciĝas per vokalo, por eviti hiaton ĉiu el tiuj prefiksoj havas sian apogilan nefiksan konsonanton.

## 5) La kapableca modospeco [grupese caveinda]

Temas pri la modospeco per, kiu ni esprimas, ke ni kapablas aŭ, ke ni scipovas. ***Nocio de «scio».*** Unu potenca submodospeco.

| Modospeco / submodospeco | Nocio | Prefikso | Ekzemploj |
|---|---|---|---|
| **KAPABLECO** | Natura scipovo, kapablo, fakulto | **gru(p)-** | grusuter (ĝi scipovas skribi, ĝi kapablas skribi)<br>grupestur (ĝi scipovas manĝi, ĝi kapablas manĝi) |
| **akiro** | Akiro, lerno | **grura(v)-** | grurasuter (ĝi lernas skribi)<br>gruravestur (ĝi lernas manĝi) |

Ĉiuj verbaj formoj povas havi la kapablecan modospecon.

* En situacio, kie la verba radikalo komenciĝas per vokalo, por eviti hiaton ĉiu el tiuj prefiksoj havas sian apogilan nefiksan konsonanton.

## 6) La kreda modospeco [folise caveinda]

Temas pri la modospeco per, kiu ni esprimas, ke ni kredas esti faranta ion. ***Nocio de «kredo».*** Unu potenca submodospeco.

| Modospeco / submodospeco | Nocio | Prefikso | Ekzemploj |
|---|---|---|---|
| **KREDO** | Kredo, sensaĵo, konvinko | **fo(l)-** | fosuter (ĝi kredas skribi, ĝi estas konvinkita, ke ĝi skribas)<br>folestur (ĝi kredas manĝi, ĝi pensas, ke ĝi estas manĝanta) |
| **Mem-imago** | Imago de si | **foge(s)-** | fogesuter (ĝi imagas sin skribi)<br>fogesestur (ĝi imagas sin manĝi) |

Ĉiuj verbaj formoj povas havi la kredan modospecon.

* En situacio, kie la verba radikalo komenciĝas per vokalo, por eviti hiaton ĉiu el tiuj prefiksoj havas sian apogilan nefiksan konsonanton.

## 7) La videbleca modospeco [nuvelase caveinda]

Temas pri la modospeco per, kiu ni esprimas la videblon, la ŝajnon fari ion. ***Nocio de «ŝajno».*** Du potencaj submodospecoj.

| Modospeco / submodospeco | Nocio | Prefikso | Ekzemploj |
|---|---|---|---|
| **ŜAJNO** | Ŝajno, videbleco | **nu(v)-** | nusuter (ĝi ŝajnas skribi)<br>nuvestur (ĝi ŝajnas manĝi) |
| **Ŝajnigo** | Ŝajnigado, simulado | **nuji(d)-** | nujisuter (ĝi ŝajnigas sin skribanta)<br>nujidestur (ĝi ŝajnigas sin manĝanta) |
| **Aserto** | Aserto, atesto | **nuru(y)-** | nurusuter (ĝi asertas skribi, ĝi asertas, ke ĝi skribas)<br>nuruyestur (ĝi asertas manĝi, ĝi asertas, ke ĝi manĝas) |

Ĉiuj verbaj formoj povas havi la videblecan modospecon.

* En situacio, kie la verba radikalo komenciĝas per vokalo, por eviti hiaton ĉiu el tiuj prefiksoj havas sian apogilan nefiksan konsonanton.

## 8) La prova modospeco [lagase caveinda]

Temas pri la modospeco per, kiu ni esprimas provon, klopodon fari ion. ***Nocio de «provo».*** Tri potencaj submodospecoj.

| Modospeco / submodospeco | Nocio | Prefikso | Ekzemploj |
|---|---|---|---|
| **PROVA** | Provo | **la(g)-** | lasuter (ĝi provas skribi)<br>lagestur (ĝi provas manĝi) |
| **Klopodo** | Klopodo | **lasu(g)-** | lasusuter (ĝi klopodas skribi)<br>lasugestur (ĝi klopodas manĝi) |
| **Risko** | Risko, hazardo, endanĝerigo | **laxu(y)-** | laxusuter (ĝi riskas skribi)<br>laxuyestur (ĝi riskas manĝi) |
| **Sukceseco** | Sukceso | **laju(p)-** | lajusuter (ĝi sukcesas skribi)<br>lajupestur (ĝi sukcesas manĝi) |

Ĉiuj verbaj formoj povas havi la provan modospecon.

* En situacio, kie la verba radikalo komenciĝas per vokalo, por eviti hiaton ĉiu el tiuj prefiksoj havas sian apogilan nefiksan konsonanton.

### 9) La kutimeca modospeco [giltise caveinda]

Temas pri la modospeco per, kiu ni indikas, ke ni kutimas fari ion. ***Nocio de «kutimo».*** Du potencaj submodospecoj.

| Modospeco / submodospeco | Nocio | Prefikso | Ekzemploj |
|---|---|---|---|
| **KUTIMA** | Kutimo | **gi(l)-** | gisuter (ĝi kutimas skribi)<br>gilestur (ĝi kutimas manĝi) |
| **Dediĉo** | Dediĉo, konsekrata tempo | **gibe(d)-** | gibesuter (ĝi dediĉas sin al la skribado)<br>gibedestur (ĝi sin dediĉas al la manĝado) |
| **Neelteno** | Interrompo, ĉeso de kutimo | **gita(b)-** | gitasuter (ĝi ne plu eltenas skribi)<br>gitabestur (ĝi ne plu eltenas manĝi, ĝi ne plu estas manĝema) |

Ĉiuj verbaj formoj povas havi la kutimecan modospecon.

* En situacio, kie la verba radikalo komenciĝas per vokalo, por eviti hiaton ĉiu el tiuj prefiksoj havas sian apogilan nefiksan konsonanton.

### 10) La absoluteca modospeco [sokise caveinda]

Temas pri la modospeco per, kiu ni indikas, ke ago aŭ fakto estas io permanenta, io absoluteca. Ni uzu la absolutecan modospecon ĉefe por diri fizikan veron, naturan leĝon, sciencan postulaton, ian proverbon. Neniu submodospeco.

| Modospeco / submodospeco | Nocio | Prefikso | Ekzemploj |
|---|---|---|---|
| **ABSOLUTECA** | Permanenteco, ĝenerala vero | **so(k)-** | sosuter (ĝi skribas, ĝenerala vero)<br>Tawuz sokanamenir (la Tero ĉirkaŭiras, ĝenerala vero) |

Ĉiuj verbaj formoj povas havi la absolutecan modospecon.

* En situacio, kie la verba radikalo komenciĝas per vokalo, por eviti hiaton ĉiu el tiuj prefiksoj havas sian apogilan nefiksan konsonanton.

## G : La verbodirektoj [graywoyok]

Kotavao havas kvin verbodirektojn :
- *Aktivan*
- Pasivan
- Reflektecan
- Reciprokan
- Komplementan

La kvin verbodirektoj potence ekzistas por ĉiu verbo, en la kvar verbaj paroloj, en la du verbaj modoj, tri

tensoj, kvar statoj, dek du aspektoj kaj dek modospecoj (kaj eĉ iliaj submodospecoj), krom limigo de la nocioj de transitiveco kaj de senso, kiel estas pritraktite ĉi-sube. *[Ĉi-sube, la ekzemploj estas en indikativo, krom kontraŭa mencio.]*

### 1) La aktiva verbodirekto [tegis woyok]

Temas pri *la implica verbodirekto* de iu ajn verbo. Pro tio, ĝi estas distingata per **neniu marko**.

Do ĉiuj verboj havas la aktivan verbodirekton. Ĝi permesas la esprimon de la rekta parolo.

### 2) La pasiva verbodirekto [levgas woyok]

La pasiva verbodirekto servas al inversii la nocion de subjekto / objekto.

Nur la verboj transitivaj (do, kiuj povas ricevi objekton per la prepozicio « ***va*** ») havas la pasivan verbodirekton.

La pasiva verbodirekto formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***zo*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ĉiuj verbaj formoj povas esti pasivigataj, eĉ la participo, tamen laŭ specifa konstruo pasiveca.

Ekz. : ***doalié*** (mi batalas) → ***zo doalié*** (mi estas batalata)
***foliyil*** (vi kredis) → ***zo foliyil*** (vi estis kredata)
***rojutur*** (ĝi defendos) → ***zo rujutur*** (ĝi estos defendata)

### 3) La reflekteca verbodirekto [kataces woyok]

La reflekteca verbodirekto indikas, ke la subjekto kaj la objekto estas la sama estaĵo.

Nur la verboj transitivaj (do, kiuj povas ricevi objekton per la prepozicio « ***va*** ») havas la reflektecan verbodirekton, laŭ la kondiĉo, ke tio estu sencohava.

Ĉiuj verbaj formoj povas esti reflektecigataj, eĉ la aktiva participo.

La reflekteca verbodirekto formiĝas per la prepozicio « ***va*** » kun poste la reflekteca persona pronomo : « ***va int*** ».

Ekz. : ***va int tcaté*** (mi lavas min)
***va int tipokeson dankar*** (ĝi kantas tondante sin)
***ko situla va int disukel*** (vi rigardas vin en la glaco)

En situacio de participa komplemento, la formo estu « ***va dil int*** ».

Ekz. : ***va vegungik tildes va dil int me wil*** (vi ne vidas la najbaron, kiu ripozigas sin)
***va in tipokes va dil int disuké*** (mi rigardas ĝin tondanta sin)

### 4) La reciproka verbodirekto [waldaf woyok]

La reciproka verbodirekto, kiu traktas almenaŭ du aktivantojn, indikas, ke la ago estas farata de unu rilate al la alia kaj inverse.

Nur la transitivaj verboj havas la reciprokan verbodirekton, laŭ la kondiĉo, ke tio estu sencohava.

Ĉiuj verbaj formoj povas esti reciprokigataj, eĉ la aktiva participo.
Tamen, pro la pluraleco de la aktivantoj, la reciproka verbodirekto povas esti uzata nur per la personoj de la pluralo.

La reciproka verbodirekto formiĝas per la prepozicio « ***va*** » kun poste la reciproka persona pronomo : « ***va sint*** ».

Ekz. : ***va sint disuked*** (ili rigardas unu la alian)
***va sint vliguyuc*** (vi malestimis unu la alian)

**5) La komplementa verbodirekto** [tuvaras woyok]

La komplementa verbodirekto servas al inversi la nocion subjekto / dueca komplemento, nerekta objekto (ekz. gajnanto).

Nur la duoble transitivaj verboj (do, kiuj povas ricevi du esencajn objektojn : iu komplemento per la prepozicio « ***va*** » kaj iu dueca komplemento per la prepozicio « ***gu*** ») havas la komplementan verbodirekton.

La komplementa verbodirekto formiĝas per la neŝanĝebla partikulo « ***mbi*** » lokita plej proksime antaŭe.

Ĉiuj verbaj formoj povas esti komplementecigataj, eĉ la participo, kiu tamen havas sian specifan konstruon komplementan.

Ekz. : ***zilí*** (mi donas) → ***va lupa mbi zilí*** (oni donas al mi kukon)
***dratceyel*** (vi minacis) → ***mbi dratceyel*** (oni minacis pere de vi)
***dineter*** (ĝi postulos) → ***mbi dineter*** (oni postulos de ĝi)

## Ĝ : La personoj [grayilkom]

Nur la indikativo, ĝuste kvalifikita de persona modo (do ne la participo), havas mencion de persono. Ni indiku ĝin per la personaj finaĵoj. Ĉi tiuj estas absolutaj kaj havas neniun malregulaĵon. Ili estas ĉiam samaj, kiuj ajn estu la tenso, stato, aspekto, modospeco aŭ verbodirekto. Ili estas devige lokitaj en la fino.

| | |
|---|---|
| 1a singulara persono | : radikalo + ***´*** (dekstra korno) |
| 2a singulara persono | : radikalo + ***l*** |
| 3a singulara persono | : radikalo + ***r*** |
| 1a plurala persono | : radikalo + ***t*** |
| 2a plurala persono | : radikalo + ***c*** |
| 3a plurala persono | : radikalo + ***d*** |
| 4a plurala persono | : radikalo + ***v*** |

Ekzemploj de konjugaciitaj verboj : ***TI*** (esti) ; ***ROJU*** (defendi)

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***tí*** | (mi estas) | ***rojú*** | (mi defendas) |
| ***til*** | (vi, ci estas) | ***rojul*** | (vi, ci defendas) |
| ***tir*** | (li, ŝi, ĝi estas) | ***rojur*** | (li, ŝi, ĝi defendas) |
| ***tit*** | (ni estas) | ***rojut*** | (ni defendas) |
| ***tic*** | (vi estas) | ***rojuc*** | (vi defendas) |
| ***tid*** | (ili estas) | ***rojud*** | (ili defendas) |
| ***tiv*** | (ni estas) | ***rojuv*** | (ni defendas) |

Kotavao havas la partikularon distingi du specojn de *ni.* La unua estas inkluziva. Tio signifas, ke ĝi inkluzivas la estaĵon al, kiu la parolanto parolas : tiu *ni* estas 1a persono de la pluralo (finaĵo ***-t***). La dua estas ekskluziva. Tio signifas, ke ĝi ekskluzivas la estaĵon al, kiu la parolanto parolas : tiu *ni* estas la 4a persono de la pluralo (finaĵo ***-v***).

## H : La specifaĵoj [graysodjey]

Krom ĉiuj gramatikaĵoj studitaj ĉi-supre, Kotavao havas ankaŭ aliajn fakultojn : la verbaj specifaĵoj. Malsame je la antaŭe traktitaj gramatikaĵoj, ili estas tute fakultativaj, sen implicaĵo.

Oni nomas per *specifaĵo* gramatikaĵon formitan per adverba partikulo, kiu provizas la ĉeffrazon per kroma informo. Ili grupiĝas en pluraj familioj.

La familioj de verbaj specifaĵoj estas :
- Nerealaĵoj
- Epistemologiaĵoj
- Evidentecoj
- Realeckonsideriloj
- Deeksteraj necesecoj

- Necerteco
- Imperativaj gradoj
- Demandiloj

Ene de ĉiu el tiuj familioj, la opcioj estas ekskluzivaj unu je la aliaj. Tamen eblas kumuli specifaĵojn, kiuj devenas de malsamaj familioj. Fine, certaj restriktoj de uzo rilatas al la plimulto de la specifaĵoj kaj familioj. *[Ĉi-sube, la ekzemploj estas en indikativo, krom kontraŭa mencio.]*

**1) La nerealaĵoj** [megeltraca sodjey]

La nerealaĵoj verŝajne estas la plej oftaj specifaĵoj. Ili estas du :

- la kondicionalo
- la fiktivo

En multaj lingvoj, ili estas konsideritaj, kiel plenaj modoj kaj havas do sian propran konjugacion; ekzemple, en Esperanto, tio estas la us-modo. En Kotavao, ili nur estas malĉefa gramatikaĵo, kvankam ili malvalidigas ekzemple la normalan valoron de la indikativo.

La specifaĵoj nomitaj nerealaĵoj ne povas esti uzataj en la verba parolo volitivo nek en la modo participo.

**a) La kondicionalo** [kredaxa sodjeyinda | sazdaxa]

Ĉi tiu nerealaĵo permesas enkonduki kondiĉon aŭ hipotezon. Ĝi ankaŭ indikas eventualecon, certecon. Ĝi precipe aperas post la konjunkcio « ***ede*** » (se) kaj ĝiaj derivaĵoj « ***edeen*** », « ***edeme*** », « ***edevol*** ».

La kondicionalo estas enkondukita per la adverba partikulo « ***co*** ».

Ekz. : ***ede ko Montréal co pil pune va rin co di jandé*** (se vi venus al Montrealo, mi estus gastigonta vin)
***va Paris lodam London co abdualbayav*** (ni estus preferinta Parizon ol Londonon)

**b) La fiktivo** [kroaxa sodjeyinda]

Ĉi tiu nerealaĵo estas uzata por «us-modumi». Tio signifas indiki, ke tio, kio estas dirata estas sufiĉe necerta kaj devenas de onidiro aŭ de hipotezo pli malpli detalita, aŭ de raportita informo. Ĝi estas gazetstile tipa.

La fiktivo estas enkondukita per la adverba partikulo « ***nuve*** ».

Ekz. : ***bat greltokilik gan ukeik nuve zo adjubeyer*** (ĉi tiu tribestro estus mortigita de fanatikulo)
***gazikya koe Montréal sieleldeon nuve tigitir*** (la reĝino estus troviĝonta en Montrealo morgaŭ dum la komenco de la nokto)

**2) La epistemologiaĵoj** [malyexa sodjey]

La epistemologiaĵoj estas specifaĵoj, kiuj enkondukas juĝon de la parolanto pri la kredebleco kaj vereco de informo, kiun ĝi raportas. Ili estas ok. Iliaj adverbaj partikuloj krome estas ofte uzataj solaj, precipe en la verba parolo eksklamacio kaj en kunteksto de dialogo.

La eco forte persona de Kotavao kaj la intenca tendenco de la Kotavaistoj enkonduki konotacion al siaj paroloj komprenigas, kial la epistemologiaĵoj estas multe uzataj.

La epistemologiaĵoj ne povas esti uzataj en la verba parolo volitivo aŭ demando, nek en la modo participo.

La epistemologiaĵoj estas :

| | | |
|---|---|---|
| acke | tio estas normala, norma, tio estu tia | ***Sen opinio*** |
| ae | bone, mi notas tion | ***Strikta neŭtreco*** |

| | | |
|---|---|---|
| aje | bedaŭrinde, tio estas malbona, malfeliĉe | ***Bedaŭro*** |
| ame | hm! tio estas duba, tio ne estas verŝajna | ***Dubo*** |
| anse | mensoge, tio estas tute malvera | ***Certeco de malvero*** |
| anye | ho! bone, feliĉe, hura! | ***Fiereco*** |
| ape | verŝajne, probable | ***Prudenta konsento*** |
| arse | certe, sendube, nepre | ***Plena konsento*** |

Ekz. : ***bat greltokilik gan ukeik ame zo adjubeyer*** (ĉi tiu tribestro estus mortigita de fanatikulo, sed tio estas tre duba)

**3) La evidentecoj** [vrutaxa sodjey]

La evidentecoj estas specifaĵoj atestaj, kiuj liveras informon pri la elveno de la informo. Ili estas kvin. Iliaj adverbaj partikuloj estas tre ofte uzataj solaj, precipe en la verba parolo eksklamacio aŭ en kunteksto de dialogo.

La evidentecoj ne povas esti uzataj en la verba parolo volitivo aŭ demando, nek en la modo participo.

La evidentecoj estas :

| | | |
|---|---|---|
| inc | mi mem konstatis tion | ***Persona atesto*** |
| nuve | mia scio pri tio estas pro malrekta informo, ŝajne, onidire, ŝajnas ke | ***Onidiro, malrekta informo*** |
| soye | evidente, pro naturo | ***Postulato*** |
| tire | kompreneble | ***Evidenteco*** |
| volinc | mia scio pri tio estas pro rekta informo, | ***Rekta akcesora atestado*** |

Ekz. : ***bat greltokilik gan ukeik volinc zo adjubeyer*** (ĉi tiu tribestro estas mortigita de fanatikulo; mi scias tion, ĉar oni diris tion al mi)

Taŭgas noti, ke la evidenteco de onidiro havas ankaŭ valoron de nerealaĵo – fiktivo.

**4) La realeckonsideriloj** [guzekaxa sodjey]

La realkonsideriloj estas specifaĵoj, kiuj esprimas supozon, impreson, konfirmon aŭ malkonfirmon fare de la parolanto pri la informo, kiun ĝi liveras. Iliaj adverbaj partikuloj estas tre ofte uzataj solaj, precipe en kunteksto de dialogo.

La realkonsideriloj ne povas esti uzataj en la verba parolo volitivo.

La realkonsideriloj estas :

| | | |
|---|---|---|
| awe | hm! mi scias nenion pri tio | ***Nescio*** |
| cwe | ŝajnas al mi, mi havas la impreson, senton, ke | ***Sento, impreso*** |
| gue | jes, mi konfirmas, mi konfirmas, ke | ***Konfirmo*** |
| ste | mi perfekte scias tion, tio estas bone konata de mi | ***Kono*** |
| sye | laŭplane, normale, tio devas esti, principe | ***Anticipo*** |
| tce | laŭ mia supozo, mi supozas, ke | ***Supozo*** |
| volgue | ne, mi malkonfirmas, mi malkonfirmas, ke | ***Malkonfirmo*** |

Ekz. :

***bat greltokilik gan ukeik tce zo adjubeyer*** (mi supozas, ke ĉi tiu tribestro estas mortigita de fanatikulo)
***bat greltokilik gan ukeik awe zo adjubeyer*** (ĉi tiu tribestro estas mortigita de fanatikulo, mi scias nenion pri tio)
***bat greltokilik gan ukeik gue zo adjubeyer*** (mi konfirmas, ke ĉi tiu tribestro estas mortigita de fanatikulo)

**5) La deeksteraj necesecoj** [govodaskixa sodjey]

La deeksteraj necesecoj estas specifaĵoj, kiuj esprimas ian ĝeneralan neceson malbone difinitan kaj farita de neniu certa homo. Iliaj adverbaj partikuloj estas iafoje uzataj solaj.

La personecega karaktero de Kotavao kaj la emo de la Kotavaistoj enkonduki konotaciojn en parolojn komprenigas, kial la deeksteraj necesecoj estas malofte uzataj.

La deeksteraj necesecoj ne povas esti uzataj en la verba parolo demando. En kunteksto de volitivo, ili enkondukas ian malpliigon de la akreco de la ordono, pravigante ĝin iasence pere de neceso, kiu estus el la ekstero kaj malbone difinita.

La deeksteraj necesecoj estas :

| | | |
|---|---|---|
| fiste | necesas, estas necese, ke | ***Deekstera neceso*** |
| vode | taŭgas, estus (pli) taŭge, ke | ***Deekstera prefero*** |
| volfiste | ne necesas, estas nenecese, ke | ***Deekstera rifuzo*** |
| volvode | estus malbone, pli bone estus, ke ne | ***Deekstera nekonsento*** |

Ekz. :

***bat greltokilik gan ukeik fiste zo adjubeyer*** (Necesis, ke ĉi tiu tribestro estu mortigita de fanatikulo)
***bat greltokilik gan ukeik vode zo adjubeyer*** (Estus pli taŭge, ke ĉi tiu tribestro estu mortigita de fanatikulo)

**6) La necerteco** [rotire sodjey]

Ekzistas nur unu specifaĵo en la kategorio de la necerteco. Ĝi indikas la nocion de ĝenerala necerteco. Ĝia adverba partikulo estas ofte uzata sola, precipe en kunteksto de dialogo.

La necerteco povas esti uzata en ĉiuj kuntekstoj kaj verbaj kategorioj. Ĝi estas tre ofta. Temas pri :

| | | |
|---|---|---|
| rotir | eble; eblas, ke | ***Necerteco*** |

Ekz. :

***bat greltokilik gan ukeik rotir zo adjubeyer*** (Ĉi tiu tribestro estas eble mortigita de fanatikulo)

**7) La imperativaj gradoj** [dirgaxa sodjey]

La imperativaj gradoj estas specifaj kaj limigitaj al la verba parolo volitivo. Ili enkondukas nuancojn de forteco, kun potence tri malsamaj fortecniveloj.

La imperativaj gradoj estas tre ofte uzataj, kiel specifaĵoj aŭ solaj. Ili estas :

| | | |
|---|---|---|
| vay !? | mi petas, bonvolu | ***Ĝentila imperativo*** |
| djay ‼ | mi petegas, nu, mi insistas | ***Insista imperativo, simpla peto*** |
| xay ‼ | mi postulas, tio estas ordono! | ***Absoluta imperativo*** |

Ekz. :
***estul vay !?*** (bonvolu manĝi)
***estul djay ‼*** (manĝu, nu manĝu!)
***estul xay ‼*** (manĝu, tio estas absoluta ordono!)

***vay ker !?*** (ĝi bonvole atendu)
***djay ker ‼*** (ĝi atendu!)
***xay ker ‼*** (ĝi atendu, tio estas ordono!)

Imperativa specifaĵo, kiu estas lokita antaŭe havas valoron de nerekta adresado. Kiam ĝi estas lokita poste, ĝi funkcias, kiel rekta adresado. La verba parolo volitivo estas karakterizita per sia intonacio, kaj ĝia modulado okazas laŭ la esprimata nivelo. Tiel, en la imperativo de ĝentileco, la intonacio estu iomete supreniranta, male, en la absoluta imperativo, ĝi estu akra.

**8) La demandiloj** [koeruxa sodjey]

La demandiloj estas limigitaj al la verba parolo demando. Ilia uzo estas ĝenerala. Ili estas :

| | | |
|---|---|---|
| kas ? | ĉu? | ***Demandilo de ekzisto, rekta ĝenerala demandilo*** |
| mex ? | ĉu ne? | ***Demandilo de dubo*** |

(*rigardu supre ĉap. III § B3, por disvolvo kaj ekzemploj*).

## Ĥ : La participo [trendacave]

Temas pri la nura nepersona modo de Kotavao, mala al la indikativo. Tio signifas, ke la participo ne estas rekte konektita al absoluta rilataĵo.

La participo havas du specojn de funkcio :
- pura moda funkcio, kiu igas ĝin specon de rilativa modo, enmetante rilativajn malĉefajn frazpartojn;
- formi verbajn adjektivojn: aktivaj, pasivaj kaj komplementaj.

Kiel la indikativo, la participo respektas la samajn skemojn kaj estas potence plena rilate al:

- tensoj: 3 tensoj;
- statoj: 4 statoj;
- aspektoj: 12 aspektoj;
- modospecoj: 10 modospecoj (kaj la submodospecoj).

Tamen, ĉar ĝi ne estas persona modo, la participo markas neniun personon. Kaj pri la verbodirektoj, ĝi ja havas la kvin ankaŭ (sub la kondiĉo de la transitiveco de la verbo kaj de la senco), sed ĝi tamen havas siajn proprajn formojn malkonfuzitajn de tiuj, kiujn oni uzu por la personaj modoj. Temas pri karakterizaj formoj, kiuj estas konendaj pro ilia fundamenteco.

La participaj formoj do estas rilataj al la verbodirekto :

### 1) La aktiva participo [tegisa trenda]

Ĉiuj verboj havas la aktivan participon.
Oni konstruu la aktivan participon sur la verba formo kun aldono de la fina sufikso « ***-s*** ».

| Ekz. : | ***ROJU*** (defendi) | | ***DOLE*** (vendi) | |
|---|---|---|---|---|
| | ***rojus*** | (defendanta) | ***doles*** | (vendanta) |
| | ***rojuyus*** | (defendinta) | ***doleyes*** | (vendinta) |
| | ***rojutus*** | (defendonta) | ***doletes*** | (vendonta) |

La karakteriza sufikso « ***-s*** », kiu estas kvazaŭfinaĵo, ĉiam estu lokita fine, eventuale kun la sonharmonia vokalo.

La aktiva participo povas esti uzata en la tri tensoj, en la kvar statoj, la dek du aspektoj kaj la dek modospecoj (kaj ĉiuj submodospecoj). Tamen ĝi havas nur tiun solan karakterizan formon anstataŭ la sep personojn.

### 2) La pasiva participo [levgasa trenda]

Nur la transitivaj verboj (do, kiuj povas havi komplementon pere de la prepozicio « *va* ») havas la pasivan participon.

Oni konstruu la pasivan participon sur la radikalo de la verbo, kun aldono de la fina sufikso « ***-n*** ».

| Ekz. : | ***ROJU*** (defendi) | | ***DOLE*** (vendi) | |
|---|---|---|---|---|
| | ***rojun*** | (defendata) | ***dolen*** | (vendata) |
| | ***rojuyun*** | (defendita) | ***doleyen*** | (vendita) |
| | ***rojutun*** | (defendota) | ***doleten*** | (vendota) |

La karakteriza sufikso « ***-n*** », kiu estas kvazaŭfinaĵo, ĉiam estu lokita fine, eventuale kun la sonharmonia vokalo.

La pasiva participo povas esti uzata en la tri tensoj, en la kvar statoj, la dek du aspektoj kaj la dek modospecoj (kaj ĉiuj submodospecoj). Tamen ĝi havas nur tiun solan karakterizan formon anstataŭ la sep personojn.

### 3) La komplementa participo [tuvarasa trenda]

Nur la duoble transitivaj verboj (do, kiuj povas havi kaj komplementon pere de la prepozicio « *va* » kaj duan esencan komplementon pere de la prepozicio « *gu* » (aŭ per la alternativaj prepozicioj, kiel « *pu* », « *bas* », « *ika* » ktp.)) havas la komplementan participon.

Oni konstruu la komplementan participon sur la radikalo de la verbo, kun aldono de la fina sufikso « ***-mb*** ».

Ekz. :

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***ZILI*** (doni) | | ***GREWA*** (danki) | |
| ***zilimb*** | (al, kiu oni donas) | ***grewamb*** | (pro, kio oni dankas) |
| ***ziliyimb*** | (al, kiu oni donis) | ***grewayamb*** | (pro, kio oni dankis) |
| ***zilitimb*** | (al, kiu oni donos) | ***grewatamb*** | (pro, kio oni dankos) |

La karakteriza sufikso « ***-mb*** », kiu estas kvazaŭfinaĵo, ĉiam estu lokita fine, eventuale kun la sonharmonia vokalo.

La komplementa participo povas esti uzata en la tri tensoj, en la kvar statoj, la dek du aspektoj kaj la dek modospecoj (kaj ĉiuj submodospecoj). Tamen ĝi havas nur tiun solan karakterizan formon anstataŭ la sep personojn.

**4) La refleksivo** [katacesa trenda]

Nur la transitivaj verboj (do, kiuj povas havi komplementon pere de la prepozicio « *va* ») kun refleksiva senco havas la refleksivon.

Oni konstruu la refleksivon sur la aktiva participo kun aldono de la refleksiva formo « ***va int*** » aŭ la dua formo « ***va dil int*** » en situacio de participa komplemento.

Ekz. :

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***WI*** (vidi) | | ***TCATE*** (lavi) | |
| ***va int wis*** | (vidanta sin) | ***va int tcates*** | (lavanta sin) |
| ***va int wiyis*** | (vidinta sin) | ***va int tcateyes*** | (lavinta sin) |
| ***va int witis*** | (vidonta sin) | ***va int tcatetes*** | (lavonta sin) |

La refleksivo povas esti uzata en la tri tensoj, en la kvar statoj, la dek du aspektoj kaj la dek modospecoj (kaj ĉiuj submodospecoj). Tamen ĝi havas nur tiun solan karakterizan formon anstataŭ la sep personojn.

**5) La reciprokeca participo** [waldafa trenda]

Nur la transitivaj verboj (do, kiuj povas havi komplementon pere de la prepozicio « *va* »), kiuj povas havi sencon de reciprokeco havas la reciprokecan participon.

Oni konstruu la reciprokecan participon sur la aktiva participo kun aldono de la refleksiva formo « ***va sint*** ».

Ekz. : ***DISUKE*** (rigardi)

| | |
|---|---|
| ***va sint disukes*** | (rigardanta unu la alian) |
| ***va sint disukeyes*** | (rigardinta unu la alian) |
| ***va sint disuketes*** | (rigardonta unu la alian) |

La reciprokeca participo povas esti uzata en la tri tensoj, en la kvar statoj, la dek du aspektoj kaj la dek modospecoj (kaj ĉiuj submodospecoj). Tamen ĝi havas nur tiun solan karakterizan formon anstataŭ la sep personojn kaj povas ekzisti nur plurale.

**6) Moda uzo de la participoj** [unera va trendacave]

En Kotavao, la participo estas ofte uzata. Ĝi permesas enkonduki rilativajn frazpartojn.

La participo estas akordigenda sonharmonie kun la kvalifikata nomo aŭ pronomo. La participo uzata mode estu lokata, krom en certaj stiloj (inversigo), post la sintagmo, kiu estas la subjekto.

Ekz. : ***korik estus va beg tir nik*** (la persono, kiu manĝas panon estas amiko)
***Rojusik aytayan bak dilfura batlize di zo kotawayad*** (la defendintoj mortigitaj dum la batalo estis enterigotaj ĉi tie)
***Yikya pitisa tir listafa*** (la junulino, kiu venos estas bela)
***Maria zilimba (va lupa) tir listaf yik*** (Maria al, kiu oni donas (kukon) estas junulo)

***Va bat prejayamb aal albapá*** (mi ŝategas ĉi tiun arbon al, kiu mi murmuris)

Kiam la participo estas uzata en apozicio, tiam ĝi havas valoron de ekspliko :

Ekz. : ***karvol, disukes va pisik, otcer*** (la kato, rigardanta la venantojn, fuĝas)
***Zveri, koribayani, me tir nuyafi*** (la birdo, enkaĝigita, ne estas libera)
***Emudera, grewamba, tiyir lacapafa*** (la akcepto, pro, kiu mi dankas, estis karesemega)

**7) La gerondivaj konstruoj** [trendamuge]

Oni nomas: «gerondivaj konstruoj» la modajn uzojn de la participajn adverbojn.
La gerondivaj konstruoj servas por esprimi prezence la samtempeco de ago rilate al alia kaj nepre rilatas al la sama subjekto ol la ĉefa propozicio.

La aktiva gerondivo uzas ***la aktivajn participajn adverbojn***.

Ekz. : ***estuson pulvir*** (ĝi manĝante parolas)
***ranyeson kenibec*** (vi starante dormas)

La pasiva gerondivo uzas ***la pasivajn participajn adverbojn***.

Ekz. : ***dizvenon dankar*** (estante observata ĝi kantas)
***tipokenon belil*** (estante tondata vi legas)

La komplementa gerondivo uzas ***la komplementajn participajn adverbojn***.

Ekz. : ***belimbon va rupa komodel*** (dum oni legas al vi fabelon, vi ekdormas)
***dratcembon gu ervolia va patecta bower*** (malgraŭ minaco per armeo kontraŭ ĝi, ĝi regas la landon)

La preterita gerondivo enkondukas nocion de kaŭzo. Male, la futura gerondivo estas uzata por esprimi nocion de celo.

Ekz. : ***gildayason va inafa xialara rolaní*** (kompreninte ĝiajn celojn mi povas iri) [preterito, kaŭzo]
***va bata neva gildatason va gaderopa belí*** (mi legas ĉi tiun libron por kompreni la politikon) [futuro, celo]

## I : Sintezo pri la verba koncepto [vixaks icde grayaf stravok]

En la supraj paragrafoj, ni vidis ĉiujn elementojn, kiuj konstituas Kotavaan verbon, kaj ĉiujn ĝiajn potencajn formojn.
Memorindas, ke, krom la modo participo sufiĉe specifa, la verba sistemo estas logikega kaj absolute sen escepto.

« ***rojú*** » (mi defendas), « ***tí*** » (mi estas), « ***dolé*** » (mi vendas) aŭ « ***estú*** » (mi manĝas) estas la minimumaj formoj, kiujn oni povas renkonti. Ili estas konstituitaj de ĉiuj implicaĵoj kaj de la verba radikalo, nome:

- *verba parolo Deklaro*
- *modo Indikativo*
- *tenso Prezenco*
- *stato Neforta aserto*
- *aspecto Simpla daŭrado*
- *modospeco Efektiva*
- *verbodirekto Aktiva*
- *1a Persono de la singularo*
- *Radikalo de la verbo*

Male, verba formo, kiel « ***(in) nuve en al zo rostayar !*** » (ĝi ja estus povinta esti gvidita!) enhavas

neniun implicaĵon, krom sian indikativan modon. Oni analizu ĝin tiel:

***(in) nuve en al zo ro STA ya r !***

| | |
|---|---|
| ***(in)*** ☞ | persona pronomo (nedeviga) |
| ***nuve*** ☞ | adv. partik. de specifaĵo *Fiktivo* |
| ***en*** ☞ | adv. partik. de stato *Aserto* |
| ***al*** ☞ | partik. de *Antaŭeca aspekto* |
| ***zo*** ☞ | partik. de *Pasiva* verbodirekto |
| ***ro*** ☞ | prefik. de *Ebleca* modospeco |
| ***STA*** ☞ | **RADIKALO** de la verbo |
| ***ya*** ☞ | sufikso de tenso *Preterito* |
| ***r*** ☞ | finaĵo de *3a Pers. de singularo* |
| ***!*** ☞ | interpunkcio de verba parolo *Eksklamacio* |

Videblas, ke ekzistas ia ordo en tiu aro de elementoj:

- 0 : persona pronomo (nedeviga)
- 0 (dua 0) : specifaĵo (forigebla parto)

- 1 : stato
- 2 : aspekto
- 3 : verbodirekto
- 4 : modospeco (aŭ submodospeco)
- 5 : RADIKALO
  [dua 5 : ĝenerala sufikso → pligrandigita radikalo]
- 6 : tenso
- 7 : persono
- 8 : modo
- 9 : verba parolo (interpunkcio)

## J : Transitivaj, duoble transitivaj kaj netransitivaj verboj [tanmukodaf grayeem isu tolmukodaf isu mukodiskaf]

En Kotavao, ekzistas transitivaj verboj, duoble transitivaj verboj kaj netransitivaj verboj. Tiuj lastaj ne fundamente distingiĝas per siaj formoj, rilate al la unuaj, krom se ili havas netransitivigantan sufikson.

### 1) La unuoble transitivaj verboj [tanmukodaf gray]

Oni nomas transitivaj la verbojn, kiuj povas havi objektan komplementon kaj formiĝas do per la prepozicio « ***va*** ». Inter ili, la unuoble transitivaj estas la plej oftaj kaj rilatas al nur unu objekto, krom eventualaj cirkonstancaj komplementoj.

Surbaze de netransitiva verbo, eblas krei unuoble transitivan verbon en faktitivo, pere de la specifa sufikso « ***si*** », kiu aldoniĝas al la radikalo (reale, temas pri la aktiva participo kun ***–i***) kaj kreas novan radikalon aŭtonomian.

Ekz. :
- ***KENIBE*** (dormi) → ***KENIBESI*** (dormigi)
- ***LUBE*** (fali) → ***LUBESI*** (faligi)
- ***AELE*** (malsati) → ***AELESI*** (malsatigi)

Kompreneble, tiun novan radikalon oni konsideru por konstrui ĉiujn verbajn formojn, kiuj estas pritraktitaj supre.

### 2) La duoble transitivaj verboj [tolmukodaf gray]

Oni nomas duoble transitivaj la transitivajn verbojn, kiuj normale povas havi du esencajn objektojn por esprimi siajn kompletecojn. Ilia unua objekta komplemento uzas la transitivan prepozicion « ***va*** », tamen la dua estas enkondukata pere de la komplementa prepozicio « ***gu*** ». Jen verboj tiaj: « ***zilí*** » (doni), « ***grewá*** » (danki), « ***tiolté*** » (ekstrakti), ktp.

**3) La netransitivaj verboj** [mukodiskaf gray]

Ili havas la plenan ideon de la ago en si mem, kaj do nek bezonas nek akceptas objektan komplementon.

La nederivitaj netransitivaj verboj fine estas sufiĉe malmultaj, sed ne distingiĝas formale de la transitivaj verboj. Kvankam ili ofte finiĝas per « ***-e*** » aŭ « ***-u*** ».

La derivitaj netransitivaj verboj devenas de transitivaj verboj kun specifa sufikso. Oni netransitivigas transitivan verbon pere de la sufikso « ***-wé*** », kiu venu sur la radikalon por formi novan verban radikalon.

Ekz. : ***BETA*** (ŝanĝi) → ***BETAWE*** (ŝanĝiĝi)
***TUKERA*** (ruĝigi) → ***TUKERAWE*** (ruĝiĝi)
***ESTU*** (manĝi) → ***ESTUWE*** (sin nutri)

Kompreneble, tiun novan radikalon oni konsideru por konstrui ĉiujn verbajn formojn, kiuj estas pritraktitaj supre.

Tamen, ene de la kategorio de la netransitivaj verboj, ekzistas verboj, kiuj, pro siaj sencoj, povas funkcii en rilato kun komplemento. Temas esence pri verboj, kiuj regas komplementon, ĉu de valoro, ĉu de kaŭzo, ĉu de loko.

**a) La netransitivaj verboj kun komplemento de valoro** [mukodiskaf gray dem vodarafa tuvaraxa]

Ili estas proksimume kvindek. Temas pri verboj, kiuj regas komplementon de valoro, de mezuro aŭ simile, enkondukitan per la prepozicio « ***vas*** ». Kelkaj ekzemploj: « *dané* » (esti pro), « *nité* » (konsisti en), « *pasú* » (aparteni al), « *ruldá* » (enhavi), kaj tiel plu.

**b) La netransitivaj verboj kun komplemento de kaŭzo** [mukodiskaf gray dem nekisa tuvaraxa]

Ili estas proksimume tridek. Temas pri verboj, kiuj estas ofte kun komplemento de kaŭzo, enkondukata per la prepozicio « ***nope*** ». Kelkaj ekzemploj: « *ardeotá* » (fari mispaŝon), « *vagrablé* » (bruske moviĝi pro subita timo), « *zertú* » (fali aŭ simile pro ne elteno), ktp.

**c) La netransitivaj verboj kun komplemento de loko** [mukodiskaf gray dem lizukafa tuvaraxa]

Ili estas proksimume dudek. Temas pri verboj, kiuj bezonas komplementon de loko por esti plene esprimata, enkondukata do per prepozicio de loko, kiel « ***koe*** » aŭ alia. Kelkaj ekzemploj: « *irubá* » (loĝi), « *dayké* » (ripozi, kuŝi), « *jonvielé* » (troviĝi dum tagoj), ktp.

## Ĵ : La neoriginalaj verboj [ilkomiskaf gray]

Ekzistas en Kotavao eta kvanto da neoriginalaj verboj.

La neoriginalaj verboj estas neplenaj verboj. Ili ekzistas nur en kvin modospecoj (efektiva, ebleca, videbleca, kutimeca, absoluteca), en la aktiva verbodirekto, en la kvar modoj kaj en la tri tensoj, en la kvar statoj kaj en la dek du aspektoj, sed nur en la tria persono de la singularo sen pronomo nek videbla subjekto (la nedirata subjekto de tiaj verboj estas la ĝenerala pronomo « **coba** »).

La neoriginalaj verboj estas de la kategorio de la verboj, kiuj esprimas atmosferan aŭ naturan staton. En la vortaroj, ili do prezentiĝas en la tria persono de la singularo. Ili estas :

| | |
|---|---|
| ***abdar*** | esti malseke |
| ***afizar*** | esti tage |
| ***aftar*** | esti lume |
| ***awaltar*** | esti sune, sunas |

*Sekvo : rigardu Aneksaĵojn (aneksaĵo C.1) por la plena listo de la neoriginalaj verboj de atmosfera aŭ natura stato*

## K : La stataj verboj [sokaf gray]

Tiuj verboj, netransitivaj, enkondukas kvalifikan atributon.
Ekzistas nur eta kvanto de ili en Kotavao. Ili estas:

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***bevulá*** | ŝajni, kiel | ***rulé*** | sin trovi, eksperti ian senton pri si |
| ***folkí*** | sin kredi, sin imagi, kiel | ***sipsé*** | igi sin |
| ***ilpí*** | ĉesi esti | ***tí*** | esti |
| ***kadá*** | transformiĝi al | ***trená*** | plu esti |
| ***linulá*** | konduti kvazaŭ esti | ***vanpí*** | fariĝi |
| ***nijú*** | sin revelacii, kiel | ***vanyé*** | konduti, kiel |
| ***nuvelá*** | ŝajni | ***ví*** | farti |
| ***nuvelé*** | sin ŝajnigi | ***vurolé*** | laŭ normalo devi |
| ***pesté*** | senti sin | ***zavzá*** | resti |

## L : La sensaj verboj [pestaleraf gray]

Tiuj verboj estas netransitivaj. Ili estas derivitaj de substantivo kaj havas radikalon kun karakteriza finaĵo « ***e*** ». Certaj el ili povas regi komplementon de kaŭzo enkondukata per la prepozicio « ***nope*** ». Ili estas proksimume 300. La ĉefaj el ili estas:

| | |
|---|---|
| ***aelé*** | malsati |
| ***akolé*** | malsani |
| ***aundé*** | havi disreviĝon malfacile konfeseblan |

*Sekvo : rigardu Aneksaĵojn (aneksaĵo C.2) por neplena listo de la sensaj verboj*

## M : La movaj verboj [liziweraf gray]

Ekzistas en Kotavao certa kvanto da verboj, kiuj povas esti en kompono kun ***iu ajn prepozicio pri loko*** (kaj ĉi tiu je iu ajn formo). *Rigardu Aneksaĵojn (aneksaĵo A.3) por la listo de tiuj prepozicioj.*

Tiuj verboj, nome *movaj verboj*, fariĝas tiu-kaze transitivaj kaj konstruas siajn komplementojn per la prepozicio « ***va*** ». La lokeca ideo tute restas ene de la prefiksa prepozicio, kiu fariĝas parto de la radikalo.

La verboj de personaj movoj estas:

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***grablú*** | moviĝi per saltoj | ***pujé*** | naĝi |
| ***kildé*** | gliti | ***rumkú*** | moviĝi sen tuŝi la grundon |
| ***krafú*** | ruliĝi | ***talá*** | flugi |
| ***lakí*** | iri (pere de besto) | ***terigé*** | rampi |
| ***laní*** | iri (piede) | ***vulté*** | kuri |
| ***lapí*** | iri (pere de veturilo) | ***welvú*** | moviĝi per lertaj saltoj |

Ekzemploj de verbaj komponoj kun verboj de personaj movoj:

*va mona **ko**laní* (mi eniras la domon)
*va widava **rem**talar* (ĝi flugante trairas la urbon)
***mal**vultel* (vi kurante foriras)

Ekzistas ankaŭ tri verboj de nepersonaj movoj. Normale, tiuj verboj estas nur por naturaj aŭ abstraktaj fenomenoj aŭ por nemateriaj estaĵoj kaj, krom eventuale en metaforo, ne povas signifi movon de individuoj. Ili estas:

***ní*** moviĝi konkretaj fluoj, materioj, likvoj, aŭtonomiaj objektoj (ekz. akvo, lafo, polvo,

tero, koto, glacio, vegetaĵo, roko, sango, sevo, stelo, planedo, veturilo, ktp.)

***stí*** moviĝi nepalpeblaj fluoj, ondoj, nevideblaj objektoj (ekz. elektro, radio, ondo, mikroboj, energio, lumo, vento, aero, gaso, bruo, ktp.)

***fí*** moviĝi, iri abstraktaj konceptoj, nemateriaj estaĵoj (ekz. tempo, penso, ideo, diaĵo, ktp.)

Ekzemploj de verbaj komponoj kun verboj de nepersonaj movoj:

*lorik va swava **ko**fir* (la dio eniras la spirito(j)n)
*bixe va piluda **div**nir* (la sablo fluas el la strando)
*suka va ewala **rem**stir* (la vento trairas la insulon)

# Ĉapitro IV : LA DETERMINANTOJ [gotuxa]

La kategorio de la determinantoj estas tre grava en Kotavao. Estas ja grandparte el ili, ke la viva lingvo estas konstruata de la Kotavaistoj.

Ni metas en la kategorion de la determinantoj ĉiujn vortojn, kiuj servas al kvalifikado, al determinado aŭ al aktualigado de substantivo (aŭ pronomo). Tamen, ili povas ankaŭ havi aŭtonomian ekziston kaj sintaksan uzon aŭtonomian (*rigardu ĉapitron XI La Absoluta Aserto*). La determinantoj estas ordometitaj en du fundamentajn kategoriojn:

- la adjektivoj (kvalifikaj adjektivoj kaj verbaj adjektivoj)
- la aktualigiloj aŭ determinantoj (artikoloj, demonstrativoj, nedefinitaj, numeralaj, ktp.)

Determinanto nepre akordiĝas sonharmonie kun la substantivo aŭ la pronomo, kiun ĝi kvalifikas kaj, ĝenerale, estas lokata plej proksime antaŭ ĝi en la sintagmo de la frazo.

## A : La adjektivoj [sorela]

La adjektivoj estas vortoj, kiuj kvalifikas substantivon aŭ pronomon. En Kotavao, la verbaj adjektivoj distingiĝas de la kvalifikaj adjektivoj.

### 1) La kvalifikaj adjektivoj [duvusa sorela]

Ekzistas originalaj adjektivoj (aŭ neelvenantaj) kaj elvenantaj adjektivoj.

#### a) La originalaj kvalifikaj adjektivoj [xantafa duvusa sorela]

Ili apartenas al la baza vortaro. Ili estas multaj, sed tute identigaj danke al sia karakteriza finaĵo ekskluziva. Tiu estas « ***-f*** », nepre kun vokalo ĵus antaŭe (tiu vokalo estas, en 90%, « ***a*** ».
La radikalo de la adjektivo, esenca nocio en Kotavao, ne enhavas do la karakterizan finaĵon « ***-af*** », aŭ « ***-f*** » simple, se la vokalo, kiu troviĝas ĵus antaŭ la sufikso ne estas « a ».

Ekz. : la radikalo de ***kiewaf*** (bona) → ***KIEW***
***solwif*** (distinga) → ***SOLWI***
***laof*** (forta, kuraĝa) → ***LAO***
***klaaf*** (aĝa) → ***KLA***

Laŭ la regulo de la sonharmonia sistemo, do troveblas ekzemple:
*listaf**a** mona* (bela domo)
*batakaf**i** zveri* (blanka birdo)
*sumef**o** vo* (la malproksima naska lando)
*opaf**u** sfianu* (akra reŭmato)
*afif bitej* (luma stelo)

**b) La kvalifikaj adjektivoj elvenantaj de substantivo, de prepozicio, ktp.** [dantena sorela]

Ĉiuj vortoj, kiuj apartenas, en la morfologia tabulo, al la kategorioj 1 kaj 4 (substantivoj, prepozicioj, ktp.) povas konstrui adjektivojn nomotajn elvenantaj.
Ili formiĝas pere de la adjektiviga sufikso « ***-af*** », rekte sur la radikalo. Se ĉi tiu finiĝas per vokalo alia ol « ***-a*** », la sufikso fariĝas simple « ***-f*** ».

Ekz. : *tawava* (Tero) → *tawav**af*** (tera)
*zubi* (kontrakto) → *zubi**f*** (kontrakta)
*molt* (haveno) → *molt**af*** (havena)
*koe* (en) → *koe**f*** (ena)
*patectoy* (pejzaĝo) → *patectoy**af*** (pejzaĝa)

**2) La verbaj adjektivoj** [grayafa sorela]

Fakte temas pri la participoj uzataj, kiel adjektivoj. Ĉiuj participoj povas havi tiun uzadon.
Oni do renkontas verbajn adjektivojn aktivajn (sufikso « ***-s*** »), kun prezenca aŭ preterita aŭ futura valoro, verbajn adjektivojn pasivajn (sufikso « ***-n*** ») kaj verbajn adjektivojn komplementajn (sufikso « ***-mb*** »). *Rigardu ĉapitron III § Ĥ : la participo.*

**3) La gradoj de adjektivo** [soreleka]

Oni nomas gradoj de adjektivo la komparvortojn kaj la superlativon.

**a) La komparvortoj** [dolunesa soreleka]

Ĉiuj kvalifikaj adjektivoj kaj la verbaj povas formi komparvortojn.
Ekzistas tri specoj de komparvortoj: ***plieca***, ***egaleca***, ***malplieca***. La komparvortoj konstruiĝas per prefiksoj:

- plieco : ***lo-*** (***lod-*** por la adjektivoj, kiuj komenciĝas per vokalo)
- egaleco : ***li-*** (***lid-*** por la adjektivoj, kiuj komenciĝas per vokalo)
- malplieco : ***le-*** (***led-*** por la adjektivoj, kiuj komenciĝas per vokalo)

Ekz. : *mantaf* (larĝa) → ***lo**mantaf* (pli larĝa)
→ ***li**mantaf* (egale larĝa)
→ ***le**mantaf* (malpli larĝa)

*argan* (enuigata) → ***lod**argan* (pli enuigata)
→ ***lid**argan* (egale enuigata)
→ ***led**argan* (malpli enuigata)

Cetere, eblas aldoni nocion de progresiveco al la komparvortoj, per duobligo de la kompara prefikso.

Ekz. : *mantaf* (larĝa) → ***lolo**mantaf* (pli kaj pli larĝa)
→ ***lele**mantaf* (malpli kaj malpli larĝa)

*argan* (enuigata) → ***lolod**argan* (pli kaj pli enuigata)
→ ***leled**argan* (malpli kaj malpli enuigata)

Por ligi al la komparata afero ĝian komparatan komplementon, ni uzu la specialan konjunkcion « ***dam*** » (ol).

Ekz. : *Karen tir lolistaf **dam** Staren* (Kareno estas pli bela ol Stareno)

**b) La superlativo** [vamoefa soreleka]

La superlativo fakte estas nur dua formo de la komparvortoj.
Ni konstruu ĝin per la komparaj adjektivoj kun la difinita artikolo lokita plej proksime antaŭe. Logike, la egaleca superlativo ne ekzistas, kvankam ĝia senca neebleco ne estus

nepra.

Ekz. : ***tel lo**mantaf* (la plej larĝa)
***tel le**mantaf* (la malplej larĝa)

La komplemento de la superlativo estu enkondukata per la prepozicio « ***ke*** » (de).

Ekz. : *Karen tir tel lolistaf **ke** pula* (Kareno estas la plej bela en la klaso)

**4) La komplementoj de kvalifika adjektivo** [duvussorelafa tuvaraxa]

Ĉiu adjektivo povas ricevi, sub la kondiĉo de senca eblo, komplementon. Ni povas do trovi subordigitajn propoziciajn komplementojn, enkondukitajn per diversaj konjunkcioj aŭ konjunkciaj adverboj. Ni eĉ povas trovi nomajn (aŭ pronomajn) komplementojn. La verbaj adjektivoj (participoj) sekvas verban logikon kaj havas do sian propran funkcimanieron (*rigardu ĉapitron III § Ĥ : la participo*). Tamen, pri la kvalifikaj adjektivoj, la reguloj kaj ebloj pri noma (aŭ pronoma) komplemento estas, kiel ĉi-sube:

**a) La ordinara komplemento** [unaykafa tuvaraxa]

La ordinara komplemento de kvalifika adjektivo estas enkondikata per la universala prepozicio speciala « ***gu*** »:

Ekz. : *Anna tir kerafa **gu** vola* (Anna estas ruĝa **je** vizaĝo)
*Muktu tiyir kotrafu **gu** lava* (La sitelo estis plena **je** akvo)
*In tir luridaf **gu** utiura* (Ĝi estas ema praktiki sporton)
*Bat okol tir cuisaf **gu** lakira* (Ĉi tiu ĉevalo estas belega **je** la rajdo)
*Orka tir kuvafa **gu** bitonik* (La kunteksto estas favora **por** la ambiciuloj)

**b) La komplemento de simileco** [tuoltavasa tuvaraxa]

La komplemento de simileco de kvalifika adjektivo estas enkondukata per la speciala konjunkcio « ***dum*** », kiu havas ĉi tie valoron de speciala prepozicio:

Ekz. : *Anna tir kerafa **dum** lueze* (Anna estas ruĝa, **kiel** tomato)
*Bonta tiyir kotrafa **dum** ato* (La ĉambro estis plena, **kiel** ovo)

**c) La komplemento de malsimileco** [tuvololtavasa tuvaraxa]

La komplemento de malsimileco de kvalifika adjektivo estas enkondukata per la speciala konjunkcio « ***voldum*** », kiu havas ĉi tie valoron de speciala prepozicio:

Ekz. : *Anna tir akolesafa **voldum** galik* (Anna estas (ĉiam) malsana, **male al** sanulo)
*Bonta tiyir vlardafa **voldum** kiewatca* (La ĉambro estis malplena, **male al** sukceso)

**d) La komplemento de mezuro** [sabesa tuvaraxa]

Certaj kvalifikaj adjektivoj povas havi partikularan komplementon, kiu aldonos nocion de mezuro aŭ simile. Ni enkonduku ĉi tiun komplementon per la speciala prepozicio « ***vas*** »:

Ekz. : *Usuk ke Anna tir abrotcaf vas 50 decemeametre* (La hararo de Anna havas, kiel
longeco 50 centimetrojn)
*Bata bonta tir ontinafa **vas** loon 10 m-* (Tiu ĉi ĉambro havas, kiel alteco 10 metrojn)

**e) La kompara komplemento** [dolunesa tuvaraxa]

Kiel pritraktite supre (*§3*), la komplemento de adjektivo en la kompara grado estas enkondukata per la speciala konjunkcio « ***dam*** »:

Ekz. : *Okol sotir lokaliaf **dam** jaftol* (Ĉevalo estas pli rapida **ol** bovo)

**f) La superlativa komplemento** [vamoefa tuvaraxa]

Kiel pritraktite supre (*§3*), la komplemento de adjektivo en la superlativa grado estas enkondukata per la prepozicio « ***ke*** »:

Ekz. : *Cuskol sotir tel lokaliaf sulem **ke** moukoleem* (Gepardo estas la plej rapida besto **el** la tuta aro de la mamuloj)

## B : La aktualigiloj [tunoelaxa]

La aktualigiloj estas determinantoj, kies rolo estas aktualigi aŭ pritrakti ekzempleron de nomo aŭ pronomo. Kiel ĉiuj determinantoj, ili estas regataj de la regulo de la sonharmonia sistemo. Estas klasigitaj, kiel aktualigiloj: la artikoloj, posesivoj, demonstrativoj, la demandilo, eksklamaciilo, la nedifinitaj determinantoj kaj la numeralaj.

### 1) La artikolaj determinantoj [kordafa tunoelaxa]

En Kotavao, la artikoloj estas konsiderataj, kiel determinantoj, proksimaj de la demonstrativoj. Ilia uzo tute ne estas deviga, krom en certaj precizaj cirkonstancoj. Tiel la difinita artikolo devas esti uzata por formi superlativon kaj foje posesivojn. Tamen, la uzo de la difinita artikolo estas limigita.

La plejeca artikolo estas specifa al Kotavao. Ĝi estas sufiĉe malofta, sed havas fortan esprimon. Ĝi celas roli, kiel ekstrema superlativo por pritrakti unikaĵon, kiu estas ununura en sia rango.

La du lastaj artikoloj estu uzataj nur en tre precizaj situacioj de kunigoj de diversaj agantoj inter ĉefa kaj subordigita propozicio aŭ participa aŭ gerondiva komplemento.

| | |
|---|---|
| ***tel*** | la : difinita artikolo |
| ***tan*** | iu, iu el la : nedifinita artikolo* |
| ***an*** | la plej el la plej, LA : artikolo de ekstrema superlativo |
| ***dal*** | [temas, en subordigita aŭ participa propozicio aŭ gerondiva frazparto pri la subjekto de la principa frazparto] |
| ***dil*** | [temas, en subordigita aŭ participa propozicio aŭ gerondiva frazparto pri la komplemento de la principa frazparto] |

### 2) La posesivaj determinantoj [dikirafa tunoelaxa]

La posesivaj determinantoj estas formitaj pere de la personaj pronomoj, al kiuj oni aldonas la karakterizan sufikson « ***-af*** ». Ili estas:

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***jinaf*** | mia, miaj | ***minaf*** | nia, niaj (inkluzive) |
| ***rinaf*** | via, cia, viaj, ciaj | ***winaf*** | via, viaj |
| ***inaf*** | lia, ŝia, ĝia, liaj, ŝiaj, ĝiaj | ***sinaf*** | ilia, iliaj |
| | | ***cinaf*** | nia, niaj (ekskluzive) |

Plie, ekzistaj du aliaj posesivaj determinantoj:

– posesiva determinanto refleksiva: « ***intaf*** », veninta de la persona pronomo refleksiva. Ĝi faras duoblan uzon, kun la 1a kaj 2a personoj de la singularo, sed, en la 3a persono de la singularo, ĝi nepre estas rilata al la subjekto, kvankam « *inaf* » koncernas iun aŭ ion alian. Plurale, ĝi rilatas al ĉiu aparta individuo (en la tria de la pluralo laŭ la logiko de ĉiu el la subjektoj, tie, kie « *sinaf* » koncernas iujn aŭ aferojn aliajn).

Ni povas ankaŭ renkonti la duajn formojn « ***dal intaf*** » aŭ « ***dil intaf*** », kiuj permesas distingi sen ambigueco la verajn rilatatojn en kuntekstoj kun pluraj diversaj agantoj de frazo aŭ kun participa frazparto aŭ kompleksa gerondiva frazparto.

– posesiva determinanto reciprokeca: « ***sintaf*** », veninta de la persona pronomo reciprokeca. Ĝi nepre rilatas al la plurala subjekto kolektive konsiderata.

**3) La demonstrativaj determinantoj** [danedisa tunoelaxa]

Ili estas tri:

| | |
|---|---|
| ***bat*** | ĉi tiu, senco de proksimeco, de precizeco ; la unua (el 2) |
| ***ban*** | tiu, senco de malproksimeco ; la alia, la lasta (el 2) |
| ***mil*** | sama, la sama, tiu sama (nocio de identeco) |

En enumeracio, opono, duela nocio, « ***bat*** » estu uzata, kiel unua vorto kaj « ***ban*** », kiel dua.

**4) La demandaj determinantoj rektaj** [koerusa tunoelaxa]

Ili estas tri:

| | |
|---|---|
| ***tok ?*** | kiu? (ĝenerala demandilo) |
| ***tokoy ?*** | kiom da? (nombrado)** |
| ***tokeaf ?*** | kioma? (rango, vico)** |

**5) La eksklamacia determinanto** [divierafa tunoelaxa]

Ĝi estas nura. Temas pri:

| | |
|---|---|
| ***man !*** | kia! |

**6) La nedifinitaj determinantoj** [metentuna tunoelaxa]

Ili estas 22*. Ilia formo estas la radikalo (do ne konfuzu kun la kvalifikaj adjektivoj «plenaj», kiuj estas elvenintaj, sed, kiuj enhavas sencan valoron aŭtonomian). Ili evidente estu regataj per la sonharmonia sistemo. Multaj el ili estas kvalifikaj determinantoj.

**a) Nedifinitaj determinantoj de kvanto**

| | | |
|---|---|---|
| ***abic*** | malmulte da | kvanta determinanto de eta nombro [plurala senco / partitiva] |
| ***konak*** | pluraj, kelkaj | kvanta deter-o de meza nombro [plurala senco / partitiva] |
| ***jontik*** | multe da | kvanta deter-o de granda nombro [plurala senco / partitiva] |
| ***dik*** | nesufiĉe da | kvanta deter-o de nesufiĉa nombro [plurala senco / partitiva] |
| ***um*** | sufiĉe da | kvanta deter-o de sufiĉa nombro [plurala senco / partitiva] |
| ***slik*** | tro da | kvanta deter-o de troa nombro [plurala senco / partitiva] |
| ***vug*** | preskaŭ neniom da | kvanta deter-o de minimuma nombro [plurala senco / partitiva] |
| ***cug*** | preskaŭ ĉiom da | kvanta deter-o de maksimuma nombro [plurala senco / partitiva] |
| ***le*** | malplimulto el | kvanta deter-o de malplimulto [plurala senco / partitiva] |
| ***li*** | la duono el; ĝuste tiom da | kvanta deter-o de egaleco [plurala senco / partitiva] |
| ***lo*** | la plimulto el | kvanta deter-o de plimulto [plurala senco / partitiva] |
| ***dat*** | nekalkulebla nombro da | kvanta deter-o de nefinia grandeco [plurala senco / partitiva]** |
| ***mat*** | infinitezima nombro da | kvanta deter-o de nefinia malgrandeco [plurala senco / partitiva]** |

**b) Aliaj determinantoj nedifinitaj**

| | | |
|---|---|---|
| ***ar*** | alia | nedifinita determinanto de alieco |
| ***kot*** | ĉiu, ĉiuj | nedif-a deter-o kolektiva distribua |
| ***mek*** | neniu | nedif-a deter-o negacia simpla** |
| ***mel*** | absolute neniu | nedif-a deter-o negacia absoluta** |
| ***kon*** | kelka | nedif-a deter-o unuopa |
| ***bet*** | iu ajn, ia ajn | nedif-a deter-o nediferencigita |
| ***lan*** | certa | nedif-a deter-o diferencigita |

| | | |
|---|---|---|
| ***tec*** | speco de, kiel | nedif-a deter-o de speco** |
| ***yon*** | …-j, kelkaj | nedif-a deter-o de pluralo [plurala senco] |

** Rimarko : la difinita artikolo tan povas esti konsiderata, eĉ kiel vera nedifinita artikolo, kiu estus de tiu ĉi lasta kategorio ĉi-supre. Tamen, ĉar ĝi ne apartenas al la listo de la komponantoj, kiuj povas partopreni la pronomajn aŭ adverbajn seriojn, krom ĝia malofta uzo, ĝi restas klasigita ekstere.*

*** Rimarko : la plimulto el la nedifinitaj determinantoj servas kiel komponantoj por la serioj de rilativaj pronomoj kaj la adverbaj rilativaj serioj, krom tokoy, tokeaf, dat, mat kaj tec. La determinantoj mek kaj mel samsignife faras la simpligitan formon me-.*

## 7) La kunfandiĝo de la determinantoj [tunoelaxafa joara]

Kotavao permesas kunfandi la determinantoj unu kun la aliaj. Sed tiu eblo plejofte estas uzata kun la nekvantaj nedifinitaj determinantoj, la demonstrativoj kaj la posesivoj.

En kunfandiĝo, la unua vorto estas je sia radikala stato, la eventualaj sonharmoniaj finaĵoj do koncernas nur la duan vorton.

Ekz. : ***bat*** (tiu ĉi) + ***ar*** (alia) = ***batar*** (ĉi tiu alia) → ***batara widava*** (tiu ĉi alia urbo)
***ar*** (alia) + ***yon*** (…-j) = ***aryon*** (aliaj) → ***aryoni zubi*** (aliaj kontraktoj)
***jinaf*** (mia) + ***yon*** (…-j) = ***batar*** (miaj) → ***jinyone blucte*** (miaj vestaĵoj)

## 8) La numeraloj [otuk]

### a) La nocio de radiko

En Kotavao, la numeraloj estas determinantoj. Ekzistas du specoj de numeraloj: la kardinalaj kaj la ordigantaj; sen konsideri la nombrojn multiplikajn aŭ frakciajn, kiuj apartenas al la kategorio de la kvalifikaj adjektivoj.
Ĉiu numeralo havas kardinalan formon kaj ordigantan formon. Tiuj formoj formiĝas sur la sama radikalo. Kotavao havas decimalan sistemon. Konsekvence, ĉiuj numeraloj formiĝas el 21 numeralaj radikoj.

### b) La numeralaj radikoj [otukzae]

Ili estas do 21 (5 el ili por la grandegaj nombroj). El ili, per kompono, ni povas konstrui ĉiujn aliajn nombrojn. Tiuj numeralaj radikoj estas:

| | |
|---|---|
| 1 | ***tan-*** |
| 2 | ***tol-*** |
| 3 | ***bar-*** |
| 4 | ***balem-*** |
| 5 | ***alub-*** |
| 6 | ***tev-*** |
| 7 | ***per-*** |
| 8 | ***anyust-*** |
| 9 | ***lerd-*** |
| 10 | ***san-*** |
| 100 | ***decem-*** |
| 1000 | ***decit-*** |
| 10000 | ***kun-*** |
| 100000 | ***vunt-*** |
| 1000000 | ***celem-*** |
| 1000000000 | ***felem-*** |
| $10^{12}$ | ***tung-*** |
| $10^{15}$ | ***pung-*** |
| $10^{18}$ | ***eung-*** |
| $10^{21}$ | ***zung-*** |
| $10^{24}$ | ***yung-*** |

Taŭgas mencii, ke ekzistas ankaŭ la radiko de la nula nombro, sed ĝi neniam intervenas en la numeralaj komponoj:

0 ***ned-***

## c) La esprimo de la numeraloj [otukafa muxara]

### a. La kardinalaj nombroj [otaf otuk]

La kardinalaj nombroj servas por esprimi kvantojn aŭ por nombri. Ili formiĝas pere de la karakteriza sufikso « ***-oy*** », kiun oni aldonu al la numerala radikalo.

Ekz. : unu = ***tanoy*** (*tan* + *-oy*)
kvar = ***balemoy*** (*balem* + *-oy*)

Kiel ĉiuj determinantoj, la kardinalaj nombroj akordiĝu sonharmonie kun la kvalifikata substantivo aŭ pronomo.

Ekz. : *decemoy aal* (cent arboj)
*aluboy**a** mona* (kvin domoj)
*baroy**e** blucte* (tri vestaĵoj)

### b. La ordigantaj nombroj [tirkaf otuk]

La ordigantaj nombroj servas por esprimi rangon aŭ vicon. Ili formiĝas pere de la karakteriza sufikso « ***-eaf*** », kiun oni aldonu al la numerala radikalo.

Ekz. : unua = ***taneaf*** (*tan* + *-eaf*)
kvara = ***balemeaf*** (*balem* + *-eaf*)

La ordigantaj nombroj, kiel la kardinalaj, akordiĝu sonharmonie kun la kvalifikata substantivo aŭ pronomo.

## ĉ) La komponado de la numeraloj [otukafa ponara]

En Kotavao, krom la 21 bazaj numeralaj radikoj, ĉiuj aliaj numeraloj formiĝu per komponado.

La numerala sistemo estas decimala. Ĉiu nombro troviĝanta maldekstre al decimala numeralo (*san, decem, decit, kun, vunt, celem, felem, ktp.*) multiplikas ĝin, kaj ĉiu nombro troviĝanta dekstre adiciiĝas al ĝi.
En komponita numeralo, nur la lasta vorto ricevas la karakterizan sufikson, kardinalan aŭ ordigantan; la aliaj restas je la radikala stato. La diversaj elementoj estu ligataj per streketoj.

Ekz. : 12 = *san-tol**oy*** (10+2) (aŭ *tan-san-toloy* : 1x10+2) *
20 = *tol-san**oy*** (2x10)
22 = *tol-san-tol**oy*** ((2x10)+2)
458 = *balem-decem-alub-san-anyust**oy*** ((4x100)+(5x10)+8)
345560779 = *bar-decem-balem-san-alub-celem-alub-vunt-tev-kun-per-decem-per-san-lerd**oy***
[(((3x100)+(4x10)+5)x1000000)+(5x100000)+(6x10000)+(7x100)+(7x10)+9]

* En la komponoj, kiuj normale havas, kiel unuan vorton « ***tan*** » (unu), eblas ne meti ĝin, ĉar la decimala radiko, kiu sekvas estas sufiĉe eksplica.
Ekz. : 15 = *tan-san-aluboy* (aŭ *san-aluboy*)
115 = *tan-decem-tan-san-aluboy* (aŭ *decem-san-aluboy*)
1115 = *tan-decit-tan-decem-tan-san-aluboy* (aŭ *decit-decem-san-aluboy*)

La negativaj nombroj uzas la ĝeneralan sufikson « ***vol-*** » sur la numeralo.

Ekz. : -15 = *voltan-san-aluboy* (aŭ *volsan-aluboy*)
-115 = *voltan-decem-tan-san-aluboy* (aŭ *voldecem-san-aluboy*)
-1115 = *voltan-decit-tan-decem-tan-san-aluboy* (aŭ *voldecit-decem-san-aluboy*)

### d) La esprimoj de kalkuloj [otukaf patavaks]

En la operacioj per nombroj, nur la unua vorto (la ĉefa) havu la kardinalan aŭ ordigantan markon. La aliaj elementoj restas je sia radikala stato.

Por esprimi la vorton « = », oni diras: ***dum*** (kiel)
« + » ***do*** (kun, plus)
« - » ***bas*** (el, minus)
« x » ***jon*** (multiplikite per)
« / » ***fuxe*** (dividite per)

Ekz. :
3 + 4 = 7 : *bar**oy** **do** balem- **dum** per**oy***
4 – 3 = 1 : *balem**oy** **bas** bar- **dum** tan**oy***
3 x 4 = 12 : *bar**oy** **jon** balem- **dum** (tan-)san-tol**oy***
9 / 3 = 3 : *lerd**oy** **fuxe** bar- **dum** bar**oy***

Aliaj esprimoj:

Por esprimi la vorton « . », oni diras: ***u*** (decimala komo, sed, Kotavae, temas pri punkto)
« $^n$ » ***ekon gu*** (la (…)a potenco de)
« V » ***zaeon gu*** (je la radiko de)
« % » ***fuxe decem-*** (elcento(j))

Ekz. :
3.7 = *bar**oy** **u** per-* * (aŭ *baroy lumolk **is** peroyi lumki*)
15.601 = ***san-aluboy u tev- ned- tan-***

$3^4$ = *bar**oy** **ekon gu** balem-*
$3V_4$ = *bar**oy** **zaeon gu** balem-*

3% = *bar**oy** **fuxe decem-***
3% el 50 = *baroy fuxe decem- **ke** alub-sanoy*

* *Nur la ĉefa elemento havu la numeralan sufikson.*

### e) La numeralaj afiksoj [otukosta]

Ekzistas en Kotavao kelkaj afiksoj (prefiksoj kaj sufiksoj), kiuj permesas, el numerala radikalo formi diversajn esprimojn rilatajn al nombroj, konservante en la menso, ke kardinala aŭ ordiganta numeralo restas determinanto kaj do povas havi ĉiun afikson de determinanto. (*rigardu malsupre ĉap. X, La afiksoj*).

La specifaj numeralaj afiksoj estas:

| | | |
|---|---|---|
| ***-oy*** | kardinala sufikso | formas determinanton |
| ***-eaf*** | ordiganta sufikso | formas determinanton |
| ***-a*** | kolektiveco | kreas substantivon |
| ***-e*** | numeralaĵo | kreas substantivon |
| ***-da*** | jara periodo | kreas substantivon |
| ***-ka*** | taga periodo | kreas substantivon |
| ***jon-…-af*** | multipliko | formas adjektivon |
| ***fuxe-…-af*** | divido | formas adjektivon |

Ekzemploj de numeralaj esprimoj: ***bar-*** (tri)
***baroy*** (tri)
➥ ***baron*** (tri fojojn)
***bareaf*** (tria)

↪ ***bareaca*** (triono)

↪ ***bareon*** (trie)

***bara*** (triopo)
***bare*** (la numero tri)
***barda*** (trio da jaroj)

↪ ***bardaf*** (tri jarojn aĝa)

↪ ***bardon*** (dum tri jaroj)

***barka*** (trio da tagoj)

↪ ***barkaf*** (tri tagojn aĝa)

↪ ***barkon*** (dum tri tagoj)

***jonbaraf*** (triobla)

↪ ***jonbaron*** (trioble)

***fuxebaraf*** (dividita per tri)

↪ ***fuxebaron*** (dividite per tri)

***barbaron*** (en grupoj de tri, triope)

### C : La epiteta rolo [duwotafa yordara]

La determinanto en la epiteta rolo akordiĝas sonharmonie kun la substantivo aŭ la pronomo al, kiu ĝi rilatas.

Ekz. : ***va listafa mona digir*** (ĝi havas belan domon)
***bat gijaf is listaf aal*** (ĉi tiu granda kaj bela arbo)
***va tane listafe blucte diskir*** (ĝi surportas iun el la belaj vestaĵoj)

La epiteta determinanto estas lokinda ĵus antaŭ la nomon, kiun ĝi kvalifikas.
La epiteta determinanto povas kvalifiki nur unu substantivon samtempe, krom uzo de distribua kuniganta konjunkcio.

### Ĉ : La adjektiva rolo per verbo [sparayafa yordara]

La determinanto lokita pere de verbo akordiĝas sonharmonie kun la substantivo aŭ pronomo, kiun ĝi kvalifikas.

Ekz. : ***bat okol tid listaf*** (ĉi tiuj ĉevaloj estas belaj)
***bate blucte tid listafe*** (ĉi tiuj vestaĵoj estas belaj)

En situacio, kie troviĝus pluraj subjektoj, la sonharmonio okazas sur la lasta vorto, la plej proksima:

Ekz. : ***okolye is okolya tid listafa*** (la ĉevaliĉo kaj la ĉevalino estas belaj)
***bate blucte isu gem tid listaf*** (ĉi tiuj vestaĵoj kaj roboj estas belaj)

La *perverba determinanto nome absoluta* apartenas al la regulo de la aserto. Tio estas la perverba determinanto uzata en absoluteco kaj, kiu rilatas al neniu objekto precize eksplicigita, sed kuntekste evidenta por ĉiuj. Perverba determinanto absoluta ne uzas la atenditan verbon « *tí* » (esti). Sed ĝi ĉiam akordiĝu sonharmonie kun la finaĵo « ***a*** » ĉar ĝi rilatas per subkompreno al pronomo kiel « ***-coba*** ».

Ekz. : tio estas bela = ***batcoba tir listafa***, aŭ simple = ***listafa***
tio estas larĝa = ***batcoba tir mantafa***, aŭ simple = ***mantafa***

# Ĉapitro V : LA PRONOMOJ [ikayolt]

## A : La personaj pronomoj [ilkomaf ikayolt]

Kotavao havas plenan serion da personaj pronomoj.

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1a persono de la singularo | ***jin*** | (***jinya, jinye***) | = mi |
| 2a persono de la singularo | ***rin*** | (***rinya, rinye***) | = vi, ci |
| 3a persono de la singularo | ***in*** | (***inya, inye***) | = li, ŝi, ĝi |
| 1a persono de la pluralo | ***min*** | (***minya, minye***) | = ni (inkluzive) |
| 2a persono de la pluralo | ***win*** | (***winya, winye***) | = vi |
| 3a persono de la pluralo | ***sin*** | (***sinya, sinye***) | = ili |
| 4a persono de la pluralo | ***cin*** | (***cinya, cinye***) | = ni (ekskluzive) |

Kotavao konas ***4an personon de la pluralo***. Tiu persono estas nekonata en la plimulto de la aliaj lingvoj. ***Ĝi estas ekskluziva « ni ».*** En Esperanto, ekzemple, la pronomo "ni" havas du malsimilajn ideojn. En Kotavao, oni renkontas du pronomojn: « ***min*** » kaj « ***cin*** ».
« ***Min*** » havas inkluzivan sencon. Tio signifas, ke la parolanto inkluzivigas la pronomon "ni" je la individuo aŭ individuoj al, kiuj ĝi parolas. Tamen, « ***cin*** » estas ekskluziva: la individuoj al, kiuj oni parolas ne estas priparolataj.

Ekz. : ***min betlize kenibeyet*** (ni dormis ie ajn. La persono(j) al, kiu(j) oni parolas estas priparolata(j): vi kaj mi)
***cin betlize kenibeyev*** (ni dormis ie ajn. La persono(j) al, kiu(j) oni parolas ne estas priparolata(j): ĝi kaj mi)

La personaj pronomoj normale estas neŝanĝeblaj. Tamen, ekzistas du pliaj alternativoj:

a) Kiam oni volas insisti pri la sekso, eblas aldoni al ili la sufiksojn « ***-ya*** » aŭ « ***-ye*** ».

b) La vokala sonharmonia akordiĝo (nur sur « ***in*** » aŭ « ***sin*** ») estas permesata, por harmonii kun la reala subjekto.

Ekz. : ***Perake koe werd terigeyer, mewison va vamoetalasi zveripi. Ini va ine ipeyer*** (la serpento rampis en herbejo, nevidante la birdegon, kiu flugas supre. Ĉi tiu [in**i** = **zveripi**, la birdego] subite iris sur ĝin [in**e** = **perake**, la serpento])

En Kotavao, la uzo de la personaj pronomoj estas ofte limigita. Kiel subjekto, la pronomo plejofte estas neesprimata, krom volo de insisto, aŭ en la formoj kun sufikso « ***-ya*** » aŭ « ***-ye*** », kiam oni volas insisti pri la sekso. Tamen, iu sama persona pronomo, kiel subjekto, neniam estu ripetata en la sama frazo.

Ekz. : ***(rin) va mona disukel nume dostel da ina listafa*** (vi rigardas la domon kaj akceptas, ke ĝi estas bela)

En Kotavao, la uzo de la unua kaj dua personoj de la pluralo anstataŭ la unua kaj dua personoj de la singularo ne eblas. La vidirado ne ekzistas.

**1) La persona pronomo reflekteca** [kataces ilkomaf ikayolt]

Ekzistas en Kotavao persona pronomo reflekteca « ***int*** ». Ĉi tiu estas tute neŝanĝebla kaj havas nur ĉi tiun formon (neniu iĉeca nek ineca sufikso). Tiu pronomo estu uzata nur, kiel komplemento. Ĝi nepre rilatas al la subjekto de la propozicio. En la unuaj, duaj kaj kvara personoj, ĝi havas la saman sencon, kiel la personaj pronomoj rektaj, sed, en la triaj, ĝi rilatas al la subjekto, dum « ***in*** » aŭ « ***sin*** » rilatas al alia estaĵo aŭ afero.

Ekz. : *in icde **int** fereon pulvir* (ĝi ofte parolas pri si)
*in icde **in** fereon pulvir* (ĝi ofte parolas pri ĝi)

En participa aŭ gerondiva frazparto, la pronomo estas renkontebla en la formo « ***dil int*** », kiam ĝi rilatas al la komplemento de la participa frazparto kaj kiam tiu komplemento estas malsimila al la subjekto.

**2) La persona pronomo reciprokeca** [waldaf ilkomaf ikayolt]

Ekzistas en Kotavao persona pronomo reciprokeca « ***sint*** ». Ĉi tiu estas tute neŝanĝebla kaj havas nur ĉi tiun formon (neniu iĉeca nek ineca sufikso). Ĝi estu, kiel la reflekteca, uzata nur, kiel komplemento. Ĝi nepre rilatas al la subjekto de la propozicio, kvankam tiu subjekto estas uzebla

nur plurale. Ĝi indikas, ke la ago estas reciproke farata de aŭ por ĉiu ano de la subjekto.

Ekz. : *sin va **sint** disuked* (ili rigardas unu la alian)
*sin va **int** disuked* (ili rigardas sin (ĉiu sin))
*sin va sin disuked* (ili rigardas ilin (aliajn))

## B : La posesivoj [dikiraf ikayolt]

Ili formiĝas pere de la posesivaj determinantoj, kun la difinita artikolo lokita ĵus antaŭe. Kiel ĉiu determinanto, ili estu regataj de la sonharmonia regulo. Ili estas:

| | |
|---|---|
| ***tel jinaf*** | la mia |
| ***tel rinaf*** | la via, la cia |
| ***tel inaf*** | la lia, la ŝia, la ĝia |
| ***tel minaf*** | la nia (inkluzive) |
| ***tel winaf*** | la via |
| ***tel sinaf*** | la ilia |
| ***tel cinaf*** | la nia (ekskluzive) |

Krom tio, ekzistas reflekta posesivo: ***tel intaf*** (la sia). Ĉi tiu povas ankaŭ aperi en la duaj formoj ***tel dal intaf*** aŭ ***tel dil intaf*** (foje per enklizo: ***tel dalintaf***, ***tel dilintaf***) en certaj situacioj de participaj aŭ gerondivaj frazpartoj.

## C : La pronomoj rilativaj kaj la aliaj [skedaraf ikayolt isu ar]

Ekzistas en Kotavao 94 pronomoj kaj aliaj (demonstrativaj, kolektivaj, nedifinitaj, ktp.). 85 el ili apartenas al la pronomaj serioj. Tiuj serioj estas fonditaj sur rilativa pronomo komponata kaj iu komponanta (per la sama principo, kiel la adverbaj rilativaj serioj).

La komponataj estas:

| | |
|---|---|
| ***coba*** | kio ; tio, kio |
| ***tan*** | iu (nekonata) |
| ***tel*** | iu (konata) |
| ***tol*** | iu el la du |

La komponantaj estas:

| | | |
|---|---|---|
| ***bat*** | ĉi tio, ĉi tiu, la unua | *proksimecaj demonstrativoj* |
| ***ban*** | tio, tiu, la lasta | *malproksimecaj demonstrativoj* |
| ***mil*** | sama, tiu sama | *demonstrativoj de identeco* |
| ***ar*** | alia | *aliecoj* |
| ***kot*** | ĉio, ĉiu | *kolektivoj* |
| ***me*** | neniu | *negacioj* |
| ***kon*** | kelka | *nedifinitaĵoj singularaj* |
| ***bet*** | iu ajn, io ajn | *nedifinitaĵoj nedifenrencigitaj* |
| ***lan*** | certa | *nedifinitaĵoj diferencigitaj* |
| ***man*** | kia ! | *nedifinitaĵoj eksklamaciaj* |
| ***yon*** | -j | *nedifinitaĵoj de pluraleco [plurala senco]* |
| ***konak*** | kelkaj, pluraj | *kvantoj je meza nombro [plurala senco]* |
| ***abic*** | iomete da | *kvantoj je malgranda nombro [plurala senco]* |
| ***jontik*** | multe da | *kvantoj je granda nombro [plurala senco]* |
| ***slik*** | tro da | *kvantoj je troa nombro [plurala senco]* |
| ***dik*** | malsufiĉe da | *kvantoj je malsufiĉa nombro [plurala senco]* |
| ***um*** | sufiĉe da | *kvantoj je sufiĉa nombro [plurala senco]* |
| ***vug*** | minimumo da | *kvantoj je minimumeco [plurala senco]* |
| ***cug*** | maksimumo da | *kvantoj je maksimumeco [plurala senco]* |
| ***le*** | malpli da | *kvantoj je malplimulto [plurala senco]* |
| ***li*** | same tiom da | *kvantoj je egaleco [plurala senco]* |
| ***lo*** | pli da | *kvantoj je plimulto [plurala senco]* |
| ***tok ?*** | kiu ? | *rektaj demandiloj* |

***kas ?*** ĉu ? *demandiloj de ekzisto*

La serioj do estas:

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***coba*** (kio) | ***tan*** (iu) (nekonata) | ***tel*** (iu) (konata) | ***tol*** (iu el la du) |
| ***batcoba*** (ĉi tio) | ***battan*** (ĉi tiu) | ***battel*** (ĉi tiu) | ***battol*** (ĉi tiu el la du) |
| ***bancoba*** (tio alia) | ***bantan*** (tiu) | ***bantel*** (tiu) | ***bantol*** (tiu alia el la du) |
| ***milcoba*** (la sama afero) | ***miltan*** (la sama individuo) | ***miltel*** (la sama persono) | ***miltol*** (la sama el la du) |
| ***arcoba*** (alia afero) | ***artan*** (alia individuo) | ***artel*** (alia persono) | ***artol*** (aliulo rilate al ambaŭ) |
| ***kotcoba*** (ĉio) | ***kottan*** (ĉiu) | ***kottel*** (ĉiu) | ***kottol*** (ambaŭ) |
| ***mecoba*** (nenio) | ***metan*** (neniu) | ***metel*** (neniu) | ***metol*** (neniu el la du) |
| ***koncoba*** (io) | ***kontan*** (iu) | ***kontel*** (iu) | ***kontol*** (iu el la du) |
| ***betcoba*** (io ajn) | ***bettan*** (iu ajn) | ***bettel*** (iu ajn) | ***bettol*** (iu ajn el la du) |
| ***lancoba*** (certa afero) | ***lantan*** (iu certa) | ***lantel*** (iu certa) | ***lantol*** (certa individuo el la du) |
| ***mancoba*** (tia afero) | ***mantan*** (tia individuo) | ***mantel*** (tia persono) | ***mantol*** (tia individuo el la du) |
| ***yoncoba*** (aferoj) | ***yontan*** (iuj) | ***yontel*** (iuj) | ***yontol*** (ambaŭ) |
| ***abiccoba*** (malmulte da aferoj) | ***abictan*** (malmulte da personoj) | ***abictel*** (malmulte da personoj) | |
| ***konakcoba*** (kelkaj aferoj) | ***konaktan*** (kelkaj individuoj) | ***konaktel*** (kelkaj personoj) | |
| ***jontikcoba*** (multe da aferoj) | ***jontiktan*** (multe da individuoj) | ***jontiktel*** (multe da personoj) | |
| ***slikcoba*** (tro de aferoj) | ***sliktan*** (tro da individuoj | ***sliktel*** (tro da personoj) | |
| ***dikcoba*** (nesufiĉe da aferoj) | ***diktan*** (nesufiĉe da individuoj) | ***diktel*** (nesufiĉe da personoj) | |
| ***umcoba*** (sufiĉe da aferoj) | ***umtan*** (sufiĉe da individuoj) | ***umtel*** (sufiĉe da personoj) | |
| ***vugcoba*** (minimumo da aferoj, preskaŭ nenio) | ***vugtan*** (minimumo da individuoj, preskaŭ neniu) | ***vugtel*** (minimumo da personoj, preskaŭ neniu) | |
| ***cugcoba*** (maksimumo da aferoj, preskaŭ ĉio) | ***cugtan*** (maksimumo da individuoj, preskaŭ ĉiuj) | ***cugtel*** (maksimumo da personoj, preskaŭ ĉiuj) | |
| ***lecoba*** (malplimulto da aferoj) | ***letan*** (malplimulto da individuoj) | ***letel*** (malplimulto da personoj) | |
| ***licoba*** (la duono de la aferoj) | ***litan*** (la duono de la individuoj) | ***litel*** (la duono de la personoj) | |
| ***locoba*** (la plimulto de la aferoj) | ***lotan*** (la plimulto de la individuoj) | ***lotel*** (la plimulto de la personoj) | |
| ***tokcoba ?*** (kio?) | ***toktan ?*** (kiu?) | ***toktel ?*** (kiu?) | ***toktol ?*** (kiu el la du?) |
| ***kascoba ?*** (ĉu troviĝas io, kio?) | ***kastan ?*** (ĉu troviĝas iu, kiu?) | ***kastel ?*** (ĉu troviĝas iu, kiu?) | ***kastol ?*** (ĉu iu el la du?) |

Krom ĉi tiuj 85 seriaj pronomoj, ekzistas kvin aliaj rilativaj pronomoj: « ***dan*** » (kiu), « ***dacoba*** » (tio kio), « ***datan*** », (tiu kiu [nekonata]), « ***datel*** » (tiu kiu [konata]) kaj « ***datol*** » (tiu el la du, kiu).

Ĉiuj seriaj pronomoj komponitaj per « ***-tan*** », « ***-tel*** » aŭ « ***-tol*** » estas neŝanĝeblaj. Tamen, kiel la personaj pronomoj, ili povas ricevi la seksajn sufiksojn « ***-ya*** » kaj « ***-ye*** », por insisti sur la sekso.

La pronomoj komponitaj per « ***-coba*** » estas tute neŝanĝeblaj kaj neplilongigeblaj. Tamen, la izolita pronomo « ***dan*** » estu regata de la sonharmonia sistemo kaj ricevu do taŭgajn finaĵojn.

La izolitaj rilativaj pronomoj kreitaj per « ***da-*** » (***dan***, ***dacoba***, ***datan***, ***datel*** kaj ***datol***) estas malofte uzataj kaj ili estas preskaŭ nur por enkonduki nerektajn demandojn. Oni preferas la konstruojn participajn, aktivajn, pasivajn aŭ eĉ komplementajn.

Ekz. : ***va zveri dani talar dizvé*** (mi observas la birdon, kiu flugas)
***va zveri talasi dizvé*** (mi observas la flugantan birdon ; *preferinda konstruo*)
***pruve va dane jin estú*** (la pomo, kiun mi manĝas)
***pruve jinon estune*** (la pomo manĝata de mi ; *preferinda konstruo*)

# Ĉapitro VI : LA ADVERBOJ [muge]

La adverboj estas neŝanĝeblaj vortoj, kiuj kvalifikas verbon, determinanton, alian adverbon aŭ konjunkcion, aŭ eĉ frazparton aŭ tutan frazon.
Multaj adverboj, precipe la rilativaj adverboj kaj sufiĉe multe da originalaj adverboj havas ankaŭ la celon de konjunkcio. Tio signifas, ke ili povas enkonduki propozicion, kiel klasika konjunkcio.
Plejofte, adverbo estu lokata plej proksime antaŭ la kvalifitata elemento.
Ekzistas en Kotavao tri specoj de adverboj: la adverboj veraj aŭ originalaj (do ne derivitaj), la adverboj de maniero, derivitaj de determinanto kaj la adverboj kun rilativa valoro, apartenantaj al la adverbaj serioj.

## A : La originalaj adverboj ne derivitaj [xantafe muge]

Ili estas sufiĉe malmultaj, sed ilia uzo estas tre ofta. Ili estas:

| | |
|---|---|
| ***adim*** | hm! finfine |
| ***balte*** | konsentite, volonte |
| ***berde*** | estas la bona momento por ke |
| ***dile*** | iufoje |

*Sekvo: rigardu Aneksaĵojn (aneksaĵo E.1) por la plena listo de la originalaj adverboj*

## B : La adverbaj serioj [mugeenk]

Ekzistas en Kotavao, tiel, kiel la pronomaj serioj, 18 serioj de rilativaj (aŭ konjunkciaj) adverboj, elvenantaj de la samaj komponantoj (***kot, me, bat, ban, mil, lan, man, kon, bet, ar, tok, kas, yon, jontik, konak, abic, slik, dik, um, vug, cug, le, li, lo***).

La 18 bazaj komponataj vortoj de tiuj serioj estas rilativaj (aŭ konjunkciaj) adverboj. Ili estas:

| | | |
|---|---|---|
| – dato, momento | ***viele*** | kiam ; tiam kiam ; en la momento kiam |
| – antaŭa dato | ***vielu*** | ekde tiam kiam |
| – posta dato | ***vieli*** | ĝis tiam kiam |
| – epoko | ***ugale*** | kiam ; dum la epoko kiam |
| – daŭro | ***edje*** | dum kiom da tempo |
| – kaŭzo | ***dume*** | kial ; pro kiu kaŭzo, pro la kaŭzo ke |
| – celo | ***enide*** | por kiu celo ; por ke |
| – rimedo | ***kane*** | kiel ; pere de kio |
| – kvalito, maniero | ***inde*** | kiel ; kiamaniere |
| – cirkonstanco | ***tode*** | en kia cirkonstanco ; en kiu kondiĉo |
| – eventualeco | ***kase*** | en kiu eventualeco ; ĉu |
| – nombro, kvanto | ***ote*** | kiom ; tiom kiom ; je kia kvanto |
| – grado, nivelo | ***eke*** | je la nivelo kie ; en la grado kie |
| – prezo, valoro | ***droe*** | kiom multekosta |
| – loko kien oni iras | ***liz*** | kien ; tien kien |
| – loko kie oni troviĝas | ***lize*** | kie ; tie kie |
| – loko el kiu oni venas | ***lizu*** | el kie ; de kie |
| – loko kie oni pasas | ***lizo*** | tra kie ; trans kie |

Ekzemploj de komponitaj adverboj (el 432 potencaj):

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***tokviele ?*** | kiam? | ***ardume*** | pro alia kialo |
| ***tokkane ?*** | kiel? | ***kotugale*** | en ĉiu epoko |
| ***batenide*** | por ĉi tiu celo | ***medroe*** | por neniu prezo |
| ***laneke*** | en certa grado | ***jontikote*** | je grandega kvanto |
| ***kondume*** | pro iu kialo | ***betviele*** | iam ajn |
| ***tokliz ?*** | kien? | ***banlize*** | tie |

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***manlizo*** | tra tia loko | ***arlizu*** | de alia loko |
| ***metode*** | en neniu cirkonstanco | ***yoneke*** | en kelkaj gradoj ; en kelkaj niveloj |
| ***tokedje ?*** | dum kiom da tempo? | ***slikinde*** | per tro da manieroj |
| ***cugeke*** | en la plej alta grado | ***vugote*** | je kvanto kiel eble plej malgranda |

Tiuj rilativaj adverboj havas konjunkcian dimension. Tio signifas, ke ili povas rekte enkonduki frazpartojn. Ili plie estas ofte uzataj tiamaniere.

Ekz. : *widava wan divlizewer* ***kotliz*** *lae tir azefe ok ticumansase* (la urbo etendiĝas **ĉien, kie** la reliefo estas ebena aŭ malmulte dekliva)
*Laridagaben bulol ieyer* ***cugeke*** *jontiktan me rotcizayad* (la porko, kies gorĝo estas tranĉata, kriis **tiom multege, ke** multaj homoj ne povis elporti)
*In koe bata mawa kenibeyer* ***meviele*** *kapamiel tiyir* (ĝi **neniam** dormis en ĉi tiu ĉambro, **kiam** okazas festnokto)

## C : La manieraj adverboj derivitaj [baskafe muge]

Ili estas ĉiuj adverboj derivitaj de adjektivo aŭ de iu ajn determinanto. Ilia formiĝo sekvas simplan kaj unuunuran regulon:

– el determinanto, kiu finiĝas per « ***-af*** » aŭ « ***-f*** » :
Oni prenas la radikalon de la determinanto (do sen tiu finaĵo) kaj oni aldonas la adverbigan sufikson « ***-on*** ».

Ekz. :
***kaliaf*** (rapida) → ***kalion*** (rapide)
***favlaf*** (utila) → ***favlon*** (utile)
***laof*** (kuraĝa, forta) → ***laoon*** (kuraĝe, forte)
***xuf*** (vertikala) → ***xuon*** (vertikale)

– el determinanto sen karakteriza finaĵo :
Temas pri la determinantoj, kiuj estas en radikala stato. Oni prenas ankaŭ ĉi tie la radikalon kaj oni aldonas la sufikson « ***-on*** ».

Ekz. :
***bat*** (tiu ĉi) → ***baton*** (ĉi tiel)
***slik*** (tro da) → ***slikon*** (en tro granda kvanto)

– el kardinala numeralo :
Oni prenas ankaŭ ĉi tie la radikalon de la numeralo, do sen la karakteriza sufikso « ***-oy*** », kaj oni aldonas la adverbigan sufikson « ***-on*** », rekte sur la longan formon.

Ekz. :
***baroy*** (tri) → ***baron*** (tri fojojn)
***san-aluboy*** (dek kvin) → ***san-alubon*** (dek kvin fojojn)

– el verba adjektivo (participoj):
Diference al la ĉefa regulo, oni ne prenu la adjektivon laŭ la radikala formo (la radikala formo estas la radikalo de la verbo), sed oni aldonu la adverbigan sufikson « ***-on*** », rekte sur la longan formon.

Ekz. :
***meruptes*** (sendependa) → ***merupteson*** (sendepende)
***metentun*** (nedifinata) → ***metentunon*** (sendifine)
***pokolemb*** (de kiu oni esperas) → ***pokolembon*** (en la situacio de tiu, de kiu oni esperas)

Ĉiuj derivitaj adverboj, kiel la adjektivoj, povas havi komparativan, superlativan kaj progresivan plilongigojn.

Ekz. :
***lokaliaf*** (pli rapida) → ***lokalion*** (pli rapide)
***lelefavlaf*** (malpli kaj malpli utila) → ***lelefavlon*** (malpli kaj malpli utile)
***tel lokaliaf*** (la plej rapida) → ***tel lokalion*** (la plej rapide)

# Ĉapitro VII : LA INTERJEKCIOJ [divieks]

Ili konstituas apartan klason de vortoj. Ili estas nek substantivoj, nek eĉ adverboj, kvankam sintakse preskaŭ adverbaj. Ili estas neklasigeblaj kaj kompreneble estas neŝanĝeblaj.

# Ĉapitro VIII : LA PREPOZICIOJ [yaz]

En Kotavao, la prepozicioj estas, kun la konjunkcioj, de kiuj ili estas proksimaj, en la superkategorio de la ilaj vortoj nomitaj "enkondukantaj". Ilia rolo estas fundamenta en Kotavao, ĉar la lingvo havas neniun deklinacion. Kotavao havas neniun postpozicion. La prepozicioj de Kotavao estas en kvar kategorioj: la prepozicioj pri loko, la prepozicioj pri tempo, la diversaj prepozicioj kaj la prepoziciaj vortetaroj sur adverbo.

La plejparto de la prepozicioj, precipe tiuj pri loko kaj pri tempo, havas kontraŭstarantan prepozicion, kiu esprimas la inversan ideon. Ĉiu prepozicio havas precizan rolon kaj, en Kotavao, ne ekzistas prepozicio, kies senco estus nedifinita (krom la du ilaj prepozicioj specialaj « ***gu*** » kaj « ***ic*** »), kiu servus por esprimi ĉiajn nociojn.

## A : La ĝeneralaj prepozicioj (nek pri loko nek pri tempo) [mexof is meugalaf yaz]

Ili estas diversegaj. Tamen, oni foje subdividas ilin laŭ iliaj sencoj: kaŭzo, maniero, mezuro ktp. Ĉi tie ni ne interesiĝas pri tio.

| Prep. Kotava | Traduko Esperanten | Prep. Kontraŭstaranta | Traduko |
|---|---|---|---|
| ***a*** | sen | ***dem*** | da |
| ***arbe*** | ĉar ne eblas | ***kan*** | per |
| ***bas*** | el ; de | ***pu*** | al (atribuo) |
| ***bro*** | kiel | ***kevie*** | male al |
| ***damo*** | malgraŭ | ***tornoce*** | graŭ |

*Sekvo : rigardu Aneksaĵojn (aneksaĵo A.1) por la plena listo de tiuj ĉi prepozicioj*

## B : La prepozicioj pri tempo [ugalaf yaz]

| Prep. Kotava | Traduko Esperanten | Prep. Kontraŭstaranta | Traduko |
|---|---|---|---|
| ***abdi*** | antaŭ ; antaŭe al | ***radimi*** | post ; poste al |
| ***arti*** | post (tiom da tempo) | ***runi*** | ekde la komenco de |
| ***ba*** | je ; en la momento, kiam okazas | | |
| ***bad*** | dum ; ene de (tempo por fari ion) | | |
| ***bak*** | dum ; en | | |

*Sekvo : rigardu Aneksaĵojn (aneksaĵo A.2) por la plena listo de tiuj ĉi prepozicioj*

### 1) La enklizo de la prepozicioj pri tempo [ugalyazafa jera]

Certaj prepozicioj pri tempo povas kunfandiĝi kaj tiel kunigi siajn sencojn, tute.

Ekz. : *Romuald **abdiremi** estura dun krandeyer* (**antaŭ kaj dum la tuta** manĝado ne ĉesis ŝerci)

*in **toziteni** estura pu jin pulviyir* (ĝi parolis al mi **en la komenco kaj en la fino** de la manĝado)

## C : La prepozicioj pri loko [xof yaz]

En Kotavao, ekzistas 67 prepozicioj pri loko. Ĉiu el ili fakte havas kvar distingajn formojn:

– la formo 1 : ĝi esprimas la ***lokon, kien oni iras***
– la formo 2 : ĝi esprimas la ***lokon, kie oni troviĝas***
– la formo 3 : ĝi esprimas la ***lokon, de kie oni venas***
– la formo 4 : ĝi esprimas la ***lokon, kie oni pasas***

La formo 1 konstituas la bazan formon, sur kiu la tri aliaj estas konstruitaj:
– formo 2 = *formo 1* **+** « ***e*** »
– formo 3 = *formo 1* **+** « ***u*** »
– formo 4 = *formo 1* **+** « ***o*** »

| Prep. Kotava | Traduko Esperanten | Prep. Kontraŭstaranta | Traduko |
|---|---|---|---|
| ***abdu*** | antaŭ | ***radim*** | malantaŭ |
| ***anam*** | ĉirkaŭ | ***ist*** | en la centro de |
| ***art*** | ĉe la fino de ; en la elirejo de | ***run*** | ĉe la enirejo, en la komenco de |
| ***ben*** | sur ; kontraŭ | | |

*Sekvo : rigardu Aneksaĵojn (aneksaĵo A.3) por la plena listo de tiuj ĉi prepozicioj*

### 1) La enklizo de la prepozicioj pri loko [xozazafa jera]

Du prepozicioj pri loko povas esti en enklizo kaj tiel kunigi siajn sencojn. Nur la dua ricevu la markon de formo, por la tutan novan prepozicion.

Ekz. : *Québec **kentalte** Saint-Laurent bost tigir* (Kebekurbo troviĝas **laŭ la maldekstra bordo** de la riverego Sankta-Laŭrenco)
*kosuteks **kaktice** rebava tir* (estas skribo **supre kaj malantaŭe kontraŭ** la muro)

## Ĉ : La prepoziciigo sur adverbo (adverbaj prepozicioj) [mugeyaz]

Kotavao havas mekanismon nomatan "prepoziciigo sur adverbo", kiu permesas krei esprimon kun prepozicia valoro pere de determinanto aŭ de adverbigita substantivo. Tial eblas esprimi ĉiajn rilatojn pri loko (absoluta aŭ rilativa, direkto, dimensio, ktp.), kaj eĉ pri aliaj aferoj. Laŭ la principo, oni povas fari tion per ĉiu ajn nomo. Tamen, la uzado kaj la senco faras, ke tiu eblo povas okazi nur en rilative limigita kvanto da cirkonstancoj.

La principo de la prepoziciigo sur adverbo konsistas en la uzo de adverbigita formo kun iu el la du ilaj prepozicioj gu aŭ ic (ic/ice/icu/ico).

La elektado de la adekvata prepozicio inter la du, por la prepoziciigo sur adverbo, estas simplega:

### 1) La ila prepozicio « ic »

Ic (ic/ice/icu/ico) kreas prepozician esprimon de loko. Kiel la bazaj prepozicioj pri loko, ĝi havas 4 formojn, kiuj permesas indiki la lokon, kien oni iras (ic), la lokon, kie oni troviĝas (ice), la lokon de, kie oni venas (icu) kaj la lokon, kie oni pasas (ico).
Tiu ĉi prepozicio neniam estas uzebla sola. Ĝi ekzistas nur en prepoziciigo sur adverbo.

| Vorto Esperanta | Esprimo Esperanta | Prepozicia esprimo de loko en Kotavao |
|---|---|---|
| *akso* | en la akso de | lyon ic |
| *alto* | en la alto de | ontinon ic, xuon ic, ticxuon ic |
| *angulo* | en la angulo de | alavon ic, gentimon ic |
| *antipodo* | sur la antipodo de | arkumon ic |
| *atmosfero* | en la atmosfero de | alpozon ic |

*Sekvo : rigardu Aneksaĵojn (aneksaĵo A.4) por disvolvita listo de prepoziciaj vortetaroj*

<u>*Ekzemploj :*</u>
– ***Mona (tigisa) <u>wexayon ice</u> vosta tir savsapafa*** : *la domo (troviĝanta) sur la elstaraĵo ĉe la*

*truego estas malnovega*

- ***Voklibon ico* venta vultel djay !!** : *kuru pasante sur la kulmino de la monteto!*
- ***Vwon ic* keldega va situla rumkal djay !!** : *pendigu la vitron ĉe la sama nivelo, kiel la kameno!*

### 2) La ila prepozicio « gu »

Gu estas uzata por ĉiuj aliaj cirkonstancoj en, kiuj ne troviĝas nocio de loko. Nur kelkaj ekzemploj:

- **Bata gola *kobodon gu* kelu tir wawapafa** : *ĉi tiu regiono konfliktante la ĉefurbon estas malriĉega*
- ***Emon gu* retikeem in tir axarsaf** : *laŭ la rango rilate al la kandidatoj, ĝi estas tro malforta*
- **Tirka *walvedeyon gu* detce tir voldrikafa** : *konsiderante internacie la temon, la pozicio estas malfacila*

# Ĉapitro IX : LA KONJUNKCIOJ [skedaxa]

En Kotavao, ekzistas sufiĉe multe da konjunkcioj. La plejmulto enkondukas konjunkciajn frazpartojn kaj kelkaj rolas je ligilo.
Morfemoscience, ekzistas du specoj de konjunkcioj: la simplaj konjunkcioj kaj tiuj, kiuj enhavas enklizon (kun « ***da*** » (ke) aŭ alia primitiva konjunkcio).
Oni distingas 6 specojn de konjunkcioj: la primitivaj konjunkcioj, la komponitaj konjunkcioj, la specialaj kunordigiloj, la adverbaj konjunkcioj, la anstataŭiganta konjunkcio kaj singulara kategorio konstituita de la kunigantaj konjunkcioj, kiuj funkcias iom malbanale.

## A : La primitivaj konjunkcioj [taneodafa dirgasa skedaxa]

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***beka*** | kvankam | ***pune*** | en tiu cirkonstanco |
| ***da*** | ke | ***solve*** | dum (nocio de kontraŭo) |
| ***dumede*** | kvazaŭ | ***teka*** | sen ke |
| ***ede*** | se | ***vaxede*** | krom se |
| ***goke*** | se veras ke | ***voxosk*** | sed plie ; sed ankaŭ |
| ***iclede*** | se almenaŭ | ***wari*** | espereble ke |
| ***kore*** | eĉ se | ***wotce*** | tute ne estas ke |
| ***larde*** | kiel sciate ke ; ĉar tio ke | ***zobe*** | krom se okazas eĉ nur ke |
| ***ont*** | ĉu (por enkonduki 2 paralelajn aferojn) | | |
| ***osk*** | ne nur | | |

Ili estas la bazaj konjunkcioj. Ili enkondukas neĉefajn propoziciojn, kiuj nepre devas enhavi konjugaciitan verban formon.

## B : La komponitaj konjunkcioj [ponana dirgasa skedaxa]

### 1) La konjunkcioj komponitaj per « da »

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***abdida*** | antaŭ ke | ***ticida*** | en la fino kiam ; fine ke |
| ***darpeda*** | laŭ la progreso ke | ***titida*** | en la komenco kiam ; kom. ke |
| ***kabdida*** | ĵus antaŭ ke | ***vabdida*** | en la komenco kiam ; kom. ke |
| ***kadimida*** | ĵus post ke | ***vadimida*** | en la fino kiam ; fine ke |
| ***kaikida*** | post ke | ***valevida*** | longe antaŭ ke |
| ***kerida*** | atentante ke | ***valeyda*** | krom tio ke |
| ***levida*** | ĵus antaŭ ke | ***vamoida*** | longe post ke |
| ***moida*** | ĵus post ke | ***vaxeda*** | krom ke |
| ***radimida*** | post ke | | |

Tiuj komponitaj konjunkcioj uzas la vorteton « ***da*** » (ke), en formo de sintezo. Ili tamen rolas simile al la primitivaj konjunkcioj kaj enkondukas ankaŭ neĉefajn propoziciojn. Ĉiuj, krom du, esprimas tempan nocion.

**2) La komponitaj konjunkcioj, kiuj havas adverban valoron**

Kelkaj primitivaj konjunkcioj (beka, dumede, ede, goke, kore, larde, teka, vaxede, wotce, zobe) povas, farante nuran vorton, kuniĝi kun adverbaj partikuloj de stato (***en, me, mea, men, vol***) aŭ specifaĵoj (***awe, cwe, gue, ste, sye, tce, volgue, soye, tire, fiste, vode, volfiste, volvode, rotir***), tiamaniere formante komponitajn konjunkciojn, kiuj havus precipe adverban valoron, sed, kiuj tamen povas ankaŭ enkonduki neĉefajn propoziciojn. Kelkaj ekzemploj :

| | |
|---|---|
| ***edeen*** | se vere, se tio okazas (do) |
| ***edeme*** | se ne, se tio ne okazas (do) |
| ***larderotir*** | ĉar sciante ke tio eblas (do) |
| ***korefiste*** | eĉ se tio estus necesa, eĉ kiam tio necesus (tiam) |
| ***tekatire*** | sen ke tio estu necesaĵo (tial) |

*Sekvo : rigardu Aneksaĵojn (aneksaĵo E.1) por disvolvita listo de komponitaj konjunkcioj, kiuj havas adverban valoron*

## C : La specialaj kunordigiloj [aptafa dobenplekusa skedaxa]

| | |
|---|---|
| ***dam*** | ol |
| ***dum*** | kiel ; je la sama maniero kiel ; egalas |
| ***voldum*** | male al |

Ili estas nur tri, sed ili estas partikularaj, ĉar povas havi tri malsamajn funkciojn :

– rolo de simpla prepozicio

Ekz. : *Veroniko tir lokaliafo* ***dam*** *Petro* (Veroniko estas pli rapida **ol** Petro)
***Dum*** *Veroniko, Petro va Paris albar* (**Kiel** Veroniko, Petro ŝatas Parizon)
***Voldum*** *Veroniko, Petro va Paris albar* (**Male al** Veroniko, Petro ŝatas Parizon)

– adverba rolo, rilate al prepozicio aŭ al alia adverbo

Ekz. : *Veroniko tiyir* ***dum*** *kum rapor* (Veroniko estis **kvazaŭ** el petro, [sen movo])
*Veroniko* ***dum*** *lekeon estuyur* (Veroniko manĝis, **kiel** en la estinteco)
*Veroniko* ***voldum*** *lekeon estuckur* (Veroniko manĝas normale, **male al** antaŭ longe)

– konjunkcia rolo (kun verba formo eventuale subkomprenata)

Ekz. : *Veroniko estursuyur* ***dum*** *ulinsiyir* (Veroniko tro manĝis, **tute kiel** malsufiĉe manĝis ĝi [je la sama nivelo])
*Veroniko estuyur* ***voldum*** *uliyir* (Veroniko manĝis, **male al** sia trinkado [ne tiom multe])
*Veroniko estur loon* ***dam*** *doder* (Veroniko manĝas pli **ol** ĝi pagas)
*Veroniko estur leon* ***dam*** *Petro* (Veroniko manĝas malpli **ol** Petro)

## Ĉ : La adverbaj konjunkcioj [mugefa skedaxa]

La adverboj, kiuj apartenas al la adverbaj serioj havas konjunkcian dimension kaj povas do enkonduki frazpartojn. Oni jam studis ilin supre (*rigardu ĉapitron VI : la adverbaj serioj*).

## D : La anstataŭiganta konjunkcio [ikaaykasa skedaxa]

| | |
|---|---|
| *i* | [apozicio / substituo] |

Ĉi tiu nura konjunkcio konstituas originalaĵon de Kotavao. Ĝi permesas repreni elementon aŭ komplementon jam diritan, por prezenti ĝin alimaniere. La nova esprimo do havas valoron de substituanta apozicio.

## E : La kunigantaj konjunkcioj [kagluyasa skedaxa]

Ekzistas 13 kunigantaj konjunkcioj. Ĉiu el ili fakte havas kvar distingajn formojn :

– la formo 1 : ĝi esprimas la ***simplan rilativigon de vortoj***
– la formo 2 : ĝi esprimas la ***distribuan rilativigon***
– la formo 3 : ĝi esprimas la ***rilativigon de samsubjektaj propozicioj***
– la formo 4 : ĝi esprimas la ***rilativigon de malsamsubjektaj propozicioj***

La formo 1 konstituas la bazan formon, sur kiu la tri aliaj estas konstruitaj :
– formo 2 = *formo 1* **+** « ***u*** »
– formo 3 = *formo 1* **+** « ***e*** »
– formo 4 = *formo 1* **+** « ***en*** »

| | |
|---|---|
| *is, isu, ise, isen* | kaj |
| *ok, oku, oke, oken* | aŭ |
| *ik, iku, ike, iken* | kaj, aŭ, kaŭ |
| *mei, meiu, meie, meien* | nek |
| *vols, volsu, volse, volsen* | sed ne |
| *az, azu, aze, azen* | kaj (poste) |
| *vox, voxu, voxe, voxen* | sed, kaj tamen |
| *num, numu, nume, numen* | (kaj) do |
| *kir, kiru, kire, kiren* | ĉar |
| *nek, neku, neke, neken* | tamen, kvankam |
| *lodam, lodamu, lodame, lodamen* | prefere al |
| *lidam, lidamu, lidame, lidamen* | ĝuste tiom kiom |
| *ledam, ledamu, ledame, ledamen* | malprefere al |

### 1) Simplaj konjunkciaj formoj

La simplaj konjunkciaj formoj (*is, ok, ik, mei, vols, az, vox, num, kir, nek, lodam, lidam, ledam*) estu uzataj en simpla kunigo, kiam temas pri sama sintagmo aŭ sama propozicio.

Ekz. : *va atela **is** ilt estud* (ili manĝas fruktojn kaj viandon)
*va Paris **vols** London albar* (ĝi ŝatas Parizon sed ne Londonon)
*va ilt **kir** fa estur* (ĝi manĝas fruktojn ĉar ili donas energion)
*va ilt **lodam** atela estur* (ĝi manĝas fruktojn prefere al viandon)

### 2) Distribuaj konjunkciaj formoj

La formoj kun « ***-u*** » (*isu, oku, iku, meiu, volsu, azu, voxu, numu, kiru, neku, lodamu, lidamu, ledamu*) estas distribuaj. En simpla propozicio, kiam ĉiu el la diversaj sintagmoj estas karakterizata de la samaj determinantoj, ili permesas eviti ripeton pere de «distribuo» de la tielnomitaj determinantoj. Tiel la determinantoj, kiuj kvalifikas la unuan vorton kvalifikas ankaŭ la sekvantajn vortojn ligitajn per la konjunkcio, kiu finiĝas per « ***-u*** ».

Ekz. : *listaf batakaf karvol **isu** vakol **isu** okol estud* (la bela blanka kato kaj bela blanka hundo kaj bela blanka ĉevalo manĝas)
La determinantoj « ***listaf*** » (bela) kaj « ***batakaf*** » (blanka) kvalifikas la tri ligitajn substantivojn.
*me fentafa atela **meiu** kabaya tid kiewafa* (nek malvarma viando nek malvarma fiŝaĵo estas bonaj)
*va fentafa atela **ledamu** kabaya estú* (mi manĝas malvarman viandon, sed mi preferus manĝi malvarman fiŝaĵon)

### 3) Samsubjektaj konjunkciaj formoj

La formoj kun « ***-e*** » (*ise, oke, ike, meie, volse, aze, voxe, nume, kire, neke, lodame, lidame, ledame*) estas samsubjektaj kaj servas por ligi propoziciojn, kiam ili havas saman gramatikan subjekton.

Ekz. : *karvol estur **ise** ulir* (la kato manĝas kaj trinkas)
*va Moskva albar **volse** va Kyiv ilkader* (ĝi ŝatas Moskvon, sed male malŝatas Kievon)
*va Moskva albar **nume** ko Rossia fereon lapir* (ĝi ŝatas Moskvon kaj do iras ofte en Rusion)
*va Moskva albar **lidame** ko Kyiv gilapir* (ĝi ŝatas Moskvon tiom, kiom ĝi kutimas iri al Kievo)

**4) Malsamsubjektaj konjunkciaj formoj**

La formoj kun « ***-en*** » (*isen, oken, iken, meien, volsen, azen, voxen, numen, kiren, neken, lodamen, lidamen, ledamen*) estas malsamsubjektaj kaj servas por ligi propoziciojn, kiam iliaj gramatikaj subjektoj estas malsamaj.

Ekz. : *karvol estur **isen** vakol ulir* (la kato manĝas kaj la hundo trinkas)
*Mario va Paris albar **volsen** Veroniko ilkader* (Mario ŝatas Parizon, sed Veroniko male malŝatas)
*Mario ko Paris lapitir **voxen** Veroniko koe London zavzagitir* (Mario iros al Parizo, sed Veroniko restos en Londono)
*in va taneafe iaxe batlize vegeduyur **numen** widava toz laumayar* (ĝi konstruis unuan fabrikon ĉi tie do la urbo ekdisvolviĝis)

**5) Sencoj de la diversaj kunigantaj konjunkcioj**

La konjunkcio « ***is*** » estas uzata por indiki nocion de pura aldono.
Ekz. : *va atela **is** ilt estutur* (ĝi manĝos viandon kaj fruktojn)

La konjunkcio « ***ok*** » estas uzata por indiki nocion de pura alternativo.
Ekz. : *va atela **ok** ilt estutur* (ĝi manĝos la viandon aŭ la fruktojn; la viandon aŭ la fruktojn, sed ne ambaŭ)

La konjunkcio « ***ik*** » estas uzata por indiki necertecon inter aldono aŭ alternativo. Iamaniere, ĉi tiu konjunkcio traktas rilaton, kiel la du antaŭaj samtempe.
Ekz. : *va atela **ik** ilt estutur* (ĝi manĝos la viandon kaŭ la fruktojn; eble la viandon, eble la fruktojn, eble eĉ ambaŭ)

Tiu ĉi konjunkcio « ***ik*** » estas ankaŭ uzata por esprimi intervalon en gradaro da valoroj. Ĝi do esprimas la nociojn de «inter x KAJ y» aŭ «de x ĜIS y».
Ekz. : *kota pula va tol-sanoy **ik** bar-sanoy ravesik dadir* (ĉiu klaso enhavas inter dudek kaj tridek lernantojn)

La konjunkcio « ***vols*** » estas uzata por indiki absolutan kontraŭon sen alternativo.
Ekz. : *va atela **vols** ilt estutur* (ĝi manĝos la viandon, sed ne fruktojn; la viandon kaj nur la viandon; tute ne la fruktojn)

La konjunkcio « ***mei*** » estas uzata por ekskluzivi ĉiujn sintagmojn. Negativa ideo.
Ekz. : *va atela **mei** ilt me estutur* (ĝi manĝos nek la viandon nek la fruktojn)

La konjunkcio « ***az*** » estas uzata por indiki postecon.
Ekz. : *va atela **az** ilt estutur* (ĝi manĝos la viandon kaj, poste, la fruktojn; unue la viandon kaj poste la fruktojn)

La konjunkcio « ***vox*** » estas uzata por indiki nocion de aldono karakterizita de simpla kontraŭstareco.
Ekz. : *atelanya **vox** iltaj zo bildeyed* (bona viando, sed ankaŭ aĉaj fruktoj estis liverataj)

La konjunkcio « ***num*** » estas uzata por indiki konsekvencon.

Ekz. : *ko Moskva **num** Rossia lapitir* (ĝi iros al Moskvo do en Rusion)

La konjunkcio « ***kir*** » estas uzata por indiki kaŭzon.
Ekz. : *va grivakirapafa **kir** iewafa atela albar* (ĝi ŝatas la viandon gustohavegan ĉar freŝan)

La konjunkcio « ***nek*** » estas uzata por indiki koncedon, restrikton.
Ekz. : *va yona savsafa **nek** meurmafa neva albar* (ĝi ŝatas la malnovajn librojn kvankam elmodiĝintajn)

La konjunkcio « ***lodam*** » estas uzata por indiki hierarkian aldonon. Oni forte insistas sur la unua sintagmo.
Ekz. : *va atela **lodam** ilt estutur* (ĝi manĝos la viandon prefere al la fruktojn; ĝi preferas la viandon ol la fruktojn)

La konjunkcio « ***lidam*** » estas uzata por indiki egalecan aldonon. Ambaŭ sintagmoj estas konsiderataj absolute samgrade. Oni insistas sur tiu egaleco.
Ekz. : *va atela **lidam** ilt estutur* (ĝi manĝos la viandon kaj same la fruktojn; viando kaj fruktoj estas konsideritaj ekzakte samaj)

La konjunkcio « ***ledam*** » estas uzata por indiki anstataŭan aldonon. La unua sintagmo estas surogato de la dua.
Ekz. : *va atela **ledam** ilt estutur* (ĝi manĝos la viandon substituante ĝin al la fruktoj; ĝi preferus la fruktojn, sed devos manĝi la viandon, kiel surogaton)

### 6) Enklizo de la kunigantaj konjunkcioj

Du kunigantaj konjunkcioj povas eventuale kunfandiĝi kunigante siajn sencojn. Nur la dua ricevas la markon de la formo (simpla, distribua, samsubjekta aŭ malsamsubjekta), por la tuta nova konjunkcio.

Ekz. : *va pulotafa lexa **voxis** Rap lexa albal* (va ŝatas klasikan muzikon, **sed ankaŭ** la muzikon Rap)
*va nendas tobeem faveyé **voxaze** nope idul deswayá* (mi uzis protektantajn gantojn, **sed poste**, pro la varmo mi formetis ilin)
*gaderopik va skapasok kalion fu gotukiewad **kiroken** sane di exur* (la politikistoj devos rapide plibonigi la ekonomian situacion, **ĉar se ne**, la popolo indignos)

### 7) Sintaksaj devoj

En Kotavao, la kunigantaj konjunkcioj devas esti uzataj tiom da fojoj, kiom da kunigoj troviĝas.

Ekz. : *karvol **is** yon vakol **is** okol estud* (la kato, la hundoj kaj la ĉevalo manĝas)
*karvol estur **aze** ulir **aze** keniber* (la kato manĝas, trinkas kaj poste dormas)

La kunigantaj konjunkcioj ene de subjekta sintagmo (simpla aŭ distribua formo) havas efikon sur la nombra akordo, se la propozicio enhavas konjugaciitan verbon. La regulo, simplega, estas jena: kia ajn estu la konjunkcio, **la akordo estas en pluralo** ĉiaokaze, eĉ se sence la singularo estus atendata.

# Ĉapitro X : LA AFIKSOJ [osta]

Ĉi tie, ekstudas ni iun el la plej fundamentaj kaj interesaj partoj de la gramatiko de Kotavao. La afiksoj ja donas al la lingvo ĝian tutan riĉecon de esprimado (kaj kvanta kaj kvalita) kaj ankaŭ ĝian rimarkindan suplecon.
En Kotavao, oni parolas pri afiksoj nur tiam, kiam temas pri afiksoj, kiuj havas en si certan signifon kaj servas por konstitui novajn vortojn kaj ne simplajn paradigmojn (precipe pri verboj).
Ekzistas kvin specoj de afiksoj. Ili estas difinitaj rilate al la kategorioj de vortoj sur, kiujn ili efikas. Ekzistas

do:
– la ĝeneralaj afiksoj
– la verbigaj afiksoj
– la verbaj afiksoj
– la substantivaj afiksoj
– la afiksoj de determinanto

Notu jam nun, ke la afiksoj havas, kiel nuran limon de uzo, la logikecon kaj la klarecon de la esprimo.

## A : La ĝeneralaj afiksoj [jadifa osta]

Oni tiel nomas la afiksojn, kiuj povas esti rilativigitaj al iu ajn vorto de la tri unuaj morfologiaj niveloj (substantivoj, verboj, determinantoj kaj derivitaj adverboj).
Inter tiuj afiksoj, tri estas prefiksoj kaj sep estas sufiksoj.

### 1) La ĝeneralaj prefiksoj [jadifa abduosta | jadifa kevosta]

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| ***me-*** | ideo negativeco | ekz. : | ***favlaf*** (utila) | → | ***mefavlaf*** (neutila) |
| ***vol-*** | ideo kontraŭo | | ***favlaf*** (utila) | → | ***volfavlaf*** (malutila) |
| ***en-*** | ideo plifortigo | | ***favlaf*** (utila) | → | ***enfavlaf*** (tre utila) |

### 2) La ĝeneralaj sufiksoj [jadifa radimosta | jadifa kakosta]

Tiuj sufiksoj estas konstituitaj de unu aŭ du signifantaj konsonantoj, kun unu liga vokalo, kiu povas varii kaj esti lokita antaŭ aŭ malantaŭ, laŭ la kategorio aŭ la konsiderataj vortoj.
Tiuj sufiksoj estas:

| | |
|---|---|
| ***-m-*** | ideo de eteco, etiga sufikso |
| ***-p-*** | ideo de egeco, egiga sufikso |
| ***-j-*** | ideo de aĉeco, aĉiga sufikso |
| ***-ny-*** | ideo de boneco, boniga sufikso, karesa sufikso |
| ***-rs-*** | ideo de troo, troiga sufikso |
| ***-ns-*** | ideo de nesufiĉeco, nesufiĉiga sufikso |
| ***-ck-*** | ideo de mezeco, sufikso de mezumo |

Tiuj sufiksoj neniel povas efiki sur la morfologian naturon nek sur la lastan literon de vorto. Tial, iliaj formoj povas iom varii, sed tiu vario estas tute fiksita. Tiel:

– **kun substantivo** :
Tiuj sufiksoj estas regitaj de la regulo de la sonharmonia sistemo. Tio signifas, ke la fina litero de la substantivo okazigu eventualan sonharmonian finaĵon. Tiel:

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| – substantivo finiĝanta per ***konsonanto aŭ glitanto*** → | ***-am*** | ***-ap*** | ***-aj*** | ***-any*** | ***-ars*** | ***-ans*** | ***-ack*** |
| – substantivo finiĝanta per « ***-a*** » → | ***-ma*** | ***-pa*** | ***-ja*** | ***-nya*** | ***-rsa*** | ***-nsa*** | ***-cka*** |
| – substantivo finiĝanta per « ***-e*** » → | ***-me*** | ***-pe*** | ***-je*** | ***-nye*** | ***-rse*** | ***-nse*** | ***-cke*** |
| – substantivo finiĝanta per « ***-i*** » → | ***-mi*** | ***-pi*** | ***-ji*** | ***-nyi*** | ***-rsi*** | ***-nsi*** | ***-cki*** |
| – substantivo finiĝanta per « ***-o*** » → | ***-mo*** | ***-po*** | ***-jo*** | ***-nyo*** | ***-rso*** | ***-nso*** | ***-cko*** |
| – substantivo finiĝanta per « ***-u*** » → | ***-mu*** | ***-pu*** | ***-ju*** | ***-nyu*** | ***-rsu*** | ***-nsu*** | ***-cku*** |

| | | | |
|---|---|---|---|
| Ekz. : | *molt* (haveno) | → | *molt**ap*** (havenego) |
| | *fortey* (sango) | → | *fortey**any*** (bona sango) |
| | *mona* (domo) | → | *mona**ja*** (domaĉo) |
| | *perake* (serpento) | → | *perake**me*** (serpenteto) |
| | *dili* (paco) | → | *dili**cki*** (norma, ekvilibra paco) |

– **kun verbo** (aŭ verba formo):
Tiuj sufiksoj estas ankaŭ tie regitaj de la regulo de la sonharmonia sistemo (same, kiel la tensaj sufiksoj), lokitaj rekte ĉe la verba radikalo (ne forgesu, ke, por la derivitaj (ne)transitivaj verboj, la « ***-si*** » aŭ « ***-we*** » karakterizantaj estas parto de la radikalo mem). Ĉiuj verbaj formoj (eĉ la participoj) konstruiĝas do sur tiu pligrandigita radikalo. Tiel:

– verbo finiĝanta per « ***-a*** » → ***-ma -pa -ja -nya -rsa -nsa -cka***
– verbo finiĝanta per « ***-e*** » → ***-me -pe -je -nye -rse -nse -cke***
– verbo finiĝanta per « ***-i*** » → ***-mi -pi -ji -nyi -rsi -nsi -cki***
– verbo finiĝanta per « ***-u*** » → ***-mu -pu -ju -nyu -rsu -nsu -cku***

Ekz. : *DANKA* (kanti) → *DANKA**NYA*** (bele kanti)
*DOLE* (vendi) → *DOLE**PE*** (vendegi)
*belí* (mi legas) → *beli**jí*** (mi legaĉas)
*estuyur* (ĝi manĝis) → *estu**rsu**yur* (ĝi tro manĝis)
*dizveson* (observante) → *dizve**me**son* (observetante)
*tunuyan* (liberigata) → *tunuya**nsa**n* (nesufiĉe liberigata)

– **kun determinanto** (krom verbaj adjektivoj):

–kun adjektivo finiĝanta per « ***-af*** »:
formoj: ***-am- -ap- -aj- -any- -ars- -ans- -ack-*** metindaj inter la radikalo kaj la adjektiviganta sufikso karakteriza de la ekstremo.

Ekz. : *favlaf* (utila) → *favl**ap**af* (utilega)
*batakaf* (blanka) → *batak**aj**af* (blankaĉa)
*kaliaf* (rapida) → *kali**ars**af* (tro rapida)

–kun adjektivo finiĝanta per « ***-f*** » kaj, kies antaŭlasta litero ne estas « ***a*** »:
formoj: ***-ma- -pa- -ja- -nya- -rsa- -nsa- -cka-*** metindaj inter la radikalo kaj la adjektiviganta sufikso karakteriza de la ekstremo.

Ekz. : *laof* (kuraĝa, forta) → *lao**pa**f* (utilega)
*xuf* (vertikala) → *xu**rsa**f* (tro vertikala)
*solwif* (distinga) → *solwi**cka**f* (norme distinga)

– **kun adverbo**:

Nur la derivitaj adverboj povas ricevi la ĝeneralajn sufiksojn.
La sufiksojn oni metu same, kiel por la adjektivoj. Ni do metu ilin inter la radikalon kaj la adverbigantan sufikson « ***-on*** » karakterizan de la ekstremo.

## B : La verbigaj afiksoj [tugrayasa osta]

Oni tiel nomas la afiksojn, kiuj servas por formi verbojn, ĉu de substantivo, ĉu de determinanto. En la kategorio de la verbigaj afiksoj troviĝas unu sufikso kaj sep «prefikso-sufiksoj».

### 1) La verbigaj sufiksoj [tugrayasa radimosta]

Temas pri:

– ***ú*** : praktiki agon, sporton

Ekz. : *nugaviputi* (piedpilko) → *NUGAVIPUTI**U*** (praktiki, ludi piedpilkon)
*lexa* (muziko) → *LEX**U*** (praktiki, fari muzikon)

Tiun ĉi sufikson oni metu rekte sur la radikalon de la substantivo, tiel do verbigante ĝin. Kun substantivo, kiu finiĝas per « ***-a*** », ĉi tiu vokalo do malaperas.

La verboj tiel kreitaj estas netransitivaj, ĉar la ideo troviĝas ene de interna komplemento. La «***u***» metita, kiel sufikso estas, ekde tiam, parto de la nova radikalo tiel kreita.

### 2) La verbigaj «prefikso-sufiksoj» [tugrayasa abduosta]

Ili estas sep. Kvar havas substantivan bazon kaj la tri aliaj bazon de determinanto.

– **kun substantiva bazo**:

- ***ko-…-**** : ideo de enkonduko
- ***div-…-**** : ideo de elkonduko
- ***run-…-**** : ideo de ŝalto, de malfermo
- ***art-…-**** : ideo de malŝalto, de interrompo, de fermo

* kun substantivo, kiu finiĝas per konsonanto, glitanto aŭ «-o», la sufiksa parto verbiganta venigas iun « ***-á*** », por, ke la finaĵo estu verbe karakteriza. Kun substantivo, kiu finiĝas per alia vokalo, la nova verba radikalo enhavu nur la prefikson kaj la nomon, kiel originale.

| | | | |
|---|---|---|---|
| Ekz. : | *tota* (ŝipo) | → | ***KO**TOTA* (meti en ŝipon) |
| | *omaze* (vagono) | → | ***KO**OMAZE* (meti en vagonon) |
| | *direm* (aŭto) | → | ***DIV**DIREM**A*** (demeti el aŭto) |
| | *pako* (partio) | → | ***DIV**PAKO**A*** (demeti el partio) |
| | *afi* (lumo) | → | ***RUN**AFI* (ŝalti la lumon de) |

– **kun bazo de determinanto**:

- ***tu-…-á*** : ideo de igi ion tia
- ***gri-…-á*** : ideo de fari, ke io ne plu estu tia
- ***gu-…-á*** : ideo de fari, ke io konservu sian econ

Tiuj tri verbigantaj «prefikso-sufiksoj» metiĝas ĉe la determinantojn je la radikala stato. La verba radikalo tiel kreita enhavas do la *prefikson + la radikalo de la determinanto + la «-a» kiel sufikso.*

| | | | |
|---|---|---|---|
| Ekz. : | *tumtaf* (sankta) | → | ***TU**TUMT**A*** (sanktigi) |
| | *kristevaf* (kristanisma) | → | ***GRI**KRISTEV**A*** (malkristanigi) |
| | *garif* (aŭtenta) | → | ***TU**GARI**A*** (aŭtentigi) |
| | *ruptes* (dependanta) | → | ***TU**RUPTES**A*** (dependantigi)* |
| | *ar* (alia) | → | ***GRI**AR**A*** (forigi la diferencojn de) |
| | *parvuaf* (pura) | → | ***GU**PARVU**A*** (konservi pura ; konservi la purecon de) |

* kun la verbaj adjektivoj, oni prenu la participon je ĝia plena formo kaj ne nur la verban radikalon.

Ĉiuj verboj kreitaj pere de tiuj sep «prefikso-sufiksoj» estas transitivaj verboj. Ili do povas havi komplementon pere de la prepozicio « ***va*** ».

## C : La verbaj afiksoj [grayosta]

Oni tiel nomas la afiksojn, kiuj servas por formi, de la verba radikalo, substantivojn kaj adjektivojn (participoj). La verbaj afiksoj fakte estas nur sufiksoj. Tri servas por formi participojn *(rigardu supre ĉapitron III § Ĥ : la participo)*, du por formi adjektivojn de rezulto kaj de permanenta kvalito kaj la dek aliaj por formi substantivojn. Ni metu ilin sur la radikalon de la verbo.

| | | | |
|---|---|---|---|
| *-mb* | komplementa participo (komplementa verba adjektivo) | Ekz. *ZILI* (doni) | → *zili**mb*** (al kiu oni donas) |
| *-n* | pasiva participo (pasiva verba adjektivo) | Ekz. *WARZE* (produkti) | → *warze**n*** (produktata) |
| *-s* | aktiva participo (aktiva verba adjektivo) | | → *warze**s*** (produktanta) |
| *-naf* | verba rezulto (sen tempa nocio) | Ekz. *BUDE* (fermi) | → *bude**naf*** (fermita) |
| *-saf* | permanenta kvalito | Ekz. *WARZE* (produkti) | → *warze**saf*** (produktiva) |
| *-ks* | aĵo kiu estas konsekvenco de la ago de la verbo | Ekz. *WARZE* (produkti) | → *warze**ks*** (produktaĵo) |
| *-mbik* | ulo dua objekto de la ago | Ekz. *ZILI* (doni) | → *zili**mbik*** (tiu al kiu oni donas) |
| *-nik* | ulo spertanta kiel objekto la agon | Ekz. *RISTA* (opresi) | → *rista**nik*** (opresato) |
| *-ra* | verba ago (verba nomo) | Ekz. *WARZE* (produkti) | → *warze**ra*** (produktado) |
| *-sik* | aganto ; tiu kiu faras la agon | | → *warze**sik*** (produktanto) |
| *-siki* | instrumento kiu servas por | Ekz. *MADA* (levi) | → *mada**siki*** (levilo) |
| *-siko* | maŝino kiu servas por | Ekz. *GLUYA* (ligi) | → *gluya**siko*** (maŝino por ligi) |

| | | | |
|---|---|---|---|
| *-xa* | aĵo kiu rilatas al la ago de la verbo | Ekz. *IA* (fabriki) | → ***iaxa*** (fabrikaĵo) |
| *-xe* | konstruaĵo kie okazas la ago | | → ***iaxe*** (uzino) |
| *-xo* | loko kie okazas la ago | Ekz. *WARZE* (produkti) | → *warze**xo*** (produktejo) |

## Ĉ : La substantivaj afiksoj [yoltosta]

Oni tiel nomas la afiksojn, kiuj servas por formi substantivojn surbaze de aliaj substantivoj, sed ankaŭ por formi adjektivojn. Oni distingas la sufiksojn, kiuj servas por krei substantivojn, kaj la aliajn.

### 1) La substantivigaj sufiksoj [tuyoltasa radimosta]

Ili estas 28. Ili estas :

| | | | |
|---|---|---|---|
| **-a** | nombra kolektivo (sur la radikalo de nombro) | Ekz. *sanoy* (dek) | → *san**a*** (aro da dek aferoj) |
| **-ak** | ujo ; ingo | Ekz. *eip* (salo) | → *eip**ak*** (salujo) |
| **-akola** | malsano | Ekz. *riz* (pulmo) | → *riz**akola*** (pneŭmonito) |
| **-ava** | lingvo ; dialekto | Ekz. *Rossia* (Rusio) | → *Rossi**ava*** (la rusa lingvo) |
| **-cek** | ĉio kio troviĝas en certa ujo ; enhavo | Ekz. *art* (buŝo) | → *art**cek*** (enhavo de buŝo) |
| **-da** | nombro da jaroj (sur la radikalo de nombro) | Ekz. *san-* (dek) | → *san**da*** (jardeko) |
| **-eba** | profesio | Ekz. *tavesik* (instruisto) | → *tavesik**eba*** (instruisteco) |
| **-eem** | kolektivo ; aro | Ekz. *suterot* (verko) | → *suterot**eem*** (verkaro) |
| **-eka** | grado ; nivelo | Ekz. *lava* (akvo) | → *lav**eka*** (akvonivelo) |
| **-eva** | doktrino | Ekz. *selt* (socio) | → *selt**eva*** (socialismo) |
| **-inda** | speco | Ekz. *reiz* (fabelo) | → *reiz**inda*** (speco de fabelo) |
| **-ka** | nombro da tagoj (sur la radikalo de nombro) | Ekz. *san-* (dek) | → *san**ka*** (tagdeko) |
| **-ki** | parto, peco de | Ekz. *beg* (pano) | → *beg**ki*** (peco da pano) |
| **-kril** | flanko (sur la radikalo de nombro) | Ekz. *tev-* (ses) | → *tev**kril*** (sesangulo) |
| **-kurke** | kuraco | Ekz. *lizira* (movo) | → *lizira**kurke*** (kinezoterapio) |
| **-lent** | faco (sur la radikalo de nombro) | Ekz. *tev-* (ses) | → *tev**lent*** (sesedro) |
| **-oc** | ido | Ekz. *okol* (ĉevalo) | → *okol**oc*** (ĉevalido) |
| **-olk** | ero | Ekz. *bixe* (sablo) | → *bixe**olk*** (sablero) |
| **-onya** | loko kie oni fabrikas aŭ vendas | Ekz. *beg* (pano) | → *beg**onya*** (panejo ; panvendejo) |
| **-opa** | scienco ; tekniko | Ekz. *ava* (lingvo) | → *av**opa*** (lingvistiko) |
| **-otsa** | ekstremo ; finaĵo ; pinto | Ekz. *axoda* (sekstrato) | → *axod**otsa*** (sekstrata fundo) |
| **-roti** | potenco | Ekz. *bazaxo* (oficejo) | → *bazaxo**roti*** (oficeja potenco) |
| **-tum** | grupeto ; fasko ; tufo | Ekz. *werd* (herbo) | → *werd**tum*** (tufo da herbo) |
| **-ugal** | tempo ; epoko ; erao ; sezono | Ekz. *imwa* (floro) | → *imw**ugal*** (sezono de floroj) |
| **-xa** | objekto el certa materio | Ekz. *rigela* (porcelano) | → *rigela**xa*** (porcelanaĵo) |
| **-xe** | konstruaĵo por certa uzo | Ekz. *okol* (ĉevalo) | → *okol**xe*** (ĉevalejo) |
| **-xo** | loko | Ekz. *aal* (arbo) | → *aal**xo*** (arbaro ; loko plena je arboj) |
| **-ya** | ino | Ekz. *tavesik* (instruisto) | → *tavesik**ya*** (instruistino) |
| **-ye** | iĉo | Ekz. *jaftol* (bovo) | → *jaftol**ye*** (boviĉo ; virbovo) |

Ni metu la sufiksojn rekte sur la substantivojn. Kiam la substantivo finiĝas per « ***-a*** », ĉi tiu lasta litero foriras, se la sufikso komenciĝas per vokalo.

### 2) La adjektivigaj sufiksoj [tusorelasa radimosta]

Ili estas 11. Ili estas :

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***-af***, ***–f** ** | kvalifika adjektivo | Ekz. *mefta* (monto) | → *meft**af*** (monta) |
| ***-eaf*** | vica adjektivo (sur la radikalo de nombro) | Ekz. *tev-* (ses) | → *tev**eaf*** (sesa) |
| ***-enjaf*** | al kiu mankas unu aŭ kelkaj | Ekz. *gelt* (fingro) | → *gelt**enjaf*** (al kiu mankas fingro(j)) |
| ***-famaf*** | kiu ŝatas | Ekz. *neva* (libro) | → *neva**famaf*** (bibliofila) |
| ***-fimaf*** | kiu malŝatas | Ekz. *neva* (libro) | → *neva**fimaf*** (malbibliofila) |
| ***-iskaf*** | kiu ne kunhavas | Ekz. *usuk* (hararo) | → *usuk**iskaf*** (senhara) |
| ***-kiraf*** | kiu kunhavas | Ekz. *eip* (salo) | → *eip**kiraf*** (salita) |
| ***-koraf*** | kiu havas la formon de ; kiu similas al | Ekz. *gamda* (kruco) | → *gamda**koraf*** (krucforma) |
| ***-oy*** | kardinala adjektivo (sur la radikalo de nombro) | Ekz. *tev-* (ses) | → *tev**oy*** (ses) |
| ***-toraf*** | kiu nutras sin per | Ekz. *cot* (karno) | → *cot**toraf*** (karnomanĝa) |
| ***-ukaf*** | kiu havas la koloron de | Ekz. *raltada* (rozo) | → *raltad**ukaf*** (rozkolora) |

* la formo de la sufikso estas « ***-f*** », kiam la substantivo finiĝas per vokalo alia je «-a».

Ni metu la sufiksojn rekte sur la substantivojn. Kiam la substantivo finiĝas per « ***-a*** », ĉi tiu lasta litero foriras, se la sufikso komenciĝas per vokalo.

## D : La afiksoj de determinanto [gotuxosta]

Oni tiel nomas la afiksojn, kiuj permesas krei substantivojn kaj manierajn adverbojn pere de determinanto.
Tiuj afiksoj fakte estas nur kvin sufiksoj. Ĉi tiujn ni metu rekte sur la radikalon de la determinanto (do sen la karakteriza finaĵo « ***-af*** » aŭ « ***-f*** »). Por la verbaj adjektivoj, ni tamen metu la sufiksojn sur la plenan formon, kaj ne rekte sur la radikalan verbon. Tiuj kvin sufiksoj estas:

| | |
|---|---|
| ***-aca*** | aĵo, ago kiu havas la karakteron de |
| ***-e*** | parto de tuto karakterizita de tia eco |
| ***-ik*** | tiu kiu estas tiel karakterizita |
| ***-on*** | adverbo de maniero |
| ***-uca*** | eco |

Ekz. : *listaf* (bela)
- ↳ *list****aca*** (belaĵo)
- ↳ *list****uca*** (beleco)
- ↳ *list****e*** (belo ; bela parto de tuto)
- ↳ *list****ik*** (belulo)
- ↳ *list****on*** (bele)

*ar* (bela)
- ↳ *ar****aca*** (alia afero ; diferenco)
- ↳ *ar****uca*** (alieco)
- ↳ *ar****e*** (alia parto de tuto)
- ↳ *ar****ik*** (iu alia)
- ↳ *ar****on*** (alie)

*ruptes* (dependa)
- ↳ *ruptes****aca*** (dependo ; aĵo kiu dependas)
- ↳ *ruptes****uca*** (dependeco)
- ↳ *ruptes****e*** (dependa parto de tuto)
- ↳ *ruptes****ik*** (dependulo)
- ↳ *ruptes****on*** (depende)

## E : La substantivaj kvazaŭsufiksoj [gotuxosta]

Oni tiel nomas sufiksojn, kiuj funkcias simile al la plenaj sufiksoj, sed, kiujn oni ofte uzas memstare. La vortoj, kiujn ili permesas krei surbaze de aliaj radikaloj ne estas liberaj kaj troviĝas en la oficiala vortaro. Kvankam ilia uzo estas pligrandigebla kaj facile komprenebla, reale ĉiuj substantivoj kreitaj pere de ĉi tiuj kvazaŭsufiksoj normale devas esti pritraktitaj en la vortaro.
Ekzistas ĉiaj specoj de ili, ekzemple en la sciencaj fakoj. Sed jen ĉi-malsupre kelkaj, kiujn utilas koni (ĉiuj generas substantivojn):

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| ***-aal*** | arbo [agronomio, botaniko] | Ekz. *toresta* (dorno) | → | *toresta****al*** (dorna arbo) |
| ***-bolk*** | sistemo, reto [ekonomio, societo] | Ekz. *skapa* (ekonomio) | → | *skapa****bolk*** (ekonomisistemo) |
| ***-dunol*** | besta estaĵo [zoologio] | Ekz. *perake* (serpento) | → | *perake****dunol*** (ano de la reptilioj) |
| ***-e*** | frukto [agronomio, botaniko] | Ekz. *pruva* (pomarbo) | → | *pruv****e*** (pomo) |
| ***-fay*** | grajno [agronomio, botaniko] | Ekz. *xot* (fazeolo) | → | *xot****fay*** (grajno de fazeolo) |
| ***-ie*** | krio de besto [zoologio] | Ekz. *vakol* (hundo) | → | *vakol****ie*** (hundokrio) |
| ***-imwa*** | floro [agronomio, botaniko] | Ekz. *kramta* (oranĝarbo) | → | *kramt****imwa*** (floro de oranĝarbo) |
| ***-kranav*** | doloro [medicino] | Ekz. *relt* (muskolo) | → | *relt****kranav*** (muskoldoloro) |

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| ***-nizde*** | manio [mediko, socio] | Ekz. *dubiera* (ŝtelo) | → | *dubiera**nizde*** (kleptomanio) |
| ***-omba*** | ludo [kulturo] | Ekz. *erba* (mono) | → | *er**bomba*** (ludo pri mono) |
| ***-pale*** | vegetala estaĵo [agronomio, botaniko] | Ekz. *voba* (citrono) | → | *voba**pale*** (citruso) |
| ***-sok*** | stato, situacio [ĝenerala] | Ekz. *selt* (socio) | → | *selt**sok*** (socia situacio) |
| ***-toa*** | folio [agronomio, botaniko] | Ekz. *bilka* (bananarbo) | → | *bilka**toa*** (folio de bananarbo) |
| ***-tral*** | elektro [teknologio] | Ekz. *lava* (akvo) | → | *lava**tral*** (elektro generita per akvo) |
| ***-uti*** | sporto [kulturo] | Ekz. *nuba* (mano) | → | *nub**uti*** (boksarto) |
| ***-vega*** | infektiĝo [medicino] | Ekz. *alma* (haŭto) | → | *alma**vega*** (haŭtinfektiĝo) |
| ***-veta*** | kancero [medicino] | Ekz. *larida* (gorĝo) | → | *larida**veta*** (gorĝokancero) |
| ***-zae*** | radiko [agronomio, botaniko] | Ekz. *bemta* (rizoforo) | → | *bemta**zae*** (radiko de rizoforo) |

# Ĉapitro XI : LA ASERTA ELMONTRADO [ruyesa danedira]

En Kotavao, ekzistas regulo nomita «aserta elmontrado», kiu permesas aserti, sen uzi tradician sintakson kun verba propozicio. Tamen, tiu ĉi regulo havas efikojn kaj tre precizajn limojn.

## A : La postdemanda aserto [radimikoerura ruyera]

Ĉi tiu eblo, sen verba elemento, konsistas en respondo al asertaj demandoj.

Ekz. : ***— Kas do in estutul ?*** ***— Volgue***. (— Ĉu vi manĝos kun ĝi? — Ne.)
***— Tokkane in lapiyir ?*** ***— Kan direm***. (— Kiel ĝi venis? — Per aŭto.)

## B : La atribua aserto [pilkovoyafa ruyera]

En Kotavao, la atributoj estas enkondukataj per stataj verboj, precipe « ***TI*** » (esti). Tamen, per la regulo de la atribua elmontrado, eblas neuzi la verbon « ***TI*** ». Sed tio validas nur en la prezenco, por esprimi neabsolutajn ĝeneralaĵojn.

Ekz. : *sin tid gruf* (ili estas inteligentaj) aŭ simple «***sin gruf***»
*inya tir listafa* (ŝi estas bela) aŭ simple «***inya listafa***»

## C : La determinanta aserto senpersona [meilkomafa gotusa ruyera]

Eĉ se tiuj konstruoj estas tre malofte uzataj, eblas esprimi senpersonajn propoziciojn per determinanto kaj la konjunkcio « *da* » (ke). La nepersona subjekto, kiu estas subkomprenata estas « *batcoba* ». Tial, la determinanto nepre estu sonharmonie akordigita per « ***-a*** ».

Ekz. : gravas ke pluvu = *zolonaf**a da** muvar* (anstataŭ *batcoba tir zolonafa da muvar*)

## Ĉ : La absoluta aserto [belikafa ruyera]

En Kotavao, ĉi tiu estas normale farata per uzo de la verbo « ***TI*** » (esti) en la triaj personoj. Sed ankaŭ eblas neuzi la verbon « ***TI*** ». Tiel, determinanto, substantivo aŭ sola pronomo estas ofte tradukata Esperanten per «*tio estas* ...» aŭ «*estas* + [adverbo]» aŭ eĉ per sola adverbo.
Atentu tamen, ke temas pri determinanto : ĝi devas esti sonharmoniigita per « ***-a*** », ĉar ĝi rilatas al la subkomprenita vorto « *batcoba* ».

Ekz. : Tio estas bela! = *Batcoba tir listafa !*
Estas bele! = *Tir listafa !*
Bele! = ***Listafa !***

Ekz. : estas ili = *to sin tid ; to sin aski(y)id*
aŭ → ***sin***

### D : La atentigo al frazelemento [ravlemafa tuanulara]

Multaj manieroj ekzistas, krom tiuj ĉi-supre, por insisti sur frazelemento rilate al la restaĵo de propozicio aŭ de frazo. Sed Kotavao havas specife du partikulojn, kiujn oni nomas «partikuloj de atentigo». Ili permesas igi atenta pri certa frazelemento. Ie ajn en la frazo, ili povas koncerni iun ajn frazelementon : verba formo, determinanto, substantivo, adverbo, propozicio ktp.
Oni loku partikulon de atentigo ĵus antaŭ la frazelementon aŭ la sintagmon. « ***To*** » indikas pozitivan atentigon, kaj male, « ***volto*** » faras negativan atentigon.

Ekz. : ***to battan va gazik adjubeyer*** = ĉi tiu homo mem mortigis la reĝon
***battan va to gazik adjubeyer*** = la reĝon ĉi tiu homo mortigis
***battan va gazik to batlize adjubeyer*** = estas ĉi tie, ke tiu ĉi homo mortigis la reĝon
***battan va gazik to adjubeyer*** = tio, kion faris ĉi tiu homo estis mortigo de la reĝo

***volto battan va gazik adjubeyer*** = ne ĉi tiu homo mortigis la reĝon)
***battan va gazik ba volto miafiz adjubeyer*** = ne tagmeze ĉi tiu homo mortigis la reĝon)

## Ĉapitro XII : LA KOMPONO [ponara]

En Kotavao, kompono estas ofte uzata. Tamen ĝi estas limigita de kelkaj principoj.

### A : La simpla kompono [opelafa ponara]

Ĉi tiu kompono kunigas du substantivojn. Jen ĝiaj principoj:

- ambaŭ substantivoj konservu sian propran formon. Tamen, se la karakterizata parto komencas per vokalo kaj la karakterizanta parto finiĝas per « ***-a*** », tiu lasta vokalo malaperu;
- la karakterizanta parto lokiĝu antaŭ la karakterizata;
- la karakterizata parto (en la fino) de la nova substantivo determinas la sonharmonian akordigon;
- la substantivoj, kiujn oni volas meti en komponon devas havi inter ili ***rilaton transitivan*** (prepozicio « ***va*** »), ***genitivan de aparteno*** (prepozicio « ***ke*** »), ***genitivan de enhavo*** (prepozicio « ***dem*** »), ***de celo*** (prepozicio « ***ta*** »), aŭ ***de materio*** (prepozicio « ***kum*** »).

Ekz. : ***winkawidava*** = *widava ke winka* (urbo de provinco)
***tieiaxe*** = *iaxe va tie* (uzino de gaso)
***fadabilaga*** = *bilaga ta fada* (kaftaso)
***suterabruxa*** = *bruxa ta sutera* (plumo por skribi)
***intakudja*** = *kudja kum inta* (statuo el ligno)

### B : La sinteza kompono [jesa ponara]

Oni tiel nomas la komponon, kiu permesas sintezi substantivon kaj epiteton en unu vorton.
Tiu sinteza kompono estas regata de la jenaj reguloj:

- la epiteto devas esti nura;
- la epiteto lokiĝu antaŭ la substantivo;
- la epiteto eniru la sintezon je sia radikala formo (je sia plena formo, se temas pri verba adjektivo);
- se la substantivo komenciĝas per konsonanto kaj la epiteto havas la sufikson –af, ni konservu « ***-a*** » inter la epiteto kaj la substantivo.

Ekz. : ***pulodavertuma*** = *pulodafa vertuma* (parlamenta reĝimo)
***bemaneva*** = *bemafa neva* (lerneja libro)

### C : La adverbiga kompono [tumugeasa ponara]

En Kotavao, la komponado estas plejofte farata adverbe, por esprimi nocion de tempo aŭ ideon de progresiveco precipe.

### 1) La tempa adverba kompono

Kiel pri la adverbaj serioj, eblas adverbigi kune adjektivon komponantan (kolektiva, negacia, unuopa, nediferencigita, ktp) kaj substantivon tempan, kondiĉe, ke la normala tempa esprimo estus enkondukita per la prepozicio « ***ba*** » (je), « ***bak*** » (en) aŭ « ***remi*** » (dum).

La precipaj substantivoj koncernitaj estas:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| ***bartiv*** | horo | ***viel*** | tago | ***afiz*** | tago (prilumo de Suno) |
| ***verast*** | sekundo | ***safta*** | semajno | ***vanafiz*** | tagiĝo |
| ***wexa*** | minuto | ***aksat*** | monato | ***gazda*** | mateniĝo |
| ***gemelt*** | momento | ***tanda*** | jaro | ***riel*** | mateno |
| ***vula*** | preciza momento | ***nom*** | krepusko, vespero | ***miafiz*** | tagmezo |
| ***ugal*** | tempo | ***miamiel*** | noktomezo | ***kiel*** | posttagmezo ĝis vespero |
| ***sare*** | epoko | ***miel*** | nokto | ***siel*** | komenco de nokto |

kaj ankaŭ iliaj derivaĵoj per « ***-****cek* ».

Ekz. : ***kotbartivon*** = *ba kot bartiv* (ĉiun horon)
***kotgazdon*** = *ba kota gazda* (ĉiun mateniĝon)
***betsareon*** = *bak bete sare* (en iu ajn epoko)
***batvulon*** = *ba bata vula* (en ĉi tiu preciza momento)
***mekgemelton*** = *ba mek gemelt* (en neniu momento)

Eblas ankaŭ kombini la prepoziciojn « *mali* » (ekde) kaj « *kali* » (ĝis) kun tempaj adverboj.

Ekz. : ***maliarinton*** = *mali arintaf viel* (ekde hieraŭ)
***kalieldeon*** = *kali eldef viel* (ĝis morgaŭ)

### 2) La adverba kompono de progresiveco

Ni jam plurfoje renkontis ĝin en la antaŭaj ĉapitroj.
Ĝi esprimas, ke ago estas progresiva kaj ripeta. Ĝi uzas ripeton de vorto. La unua vorto estas je sia radikala stato, kun eventuale konservo de sonharmonia **-**a, se la dua vorto komenciĝas per konsonanto. La dua vorto havas la sufiksojn (ĉefe tiu adverba).

Ekz. : ***barbaron*** (triope)
***abicabicon*** (iom post iom)
***kalikalion*** (paŝego post paŝego (figurasence))
***tuveltuvelon*** (de iu pordo al alia(j))

## D : La gramatika enklizo [pulviropafa jera]

Gramatika enklizo estas partikulara formo de kompono, concernanta certajn kombinaĵojn de gramatikaj vortoj, kiel determinantoj, prepozicioj, konjunkcioj aŭ partikuloj. Temas pri limigita eblo, kiun ni atentu ne tro uzi.

Jen ĝiaj principoj:

– Nur certaj gramatikaj elementoj povas esti en enklizo. La permesitaj tipoj de enklizo estas :
- 1) determinanto + determinanto (*rigardu ĉapitron IV § B7 : la kunfandiĝo de la determinantoj*);
- 2) prepozicio pri loko + prepozicio pri loko (*rigardu ĉapitron VIII § C1 : la enklizo de la prepozicioj pri loko*);
- 3) prepozicio pri tempo + prepozicio pri tempo (*rigardu ĉapitron VIII § B1 : la enklizo de la prepozicioj pri tempo*);
- 4) kuniganta konjunkcio + kuniganta konjunkcio (*rigardu ĉapitron IX § E6 : enklizo de la kunigantaj*

konjunkcioj);

- 5) partikulo de aspekto + partikulo de aspekto (*rigardu ĉapitron III § E13 : la enklizo de aspektoj*);
- 6) primitiva konjunkcio + adverba partikulo (*rigardu ĉapitron IX § B2 : la komponitaj konjunkcioj, kiuj havas adverban valoron*).

– La kunfandiĝitaj elementoj kunigas siajn sencojn kaj rolojn tiel, ke pli da specifeco estos.
– La unua elemento de enklizo estas je stato de la radikalo, kvankam la dua ricevas la finan modifon (koncernas prepoziciojn pri loko aŭ kunigantajn konjunkciojn) aŭ la sonharmonian vokalon (determinantoj).

Ekz. :
- ***jontikar*** (*jontik + ar*)= ***multaj aliaj*** : determinanto + determinanto
- ***rinyona*** (*rinaf + yona*)= ***viaj ; ciaj*** : determinanto + determinanto
- ***kentalte*** (*ken + talte*)= ***laŭ la maldekstra bordo de*** : prepozicio pri loko + prepozicio pri loko
- ***abdibak*** (*abdi + bak*)= ***antaŭ kaj dum*** : prepozicio pri tempo + prepozicio pri tempo
- ***numazen*** (*num + azen*)= ***do poste*** : kuniganta konjunkcio + kuniganta konjunkcio
- ***futoz*** (*fu + toz*)= ***kiu baldaŭ komencos*** : partikulo de aspekto + partikulo de aspekto
- ***larderotir*** (*larde + rotir*)= ***ĉar eble*** : primitiva konjunkcio + adverba partikulo

# Ĉapitro XIII : LA VORTORDO [ravlemvura]

En Kotavao, ekzistas neniu ordo absoluta de la vortoj, krom en kelkaj partikularaj situacioj, kiujn ni studis en la antaŭaj ĉapitroj. Tamen, ni povas rimarki kelkajn ĝeneralajn tendencojn:

- prepozicio nepre lokiĝu antaŭ la vorto, kiun ĝi enkondukas;
- la verbaj partikuloj nepre lokiĝu antaŭ la verbo;
- epiteto lokiĝas antaŭ la substantivo aŭ pronomo, kiun ĝi kvalifikas;
- la subjekto lokiĝas antaŭ la verbo;
- adverbo lokiĝas antaŭ sia kvalifikaĵo;
- la objektaj komplementoj de verbo (transitiva kaj kompletiva) lokiĝas antaŭ la verbo;
- objekta komplemento transitiva (prep. « va ») antaŭas al eventuala dua komplemento (prep. « gu »);
- objekta komplemento karakterizita de nomo lokiĝas post la substantivo aŭ adjektivo, kiun ĝi kompletigas;
- la pronomaj komplementoj ĝenerale antaŭas al la verbo.

# Ĉapitro XIV : LA PRINCIPOJ DE ESPRIMADO [muxarindeem]

